HUNGARA VIVO

I
1985
16,- Ft

LA FABRIKO DE PLASTOJ KAJ ELEKTRO–IZOLAJOJ PROVIZAS LA ENLANDAJN INDUSTRIOJN DE ELEKTROTEKNIKO, VETURILOJ, MEBLOJ KAJ KONSTRUADO PER ALTNIVELAJ PLASTAJOJ, DUON– KAJ FINPRODUKTAJOJ.



La entrepreno, fondita antau pli ol cent jaroj, konsistas el tri fabrikoj, havantaj grandan memstarecon en sia agado.

Plej gravaj produktajoj:

KONTRAKTEN–tuboj, varme srumpantaj
Akumulator-kestoj el polipropileno kaj durkaucuko
Plastaj konduktiltuboj kaj elektromuntajoj
Lauformaj pecoj, varme srumpantaj kaj bakelitaj

1883-1983
VSZM
100 éves

VILLAMOSSZIGETELŐ ÉS MŰANYAGGYÁR
BUDAPESTO, XI., FEHÉRVÁRI ÚT 120. H-1116
FONDITA EN JARO 1883.

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u.6. H-1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf. 193. H-1368
Aperas dumonate
XXVa jaro, 1985 n-ro 1
(119)

ENHAVO

Márkus, G.: Monda Ligo de UN-Societoj kaj UEA povas kunlabori 2
László, I.: Departemento Szabolcs 5
Budapeŝto – festivalurbo 7
El la programo de la Teatra Festivalo 9
Glatz, F.: Militoj kaj historiografio (*V.Benczik*) 10
Tokai, A. : Petego de Davido por senscio kaj paco (*V.Benczik*) 11
Goodheir, A.: Kontraŭ bombkultistoj, Armilfaranto 11
Poeto kaj lingvomajstro 12
Kosztolányi, D.: La nova kulturlingvo (*M.Fejes*) 12
Kosztolányi, D.: Primorta prediko (*M.Fejes*) 13
Hegedűs, Gy.: Kiam mi estis hungar-greka interpretisto (*P.A. Rados*) 14
Nemere, I.: La trezoro 1. 16
Kvin demandoj al István Nemere 17
Originala poezio 18
Princz, O.: La pentristo de nostalgio 19
Panoramo 20
La centro de Hungario 22
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 23
Mozaiko el Esperantujo 24
Esperanta libroproduktado 1984 25
Bálint, Sz.: Skandalo en la vilaĝo 26
Doktor, J.: Aŭtuna elegio 27
Korotkov, M.: Mi estas vi post unu jaro 28
Ördögh, Sz.: Maro kaj mevo (*I.Szabó*) 30
Recenzoj 33
Por efike ebenigi la grundon (*E.F.*) 35
Gaja paĝo 38
Krucenigmo, Ekzameno sen risko 39
Leterkesto, korespondi 40

Sur la frontpaĝo foto de Z. Fejér

La 25-an jarkolekton...

komencas HV per tiu ĉi numero: la unua kajero de nia revuo aperis antaŭ kvarona jarcento minus unu jaro, fine de marto, sub la redaktado de Lajos *Kökény,* renoma esperantisto, redaktoro de «Enciklopedio de Esperanto». Tiam vivis ankoraŭ ĉiuj hungaraj esperantistaj klasikuloj: *Baghy, Kalocsay, Tárkony, Szathmári, Somlai-Spierer, Bodő,* eĉ *Baranyai,* kvankam li jam ne longe, kaj la unua saluto al la nova revuo povis veni el Svedlando, de Ferenc *Szilágyi...* Dolore longa listo, kaj granda perdo por la Esperanta kulturo. Kaj ankaŭ prema respondeco por la nova stabo de la revuo – kiel eblas plej inde konservi tiun brilan tradicion?

Hungara Vivo dum la forpasinta tempo evoluis almenaŭ teknike kaj laŭ la amplekso. Dum la unuaj 13 jaroj aperis jare kvarfoje 32-paĝaj kajeroj, ekde 1974 nia revuo estas dumonata. En 1978 al la 32 internaj paĝoj aldoniĝis pliaj ok paĝoj, tiel la nuna jara paĝonombro estas 240, kontraste al la komencaj 132 paĝoj. Kaj la kovrilpaĝoj estas koloraj jam de sep jaroj.

Sur la kovrilpaĝo de tiu ĉi numero paradas ses originalaj verkoj de István *Nemere,* kiu laŭ la vendostatistikoj certe estas nuntempe la plej vaste legata esperantista verkisto. En tiu ĉi numero ni komencas aperigi felietonan romaneton el lia plumo, sub la titolo «La trezoro». La lasta daŭrigo de la atentoĉena historio finiĝos iam dum la venonta jaro.

Literaturamantoj certe estos kontentaj, ĉar ili trovos legaĵojn abunde en tiu ĉi numero. Originala sciencfikciaĵo de M. *Korotkov,* du noveloj, tradukitaj el la hungara, ĉerpaĵoj el la verkoj de D. *Kosztolányi,* fragmento el la komedio de L. *Tabi,* pluraj poemoj...

Certe ĉiuj esperantistoj, kiuj interesiĝas pri la internacia pozicio kaj prestiĝo de UEA, volonte legos la intervjuon kun s-ro *Hagmajer,* prezidanto de la Monda Ligo de UN-Societoj.

Aparte atentinda estas la artikolo de Ferenc *Glatz* «Militoj kaj historiografio»: li aliras tiun ĉi tranĉe akutan problemon laŭ tre neklisa pensmaniero.

Plua ĉapitro de la prezento de Hungarlandaj regionoj, mallongaj novaĵetoj el Esperantujo, kelkaj recenzoj, prezento de la programo de la 5-a Budapeŝta Printempa Festivalo, krucenigmo, daŭrigenda krimrakonto, ktp. – jen la printempa menuo...



MONDA LIGO DE UN-SOCIETOJ KAJ UEA POVAS KUNLABORI

Intervjuo kun d-ro Marek Hagmajer, ĝenerala sekretario de MLUS

Decembre de 1984 oni aranĝis en Hungario la ĝeneralan kunvenon de la Hungara UN-Societo kaj tritagan konferencon de la pacesploraj institutoj de la mondo. Ambaŭ aranĝojn partoprenis ankaŭ d-ro Marek Hagmajer *(polo), ĝenerala sekretario de la Monda Ligo de UN-Societoj (MLUS). Profitante la Budapeŝtan restadon de s-ro Hagmajer,* Világ és Nyelv *(Mondo kaj Lingvo) kaj* Hungara Vivo *petis intervjuon de li pri la ebloj de kunlaborado inter MLUS kaj UEA.*

– Sinjoro ĝenerala sekretario, niaj revuoj antaŭ ok jaroj jam aperigis intervjuon kun akademiano d-ro Mihály Simai, *tiama prezidanto de MLUS. En tiu intervjuo profesoro Simai esprimis pozitivan opinion pri Esperanto, kaj trovis ebla la kunlaboradon kun UEA. Sekve de la intervjuo kreiĝis kontakto inter d-ro Humphrey* Tonkin, *la tiama prezidanto (nuna vicprezidanto) de UEA kaj profesoro Simai, respektive Frank* Field, *tiama ĝenerala sekretario de MLUS. Rezulte de tiu kontaktiĝo s-ro Field en 1979 partoprenis la 64-an Universalan Kongreson de Esperanto en Svislando. Lige kun tio ni demandas vin, ĉu vi, kiel nova ĝenerala sekretario de MLUS, kaj la nova usona prezidanto de via organizo, deziras daŭrigi la kontaktojn kun la gvidantoj de UEA?*

Ni havas plurajn komunajn celojn

– Mi konas bone la kreiĝon kaj evoluon de kontaktoj inter Universala Esperanto-Asocio kaj nia organizo. Mi persone trovas, ke la pluevoluigo de la kontaktoj inter la du tutmondaj movadoj estas tre grava. Unuavice tial, ĉar la ĝenerala celo de la Esperanto-movado estas ne nur disvastigi la Internacian Lingvon, sed ankaŭ akceli per tiu lingvo la interkompreniĝon kaj amikecon inter la diversaj popoloj. Tiu celo esence koincidas kun la celoj de nia organizo. El tio sekvas, ke ni povas kunlabori sur pluraj komuninteresaj kampoj, speciale koncerne la taskojn de UNESKO. Kiel konkretan ekzemplon mi povus mencii la proponon de UNESKO krei instruprogramon, kiu celu subteni la internacian kompreniĝon kaj la aferon de monda paco – en tiu agado ni konsulte kunlaboras. Sed montriĝas ebloj ankaŭ sur aliaj kampoj. Nia organizo nuntempe preparas gravan projekton sub titolo „UN, la afero de paco kaj sekureco, kaj la sinteno de la publika opinio". Ni invitas ankaŭ ekspertojn de aliaj organizaĵoj, por ke ili partoprenu en la prilaborado de la temo. Tiel ili kontribuus ankaŭ al la laboro de la internacia simpozio pri la temo, kiun ni deziras aranĝi septembre de 1985 en Ĝenevo. Ni tre ĝojus, se laŭ nia invito ankaŭ la reprezentantoj de UEA partoprenus tiun simpozion, kontribuante al la sukceso de nia projekto.

– La 27-a Ĝenerala Kunveno de la Monda Ligo de UN-Societoj laŭ la propono „La utilo de internacia lingvo" de la reprezentantoj de la Nov-Zelanda UN-Societo akceptis la suban rezolucion:

„La Ĝenerala Kunveno

1. *Aprobas* la intertraktojn, kiujn la prezidanto kaj ĝenerala sekretario de MLUS havis kun Universala Esperanto-Asocio.

2. *Rekonas,* ke la bazo de la plua kunlaborado estas internaciismo, kiun egale reprezentas Esperanto-Asocioj kaj UN-Societoj.

3. *Alvokas* ĉiujn UN-Societojn kunlabori kun Esperanto-Asocioj, kaj akceli ĉe la edukaj institucioj de sia lando la komencon aŭ vastigon de la instruado de Esperanto."

Certe ankaŭ vi mem partoprenis en tiu Kunveno kaj ankaŭ subtenis la akcepton de la Rezolucio. Ĉu vi rigardas ĝin valida ankaŭ nun? Se jes, ĉu ne estus utile se la centraj organoj de MLUS informiĝus ĉe la naciaj UN-Societoj, kiel tiuj rilatas al la Rezolucio, kaj ĉu ili faris ion en la senco de la tria punkto de la Rezolucio? Samtempe MLUS povus instigi ilin por realigi tiun gravan punkton.

Per dudirekta agado

– La Rezolucio de la Barcelona Ĝenerala Kunveno estis tre utila, kaj ĝi donis bonan bazon ankaŭ por la plivastigo de la kunlaborado inter niaj organizaĵoj. Sed ĉu ankaŭ UEA faris tian rezolucion por la subteno de la agado de MLUS ? Nu, tion mi ne scias, sed tia rezolucio estus bona respondo al la kunlaboremo, manifestiĝinta en nia Barcelona Ĝenerala Kunveno.

Koncerne la duan parton de via demando mi povas diri la jenon: tiutempe ni dissendis la Rezolucion al ĉiuj naciaj UN-Societoj, do ili havis la eblon ekkoni ĝin. Sed pri tio mi ne havas informojn, kiagrade dank' al tiu Rezolucio evoluis la kontaktoj inter la landaj asocioj de UEA kaj la naciaj UN-Societoj. Estus bone, se la pli aktivaj naciaj Esperanto-organizaĵoj kaj UN-Societoj nun denove esplorus la eblojn de komuna agado. Mi pensas, ke la pluaj iniciatoj de la naciaj kaj internaciaj organizaĵoj povus esti ĝojindaj, sed la plua agado devos fariĝi ambaŭflanka. Ekzemple, ni ĉiam invitas UEA-n al la aranĝoj de MLUS.

– Ĉar Hungara Esperanto-Asocio jam depost naŭ jaroj estas kolektiva membro de la Hungara UN-Societo, kaj daŭras bona kunlaborado inter la du organizaĵoj, lanĉiĝas en mi la demando: ĉu estus eble, ke MLUS kaj UEA kune kreu internacian komisionon de lingvistoj, kiu ekzamenus la internacian lingvan situacion kaj la malfacilaĵojn, kiuj aperas en tiu sfero. Ĉar la lingva politiko, kiu nuntempe aplikiĝas en la internaciaj rilatoj, baziĝas sur la privilegioj de la t.n. mondlingvoj de kelkaj grandpotencoj, malprofite por la plimulto de la popoloj. Tiu ĉi internacia komisiono de lingvistoj ankaŭ povus fari objektivan ekzamenadon, ĉu Esperanto vere estas taŭga roli kiel lingvo de la internaciaj rilatoj? Kaj la raporton de tiu ĉi komisiono MLUS – kiel speciala tutmonda socia organizo de UN – povus prezenti al la registaroj de la ŝtatoj-membroj, kaj poste al la Ĝenerala Asembleo de UN. Kiel vi opinias pri la ebloj de tia agado, kiu povus pliproksimigi la homaron al la solvo de la komunikadaj problemoj de la mondo?

– Kun ĝojo mi aŭdas, ke inter la Hungara UN-Societo kaj Hungara Esperanto-Asocio formiĝis bonaj interrilatoj. Tiu kunlaborado povus esti modelo de agado ankaŭ por aliaj landoj. La UN-Societoj de multaj landoj akceptas ankaŭ kolektivajn membrojn, tiel la landaj Esperanto-organizaĵoj povus aliĝi al la koncerna UN-Societo por ankaŭ tiel fortigi la kunlaboradon.

Kio koncernas la ideon, ke la homaro sur ĉiuj kampoj de la internaciaj kontaktoj, do ankaŭ en UN, uzu unu universalan, komunan lingvon – nu, ĝi estas celo tre nobla kaj alloga. Mi scias, ke la tutmonda Esperanto-movado laboras por atingi tiun celon. Nur mi ne scias, kiel tiu celo praktike estas atingebla?

La ĝenerala sekretario demandas

– La unua ĉefa celo de nia movado estas lukti por tio, ke enkadre de UN aŭ UNESKO kreiĝu internacia interkonsento, surbaze de kiu en ĉiuj lernejoj de la mondo Esperanto fariĝus la unua kaj sola deviga fremda lingvo, la ceteraj lingvoj fariĝus fakultativaj. Kial? Ĉar Esperanto estas la plej facile ellernebla vivanta fremda lingvo, havanta ankaŭ la trajton de neŭtraleco; per tiu lingvo – konservante kaj egalrajtigante la naciajn lingvojn – oni povus plej demokratie solvi la problemon de la multlingveco. Se kreiĝus tia tutmonda interkonsento, dum kelkaj jaroj estus eble organizi en ĉiuj landoj la eldonon de konvenaj lernolibroj, kaj ankaŭ la necesa nombro de instruistoj povus esti atingebla.

Tio estus tasko solvebla multe pli facile kaj kun malpli da elspezoj, ol la nun aplikata lingva politiko, kiu baziĝas sur la internacia uzo de la t.n. mondlingvoj, ja en tiu sistemo necesas elspezi multege ne nur por la daŭra instruado de tiuj lingvoj, sed ankaŭ por la utiligo de la servoj de amaso da interpretistoj kaj tradukistoj. Esperanto – se oni instruus ĝin en la lernejoj de ĉiuj landoj kiel unuan fremdan lingvon – dum ĉirkaŭ nur dek jaroj povus tiel populariĝi kaj disvastiĝi, ke ĝi povus roli kiel sola laborlingvo de ĉiuj internaciaj oficialaj rilatoj, faciligante la funkciadon de tiuj interrilatoj kaj ŝparigante konsiderindajn sumojn.

– Mi ripetas mian demandon: kiel la ŝtatoj-membroj de UN reagus al tia propono? Ĉu UEA jam prezentis tian proponon al UN?

– Jam al la Ligo de Nacioj estis prezentita tia propono, nome al ĝia Ĝenerala Kunveno en la jaro 1920: la proponon prezentis 14 registaroj. Tio estis historia ago, kiu estas certe ripetenda. Sed en la Ligo de Nacioj la brita kaj franca registaroj havis multe pli grandan influon ol ili havas nuntempe, kaj – por konservi siajn lingvajn privilegiojn – la propono estis dronigita en komisionaj debatoj, daŭrantaj dum jaroj. Malgraŭ tio, ke la internacia opinisondado, farita de la sekretariato de la Ligo de Nacioj – tion konfirmas ankaŭ la oficiala raporto, aperigita pri la temo – atestis pri grava socia subteno por la propono de la 14 registaroj. Ĝuste tial la iniciato ĉe la Ligo de Nacioj – malgraŭ la malsukceso kaŭzita de la tiamaj potencrilatoj – estas rigardebla kiel la unua principa kaj praktika venko de la lingvo Esperanto kaj ĝia movado.

– Sed al UN ĝis nun registaroj ne prezentis tian proponon, ĉu ne?

– Bedaŭrinde ankoraŭ ne. Sed UEA en 1950 kaj 1965 organizis tutmondan kampanjon kaj subskribokolektadon por la memorando, kiun ĝi transdonis al UN. En 1950 kolektiĝis nur 15 milionoj da subskriboj, sed en 1965 jam 72 milionoj da homoj subtenis la memorandon, ĉu individue, ĉu pere de sia organizaĵo. Inter la individuaj subskribintoj troviĝis grandproporcie intelektuloj, multaj konataj politikis-

toj, scienculoj, lingvistoj, literaturistoj kaj publikaj agantoj. La unuan memorandon UN transdonis al UNESKO, kies Ĝenerala Kunveno en Montevideo dum la jaro 1954 akceptis rezolucion, kiu politike kaj morale rekonis la ĝistiamajn rezultojn de la internacilingva movado, car tiuj rezultoj remonias kun la celoj de UNESKO. Krome tiu rezolucio rekomendis al la registaroj de la ŝtatoj-membroj kaj al la ĝenerala direktoro de UNESKO sekvi la evoluon kaj rezultojn de la fakultativa lerneja instruado de Esperanto.

Depost tiam UEA havas informajn kaj konsultajn rilatojn kun UNESKO (Kategorio „B").

Kiu vojo pli facile ireblas?

– El ĉio ĉi klaras, ke tiu grandsignifa afero havas antaŭ si ankoraŭ longan kaj multflankan luktadon. La Monda Ligo de UN-Societoj per la jam skizita plivastigo de la ebloj de kunlaborado povos doni utilan subtenon al via strebado. Sed antaŭ ol venos la tempo de decido fare de UN aŭ UNESKO, necesas pensadi pri la praktikaj konsekvencoj kaj novaj taskoj, kiuj fontus el eventuale atingita internacia interkonsento. Ĝuste pro tio mi ne vidas reala la eblon krei internacian komisionon de lingvistoj, almenaŭ ne en la maniero, kiel vi aludis tion. Antaŭ ĉio tial, ĉar se mi petus la konsenton de niaj naciaj UN-Societoj por partopreni en la kreo de tia internacia komisiono de lingvistoj, tiam la UN-Societoj de anglalingvaj landoj certe ne donus sian konsenton. Do, la afero fiaskus jam ĉe la komenco. Laŭ mi pli facile oni povus krei tian komisionon de lingvistoj enkadre de UEA. Tiu komisiono ja devus ellabori plurajn tiajn argumentojn kaj taktikajn demandojn, pri kiuj pleje kompetentas la fakuloj de UEA. Sed eventuale eblus ankaŭ tio, ke UEA iniciatu ĉe UNESKO la ekzamenadon de la taŭgeco de Esperanto por internacia uzo, kaj ankaŭ la kondiĉojn por ĝia vasta aplikado en la internaciaj rilatoj.

Sendepende de tio, la ideo krei tian internacian komisionon de lingvistoj estas tre interesa. Tial mi scivolas, kiagrade en Esperanto estas evoluigitaj la diversaj fakaj terminologioj? Ĉu ekzistas en Esperanto terminoj, kiuj respondas al la tre komplikaj fakaj terminoj, aplikataj en la Eŭropa Ekonomia Komisiono de UN aŭ aliaj internaciaj organoj ? Simila problemo lanĉiĝas koncerne UNCTAD, kiu estas organizaĵo de UN, okupiĝanta pri la tre kompleksaj kaj multflankaj problemoj de la evolulandoj, kaj ĝi havas tre specifan terminologion, Ĉu Esperanto havas tiajn terminologiojn?

– Jes, ĝi havas. Mi mem faris universitatajn studojn en Japanio, kaj por tio certigis stipendion japana esperantista scienca fondaĵo. Tiamaniere, ĉar komence mi uzis Esperanton kiel pontlingvon, mi povis akiri personajn kaj konkretajn spertojn pri tio, ke Esperanto jam en sia nuna evolunivelo taŭgas por pritrakti komplikajn sciencajn kaj ekonomiajn problemojn. Cetere, en la internacia Esperanto-movado funkcias ekonomikaj, kibernetikaj, medicinaj, ornitologiaj kaj multaj aliaj fakaj organizaĵoj, kiuj ankaŭ eldonas fakajn revuojn en Esperanto. Kaj por tio necesas altgrade evoluinta faka terminologio.

Interrilatoj de tutglobaj problemoj

– Nu, se estas tiel, tiam estus bone, se vi utiligus viajn kontaktojn kun la japanaj Esperanto-organizaĵoj por instigi ilin, ke ili kontaktiĝu kun la Japana UN-Societo. Estus tre utile, se la japanaj Esperanto-organizaĵoj surbaze de la Barcelona Rezolucio disvolvus vastan kunlaboradon kun nia japana societo.

Revene al tiu demando, ĉu MLUS subtenus prezenti al UN la aferon de la internacia lingvo – nu, lige kun tio oni devas nepre konsideri ankaŭ iun alian fakton. Nome tion, ke en la nuna komplika internacia situacio UN kaj ankaŭ MLUS estas okupita pri tutglobaj problemoj multe pli gravaj, ol estas la lingvaj problemoj kaj la enkonduko de internacia lingvo. La plej grava internacia tasko de nia epoko estas la plua konservo de paco kaj la revivigo de la procezo de malstreĉiĝo.

– Tio estas vera, sinjoro ĝenerala sekretario. Sed dum la historio la homaro kaj ankaŭ ĉiu popolo aparte devis okupiĝi samtempe pri la solvado de pluraj gravaj aŭ eĉ tutglobaj problemoj. Ankaŭ nun estas tiel. Kaj la lingvaj kaj komunikadaj problemoj de la internaciaj rilatoj estas unu el la universalaj problemoj, kiujn havas la popoloj vivantaj en la fluo de la scienca-teknika revolucio kaj internaciiĝo. Pri tio kaj pro tio estis farita laŭ la komisio de UNESKO ankaŭ la t.n. MacBride-raporto. Estas do certe, ke la oficiala alpreno de unu neŭtrala internacia lingvo plifaciligus la solvadon de aliaj tutglobaj problemoj. Tial ni kredas, ke la iom-post-ioman atingon de tiuj celoj povus multe akceli ankaŭ la plivastigo de la kunlaborado inter MLUS kaj UEA, du tutmondaj organizaĵoj. Sinjoro ĝenerala sekretario, sur kiuj terenoj vi vidus eblon por tio?

– Kiel mi jam aludis komence de nia interparolo, la du tutmondaj organizaĵoj povas kune partopreni en diversaj programoj. Mi supozas, ke por Universala Esperanto-Asocio estus utile partopreni en tiaj aranĝoj kaj programoj de MLUS, kies celo estas akcelado de la internacia kompreniĝo. Krome povas esti konsideritaj ankaŭ ĉiuspecaj agadoj, kiuj celas la fortigon de UN, ja tio estas intereso ankaŭ de la Esperanto-movado. Mi scias, ke ankaŭ en viaj rondoj troviĝas personoj, kiuj estas alte kvalifikitaj specialistoj de diversaj kampoj, kaj ili efike povus kontribui al la sukcesigo de programoj, kiujn ni lanĉis. Aliflanke ankaŭ ni havas fakulojn, kiuj povus efike kunlabori en la solvo de taskoj, kiujn havas antaŭ si Universala Esperanto-Asocio. Sed krom tio povas esti konsideritaj ankaŭ aliaj kampoj de kunlaborado, ne nur sur la internacia nivelo de UEA kaj MLUS, sed ankaŭ sur la nivelo de la naciaj organizaĵoj. Kaj la iniciatojn por la firmigo de tiaj kontaktoj MLUS ĉiam bonvenigis kaj bonvenigos.

– Sinjoro ĝenerala sekretario, dankon pro la intervjuo.

Gábor *Márkus*

REGIONOJ DE HUNGARIO

Departemento Szabolcs-Szatmár



Kastelo en Nagykálló

Rigardante la mapon de Hungario, ni povus nomi tiun ĉi departementon la orienta angulo de la lando. Ĝi kontaktiĝas norde kun Sovetio, sude kun Rumanio kaj situas sur la meza parto de la t.n. *Nyírség* (Njirŝeg), kiu estas karakteriza regiono de Hungario. Ĝia specialaĵo estas la dense viciĝantaj etaj vilaĝoj. Kvankam la mezepokaj turkaj trupoj travagadis ankaŭ tiun regionon, daŭre ili ne restis tie, kaj sekve intertempe povis formiĝi novaj vilaĝoj. Do, la regiono apartenas al la plej dense loĝataj teritorioj de Hungario.

Nyíregyháza (Njiredjhaza) estas la administra centro de la departemento, samtempe ankaŭ unu el la ĉefaj urboj de Nyírség. Pro ĝia centra situo, administra rolo kaj la apuda banejo *Sóstó* (Ŝoŝtó), ĝia fremdultrafiko ĉiam pliiĝas. Kun Budapeŝto la urbon kunligas elektra fervoja ĉeflinio kaj la ĉefŝoseo n-ro 4.

Historie la unua mencio pri la urbo devenas el la dektria jarcento, kiam ĝia nomo estis *Nyírfalu* (Njirfalu). La tatara invado tute detruis la mezepokan vilaĝon. Pro la ĉirkaŭaj marĉoj kaj lagoj la turkaj trupoj relative malpli minacis la ĉaman vilaĝon, tamen ĝis la komenco de la dekoka jarcento ĝi preskaŭ tute senhomiĝis, kaj tiam la loka bienulo invitis tien kamparanojn el la norda parto de Hungario.

Je la fino de la deknaŭa jarcento Nyíregyháza fariĝis urbo, kaj iom post iom, pere de la diversaj fabrikoj, uzinoj oni evoluigis ĝin grava industria centro de la lando, kun fabrikoj de alkoholo, gumo, konservaĵoj kaj papero.

Pro la grava kaj grandkvanta pomproduktado de la departemento, en Nyíregyháza oni konstruis pomdeponejon kun kapacito de 4000 vagonoj. La urbo havas konsiderindajn instituciojn de meza- kaj supera instruado.

El fremdultrafika vidpunkto estas la ĉefa altiro de la urbo la banloko Sóstó. Ĝi servas egale la sportistojn, kaj la turistojn, kiuj serĉas ripozon. Oni trovas ĉi tie ankaŭ modernan hotelon kaj diversajn eblojn por amuziĝi.

En *Tiszavasvári* (Tisavaŝvari) funkcias unu el tiuj medikamentfabrikoj, kiuj multe produktas ankaŭ por eksporto. Proksimume en 25 landojn ĝi eksportas bazmaterialojn por medikament-fabrikado. La fondinto de la uzino estis la loka apotekisto János Kabay (1896–1936), kiu famiĝis pro tio, ĉar li estis la unua, kiu sukcesis produkti opio-alkaloidon el la kokono de papavo.

Kisvárda (Kiŝvarda) havas 14 000 loĝantojn, estas malnova urbeto, en kiu troviĝas pluraj artmemoraĵoj. Ĝiaj

La preĝejo en Nyírbátor

La Móricz-domo en Tiszacsécse



Preĝejo en Tákos



Vaja

gimnazioj, faklernejoj pruvas la evoluon de la loka kultura vivo. La lernejo por rajdistoj altiras signifan fremdultrafikon.

En *Vásárosnamény* (Vaŝarosnamenj) ĉe la bordo de la rivero Tiso agrabla plaĝo atendas la vizitantojn. La muzeo de la vilaĝo entenas multajn popolartajn objektojn.

Fehérgyarmat (Feherdjarmat) havas gotikstilan Kalvinanan preĝejon, kiu estis konstruita en la dekkvina jarcento. Sur la placo antaŭ la preĝejo staras monumento pri la eksterordinara inundo de la rivero Szamos, okazinta en 1970;

Nyírbátor (Njirbator) kun 14 000 loĝantoj, estas ekonomia centro de Nyírség. Ĝia reformita preĝejo estas la plej bela gotikstila protestanta templo en Hungario. Ĝi estis konstruita en la mezepoko. Specimeno el la altvalora instalaĵo de la preĝejo troviĝas ankaŭ en la Hungara Nacia Muzeo en Budapeŝto. Apud la preĝejo staras sonorilturo, konstruita el ligno. En la reformita preĝejo ekde 1966 ĉiujare dum aŭgusto oni aranĝas „Muzikajn Tagojn de Nyírbátor".

Arhitektura kuriozaĵo estas la Franciskana („minorita") preĝejo, kies stilkarakteron oni plurfoje ŝanĝis ĝis la dekoka jarcento.

En tiu ĉi urbeto troviĝas la sola kandel-fabriko de Hungario. Cetere en Nyírbátor okazas ankaŭ konsiderinda tabakproduktado.

Nagykálló (Nadjkallo) ĝis 1875 estis la ĉefa urbo de la departemento Szatmár. Nun ĝi estas vilaĝo: ĉi tie naskiĝis Frigyes *Korányi*, medicina profesoro, kiu elstaris en la scienco pri la internaj malsanoj. Liaj sciencaj agado kaj rezultoj faris lian nomon konata ankaŭ internacie.

La eta vilaĝo *Vaja* estas vizitinda pro la iama *Vay*-burgkastelo, kiu konstruiĝis en la deksesa jarcento. Lige kun liberbatalo de Rákóczi (1704-1711) tiu kastelo fariĝis fama historia memoraĵo. En la nunaj jaroj oni aranĝas en ĝi sciencajn kunsidojn, memore pri la eventoj de la tiama liberbatalo.

En la departemento funkcias E-grupoj en Nyíregyháza, Nagykálló, Dombrád kaj Tiszavasvári. Ili havas entute 120 membrojn.

István *László*

Tiszacsécse



Lignoskulptaĵo el Nyírbátor



La preĝejo en Nyírbátor (Fotoj de 2. Fejér)



La Fiŝista Bastiono en Budapeŝto

En la plej diversaj landoj de la mondo estas organizitaj ĉiujare trimil festivaloj, inter ili la plej juna estas la Budapeŝta, ja nur la kvina okazos ĉi-jare inter la 22-a kaj 31-a de marto. Tamen eblas aserti plenrajte, ke tiu programaro estas nuntempe jam konata, eĉ rekonata. Tion pruvas ankaŭ la vasta interesiĝo: la aranĝantoj ĉi-marte salutos jam la trimilionan festivalgaston.

La bazan celadon de la organizantoj pravigis la praktiko: pruviĝis ĝustaj la fruprintempa dato, la prezentado de la hungara kulturo kaj la varieco. Kutime estas aranĝataj „unuartaj" festivaloj, la Budapeŝta estas escepto, ja ĝia varieco vastas de la belartoj ĝis la operoj. La plej internacia lingvo estas la muziko. Konvene al la tradicioj de la komponistoj *Kodály* kaj *Bartók,* en tiuj dek tagoj okazos prezentoj de majstroverkoj de mondfamaj hungaraj kaj eksterlandaj artistoj, en la Muzika Akademio kaj en preĝejoj.

Estos viziteblaj pli ol dudek ekspozicioj de bildoj, skulptaĵoj kaj grafikaĵoj. Kadre de *Filmglobuso '85* okazos franca kaj afrika filmsemajnoj, kie estos spekteblaj la premiitaj filmoj de la internaciaj filmfestivaloj. La hungara kuirarto estas mondfama. Nure nur en la ĉefurbo 110 restoracioj preparas specialajn programojn kaj – evidente – unikaĵojn de la kuirarto. Krom la urbo Sopron, okcidenta pordego de Hungario, jam ankaŭ Szentendre – unu el la plej belaj historiaj urboj de la riverego Danubo brakumanta ok landojn – partoprenos la Festivalajn programojn. La evento okazos en antaŭsezono, do nia celo estas, ke la gastoj profitu multe kontraŭ malmulte da mono; ili ĉiuj fariĝu heroldoj de Hungario.

BUDAPEŜTO—FESTIVALURBO

El la eventoj de la V-a Budapeŝta Printempa Festivalo

Muziko

Fortepiana koncerto de György Cziffra
25-a de marto, 20.00 horo Hungara Ŝtata Operdomo
31-a de marto, 20.00 horo Budapeŝta Kongresa Centro

Koncerto de la Budapeŝta Festivalorkestro
Dirigento: Iván Fischer, kontribuanto: Zoltán Kocsis
En la programo: verkoj de Berlioz, Bartók kaj Beethoven
22-a de marto, 19.30 horo Muzika Akademio
(festa malferma koncerto)
23-a de marto, 19.30 horo Teatro „Erkel"

Fortepiana vespero de Dezső Ránki
23-a de marto, 19.30 horo Muzika Akademio

Sonata vespero de György Pauk kaj Péter Frankl
En la programo: verkoj de Mozart, Weiner kaj Schubert
29-a de marto, 19.30 horo Muzika Akademio

Koncerto de fortepianaj trioj premiitaj en la Internacia Komponista Konkurso (festa koncerto kun disdono de la premioj)
23-a de marto, 19.30 horo Muzika Akademio,
Malgranda Salono

Aŭtora prezentado el la kamerkomponaĵoj de Antal Doráti
25-a de marto, 19.30 horo „Vigadó" de Pest

Koncerto de la Infankoruso de la Hungara Radio
22-a de marto, 20.00 horo Kalvinana preĝejo sur la placo Kálvin

El la ĵazforumo de la Budapeŝta Printempa Festivalo kaj Hungara Radio
25-a de marto, 19.00 horo Teatro „Erkel"

Dollar Brand (ĉe la fortepiano) kaj la trio Paul McCandless
29-a de marto, 19.00 horo Kamermuzika Salono de „Vigadó" en Pest
Hungara-jugoslava ĵaz-metiejo kaj Teatrum Rock Bigband

Opero
Beethoven: Fidelio
27-a (premiero), 29-a, 31-a de marto Hungara Ŝtata Operdomo

Baleto
INTERBALETO '85 – INTERNACIA BALETA TRIENALO

22-a de marto, 19.00 horo Hungara Ŝtata Operdomo
(Festa malfermo)

Baletensemblo de la Hungara Ŝtata Operdomo

23-a de marto, 19.00 horo Teatro „Vígszínház"
G.R.C.O.P. – Koreografia Esplorgrupo de la Pariza Opero

24-a de marto, 19.00 horo Teatro „Vígszínház"
Baletensemblo de Pécs

25-a de marto, 19.00 horo Teatro „Vígszínház"
Moderna Baleta Teatro de Leningrad

26-a de marto, 19.00 horo Teatro „Vígszínház"
Aterballetto (Italio)

27-a de marto, 19.00 horo Teatro „Vígszínház"
Baletensemblo de Komische Oper (GDR)

28-a de marto, 19.00 horo Teatro „Vígszínház"
Solistoj de la Kuba Nacia Baleto

28-a de marto, 20.00 horo Sporthalo Budapest
Baletensemblo de Győr

Opereto
Ribnikov–Voznesenskij: La espero (Juno kaj Avos)
29-a (premiero), 30-a de marto, 19.00 horo Ĉefurba Operetdomo

Teatro
III-a Internacia Renkontiĝo de Esperantaj Teatroj en la Teatro „Miklós Radnóti"

22-a de marto, 19.00 horo
Parada revuprogramo

23-a de marto, 15.00 horo
Sándor Petőfi: Johano la Brava

Tradicio kaj moderneco en Buda

23-a de marto, 19.00 horo
László Tabi: La Damo de l' Fatalo

24-a de marto, 15.00 horo
Jordan Jovkov: La milionulo

24-a de marto, 19.00 horo
János Elem: Betonterapio
Franz Kafka: Letero al la Akademio

25-a de marto, 19.00 horo
László Tabi: La Damo de l' Fatalo

26-a de marto, 19.00 horo
János Elem: Betonterapio
Franz Kafka: Letero al la Akademio

Folkloro
Programo de la Hungara Ŝtata Popolensemblo

27-a de marto, 19.00 horo (premiero) Teatro „Erkel"

IV-a Tradiciogarda Foiro de Popolartaĵoj kaj Renkontiĝo de Dancdomoj
21-a de marto, 10.00–22.30 horoj Sporthalo Budapest

Programoj por la junularo
Koncerto de la ensemblo Jethre Tull (Britio)
22-a, 23-a de marto, 20.00 horo Sporthalo Budapest

Internacia akrobateska „rock and roll" danckonkurso
24-a de marto, 14.00 kaj 19.00 horo (revuo)

Koncerto de la ensemblo Neoton Familia
29-a de marto, 19.00 horo Teatro „Erkel"

Ekspozicioj
Hungara Nacia Galerio – „Serve al la arto" – 40 jaroj de la departementaj belartaj kolektaĵoj
Galerio de „Vigadó" – „Popolarto en la fotado"
Teatro „Erkel" – baletaj kaj teatraj grafikaĵoj de Zsuzsi Roboz (Britio)
„Vigadó" de Pest – Ekspozicio de la Fonduso Cziffra
Budapeŝta Internacia Foircentro – „Vojaĝo '85" Internacia Turisma Ekspozicio

Sporto
Festival-kuro '85
23-a de marto, 11.00 horo Budapeŝta Internacia Foircentro

II-a Budapeŝta Internacia Renkontiĝo de Veteranaj Aŭtoj
22–24-a de marto

I-a Internacia Ŝak-konkurso de la Budapeŝta Printempa Festivalo
22–30-a de marto, 13.30–22.00 horoj, la 30-an 9.00–18.00 horoj, Sporthalo Budapest, trejnsalono

Por *akiri bileton* turnu Vin al la plej proksima filio de la hungaraj turismaj entreprenoj, respektive al la lokaj vojaĝoficejoj, kiuj organizas vojaĝojn al Hungario.

El la programo de la Teatra Festivalo



László Tabi *(1910–) estas aŭtoro de ĉirkaŭ dudek volumoj da humoraĵoj, kaj tre multaj liaj krokizoj kaj humoraj historietoj aperis ankaŭ sur la paĝoj de la centra hungara ŝercgazeto „Ludas Matyi", kiun li ĉefredaktis dum 31 jaroj. Li verkis ankaŭ dudek unu komediojn, el kiuj unu,* La Damo de l' Fatalo *estos prezentita enkadre de la Esperanta Teatra Festivalo en Budapeŝto fine de marto. Pri sia kurioza sinteno al la teatro li parolis jene: „Neniam la teatro mem altiris min. Neniam mi amikiĝis kun aktoroj, eĉ kiel junulo mi ne amis aktorinon, malofte mi vizitas teatron. Ĉiujn miajn komediojn mi verkis por la propra plezuro, kvankam feliĉe ankaŭ aliaj homoj trovis plezuron en ili, ĉar iuj miaj komedioj estis eĉ milfoje prezentitaj..." Malgraŭ tiu pseŭdo-amatoreco la komedioj de Tabi estas brile konstruitaj, kaj ili kapablas ĝis la fino teni la atenton de la publiko kaj elvoki el ĝi ridon...* La Damo de l' Fatalo *aperos ankaŭ libroforme pli-malpli samtempe kun tiu ĉi revunumero. Ĉi-sube ni publikigas mallongan fragmenton el la komedio.*

La 65-jara patro de Maria volas edzinigi virinon, kiu onidire mortigis sian unuan edzon. Maria petas sian amikon Tibor esplori la aferon, kiu volonte faras tion. Jen, la rezultoj de liaj esploroj.

TIBOR: Do, nur la esencon, en ordo... Jen: burĝa bonstato, severa religia edukado, monaĥina kolegio, du jaroj en porinstruista seminario, interrompita, lernejo por stenografio kaj tajpado, post unu jaro interrompita. En la aĝo de dudek sep jaroj ŝi edziniĝis unuafoje, al sukerfabrika oficisto nomita Tivadar Bordási, pere de svatagentejo, en Budapeŝto. Tiam ŝi estis jam orfino, ĉar la gepatroj...

MARIA (*Senpacience interrompas lin*): Mortis. Ĉu tio gravas?

TIBOR: Mi ne kredas. Mi diras nur ĉar mi eksciis tion...

MARIA: Mi tre petas vin, daŭrigu ekde la nupta nokto. Ĉu bone?

TIBOR: Komprenite. Do, geedziĝa ceremonio en granda katolika preĝejo, poste solena tagmanĝo en la plej luksa restoracio de Budapeŝto, kun dudek ĉeestantoj.

MARIA: La menuon ne rakontu. Mi volas la nuptan nokton.

TIBOR: Komprenite. Sed tio ne okazis.

MARIA: Kiel mi komprenu tion?

TIBOR: Tiel, kiel mi diris. Ĝi ne okazis. La bedaŭrinda afero plenumiĝis ĉirkaŭ la tria posttagmeze, nelonge post la solena tagmanĝo. Tivadar Bordási – kiu laŭ la samsenca aserto de la pridemanditaj atestantoj trinkis sufiĉe multe – veturigis sian novan edzinon al la strato Floro numero ok por montri al ŝi sian loĝejon, kie ili vivos feliĉe post la reveno el la nuptovojaĝo. La prezenton de la loĝejo li komencis en la kuirejo. Kaj tie ili restis.

MARIA: Kial?

TIBOR: Divenu.

MARIA: Ne faru al mi enigmojn. Parolu.

TIBOR (*Elserĉas folion el la paperamaso, kaj metas ĝin antaŭ Marian*): Mi petas vin, legu ŝian konfeson, kiun ŝi faris pri la okazintaĵo antaŭ la tribunalo...

En la momento, kiam Maria prenas la folion, la scenejo mallumiĝas, nur la fonan muron trafas reflektoro, kaj ĉe granda fenestro, kvazaŭ sur filmekrano, aperas Anna. Ŝia nigra hararo estas node frizita. Ŝi staras antaŭ nevidebla juĝisto.

ANNA: La solena tagmanĝo sukcesis tre bone, mia edzo eĉ dungis ciganan orkestron, kiu konstante ludis mian ŝatatan kanton, li proponadis al mi manĝi el la marcipana deserto, kaj ĉiuj kredis, inkluzive min, ke nia geedziĝo baziĝas sur amo. (*Paŭzeto.*) Ne, estimata sinjoro juĝisto. Ke praktike kio estas amo, pri tio mi sciis nur, ke ĝi estas tre bela kaj majesta sento, tia, kia la poetoj prikantas ĝin, kaj ankaŭ en romanoj oni povas legi pri tio. Antaŭ la restoracio staris kaleŝo, mia edzo sidigis min en ĝin, en tiu kaleŝo ni veturis ĝis lia loĝejo, mia blanka vualo ŝvebis post ni, mi povis esti tre bela, ĉar ĉie, kie ni trapasis, la homoj turnis sin por rigardi nin. Bonvolu imagi, estimata sinjoro juĝisto, kiom mi surpriziĝis, kiam enpaŝinte en la loĝejon mia edzo tuj ŝanĝiĝis, kaj li, kiu ĝis tiam ĉiam estis ĝentila kaj delikata, tuj proponis, ke ni iru en la liton kaj kunkuŝu, kontraŭ kiu propono mi forte protestis, kaj esprimis mian deziron resti ankoraŭ dum ioma tempo en mia fianĉina robo, kiun ja neniam plu mi survestos, kaj cetere, je la sesa horo kaj dudek minutoj ekiros nia vagonaro al la feriejo. Nu, bone, li diris, tiam do mi montros al vi nian familian neston, kie feliĉe ni vivos. Pri tio mi konsentis, sed mi petis lin montri ne la dormoĉambron, sed la kuirejon, ĉar mi lernis de mia forpasinta kara patrino, ke kuirejo estas kiel templo por virino, kaj mi tre scivolis, kia ĝi estas. Li plektis sian brakon kun la mia, kaj vere kondukis min en la kuirejon, kaj kun ĝojo mi vidis, ke la kuirejo estas vasta kaj hela, kaj ankaŭ bone instalita, ĉar lia unua edzino, kiu fuĝis de li, nenion kunportis. Sed mi nur apenaŭ ĉirkaŭrigardis, li jam volis treni min plu, kaj kiam mi kontraŭstaris, li ĵetis sin sur min, komencis deŝiri la vestojn de sur mi, vane mi petegis, ke li montru ankaŭ la nutraĵkameron, li komencis palpadi mian korpon, kontraŭ kio kompreneble mi protestis, kaj mi provis komprenigi al li, ke klera sinjoro, kiu eĉ estas rezerva ĉefleŭtenanto, ne rajtas tiel konduti, sed kvazaŭ li ne aŭdus tion, unue li premadis mian gorĝon, poste levis kaj ĵetis min sur la kuirejan tablon, li premiĝis sur min kun sia tuta pezo, „se en la kuirejo, do estu en la kuirejo", tion li kriis, kaj mi devis konstati, ke mia honoro pereos, se mi ne faros ion, do, kuŝante tie, per mia dekstra mano mi eltiris la tirkeston de la tablo, esperante ke mi trovos tie iun lignan kirlilon aŭ viandbatilon, sed venis en mian manon granda tranĉilo, kaj... kaj... Do tiel la afero okazis, estimata sinjoro juĝisto...

Ferenc Glatz

MILITOJ KAJ HISTORIOGRAFIO

Nuntempe jam ĉiu psikiatro nomus nenormala pacienton naskiĝintan en evoluinta kaj civilizita lando, kiu dirus sin kapabla trapiki per bajoneto fiksita al fusilo la bruston de neniam vidita simplanima kamparano aŭ miopa oficisto, nur pro la fakto, ke tiuj portas la uniformon de armeo, kiun oni deklaris malamika. Eĉ malpli li kapablus post la piko piedpuŝi la baraktantan korpon por liberigi la bajoneton el inter la ostoj, purigi de la sango la ŝtalan klingon, kaj remeti ĝin en la ingon. Kamparanaj buboj, edukiĝintaj en Eŭropaj vilaĝoj, jam malkapablas eĉ tranĉi la gorĝon de kokido aŭ porko, tamen ili devas akcepti, ke en la nomo de abstraktaj celoj – kiujn celojn principe ili ja konsentas – morgaŭ oni povos devigi ilin mortigi homojn en tiu aŭ alia parto de la mondo.

La plimulto de la intelektularo de nia epoko plenkreskis jam post la fino de la milito. La meza reprezentanto de tiu ĉi intelektularo kredis, ke – dank' al la rapida evoluo de la civilizacio, al la rapidega altiĝo de la kultura kaj higiena nivelo, kaj pro la fakto, ke la homoj havas ĉiam pli da tempo okupiĝi pri si, pri la homa vivo, pri la plezuroj de la vivo – la intenco de la perforta ekstermo de homaj vivoj malaperis el la politiko por ĉiam. La nunaj tagoj komprenigas al li, ke li nur kredis tion, sed li ne ĝuste interpretis al si la intertempe okazintajn eventojn. En filmĵurnaloj li vidis, ke en Koreio, Vjetnamio kaj poste en Afriko – li eĉ ne havis precizajn konojn pri tiuj regionoj, ja lastfoje li ĵetis rigardon al la mapo dum la lernejaj lecionoj de geografio – je pluraj miloj da kilometroj pereas dekmiloj da homoj; en bildmagazinoj li povis legi artikolojn ilustritajn per terurigaj bildoj pri la efiko de la novaj armiloj, kiuj endanĝerigas jam la ekziston de la homaro, sed ĉio ĉi okazis malproksime de li, malproksime de lia paca konsumsocio. Tiuj ĉi bildoj iel kunfandiĝis kun la miksaj ĝenroj de la amuzindustria informado, kaj ankaŭ kun la propagandaj sloganoj ĝistede pripentrantaj la kruelaĵojn faratajn de la kontraŭulo.

Kaj nun, kiam la palpebla ebleco de la milito atingas lian fieran «blankulan» mondon, kiam li vidas en sia kutima bildgazeto skizon pri tio, kiel atomraketo nur kelkajn minutojn post la elpafo neniigas lian propran urbokvartalon, kaj kiam stratangule en kioskoj estas disdonataj materialoj pri tio, kial necesas lokigi kontraŭraketojn nur je kelkaj kilometroj de la urbo, kie li loĝas – nu, ĉio ĉi trudas al li repensi la homan historion.

El la historio eble li povas lerni la jenon: la arto de la murdado fariĝis ĉiam pli institucia kaj ĉiam malpli terura. La pikarmiloj ebligis eviti al la prahomo disbati per ŝtonpeco la kapon de homo, kiu havis alikolorajn harojn aŭ adoris alian dion, kaj per la pafarmiloj fariĝis ec pli «humana» la buĉado de homfratoj, kiuj parolis alian lingvon aŭ servis alian sinjoron. Kaj kvankam sur fotoj, faritaj pri liaj gepatroj, geavoj – krom se tiujn oni pelis en pereon sur flanko, kiu nuntempe estas hontinda – li povas vidi ankoraŭ la infanterian armilaron, el rakontoj li konas ankoraŭ la komandvortojn «bajoneton pikpreten» kaj «kuratako», nuntempe li jam trankviligas sin per tio, ke nova milito alportos sendoloran morton.

Teoriuloj apenaŭ povas tiri konkludojn el la historio de la mondmilitoj. En ĉiu monografio oni trovas la bone konatajn kaj esence verajn pasintjarcentajn tezojn: milito estas daŭrigo de politiko per aliaj rimedoj; imperiisman militon oni devas transformi je revolucia milito; popolo, kiu defendas sian patrujon, estas nevenkebla, kaj tiel plu... Ludemaj specialistoj, modelantaj tankbatalojn sur tabloj, donas precizajn indikojn pri la ataka forto de municioj kaj ŝirmkapablo de kirasoj, pridiskutas la virtojn kaj malvirtojn de stabaj batalplanoj kaj realigitaj manovroj. Aŭtoroj de resumaj verkoj konvinke demonstras: en maljusta milito venko ne eblas (eble

ne lastvice pro tio, ĉar la historion de militoj verkas neniam la malvenkintoj). La samaj aŭtoroj atentigas la legantojn: en nia jarcento praktike ĉiu signifa teknika atingaĵo elkreskis el pormilitaj investadoj. Fakte ili povus daŭrigi la analizojn: imperiojn, grandegajn politikajn-produktajn unuojn en nia moderna historio povas kunteni nur armeoj.

Sed ĉu la simpla leganto ne estas ankaŭ ĉifoje pli saĝa ol la nomitaj aŭtoroj? Ja li konscias ke radaro, kaj preskaŭ la tuto de la aernavigado estas «frukto» de la mondmilito; li konscias, ke la lensaro de la amase produktataj superaŭtomataj fotoaparatoj estis siatempe inventita kiel parto de la spionsistemoj de artefaritaj satelitoj; li rekonas ankaŭ tion, ke la racia, moderna sociorganiza sistemo ĉerpis ne malmulte el la spertoj de la militista administrado. Sed ferminte sian libron, kiu priskribas la miraklojn de la tekniko, li levas la rigardon al la alto, kie flugas supersonaj ĉasaviadiloj, kaj li komencas fari kalkulojn tre simplajn: kiom da fojoj piloto de ĉasaviadilo devas ekflugi cele de ekzerciĝo? Kiom da keroseno konsumas unu tia teknika miraklaĵo? Dum kiom da jaroj la brulaĵo uzita nur ĉe unu ekzerca flugo sufiĉus por lia aŭtomobilo ? Kiom sumas la transportkostoj por la konstanta priservado de foraj, eble alikontinentaj, militbazoj ? Kiom da oficistoj, ekspertoj laboras en tiu ĉi giganta aparato; kiel ĝi konstante ŝvelas ene de la moderna ŝtata administrado, konkerante ĉiam pli gravajn bastionojn de la potenco, fariĝante iom post iom memstara socipolitika forto? Kaj nia leganto jam ne plu kalkulas la kostojn: ja ili estas ne plu kalkuleblaj; li ne kalkulas la nombron de la pagata personaro: ja tio estas ŝtata sekreto; li ne kalkulas la prezon de la militista substrukturo: ja ĝi ne plu estas supervidebla. Li entute ne plu kalkulas, ja eĉ sen specialaj militistaj kaj politikaj fakaj konoj bone li scias, ke je la fino de nia jarcento la interkontinentaj armiloj alportis la eblon de interkontinenta milito, la nukleaj armiloj alportis la eblon de totala milito. Kaj ĉio tio, kion li povas legi pri militistaj teorioj, ĉirkaŭbrakaj armeaj manovroj, pri entuziasmiga patrujdefendado – ĉio tio montriĝas por li konoj senutilaj, malaktualaj. Li formetas sian krajonon, kaj grumblante demandas sian najbaron, kiu hazarde estas historiisto: kial en la historiaj libroj oni priskribas ne tion, kiel ni venis ĝis ĉi tie?

Tradukis: V. *Benczik*

András Tokai
(1946 –)

Petego de Davido por senscio kaj paco

Donu, granda Dio, ke mi ne sciu
kion ni deziris kaj al kiu,
kiam en knaba aĝo ni pisis kruce.
Mi forgesu, kiaj estas hokaj krucosignoj,
sagoj, mortokapoj, kion signifas
pintohavaj blankaj kapucôj kaj brunaj kapotoj okulkaŝaj!
Mi sciu nenion pri la fintoj de korp-ĉe-korpa batalo,
la punkton sub la kvina ripo, la nukon mi ne trovu.
Mi ne sciu, Sinjoro, kio farendas ĉe nuklea bato.
Mi forgesu, kiom da tagoj
toleras homo soifon, kaj se li havas akvon
kiom longe li eltenas sen manĝaĵoj.
Nenion mi sciu pri la dolĉa frosto-morto,
pri l' sekvoj de ventopafo kaj aerfrapo.
Mi ne konu la kielon de grimpado, sinkaŝado,
postfronta batalo, la uzon de
benzinbotelo kaj dinamito.
Mi ne konjektu pri l' manovroj de spionoj kaj kontraŭspionoj.
Mi nenion sciu pri l' manipulado de l'
raketoj celantaj raketojn.
Eĉ aĉan fetilon mi ne kapablu,
ŝargi per ŝtoneto, granda Dio!
Ĝis tiuj vortoj Davido diris sian preĝon,
kiam venis Goljato.

Tradukis: Vilmos Benczik

Albert Goodheir
(1912 –)

Kontraŭ bombkultistoj

Eĉ se mi kredus estontecon paradizan,
kaj se enirbileto
al tia ĉielo
kostus eĉ unu bebon disŝiritan,
mi ĝin redonus (diru vi, pro timo)
kaj restus kun la forfetitaj en la ŝlimo.

Armilfaranto

Mi faras ilojn por mortigi homojn,
sed morton kaŭzas eĉ aŭtomobiloj.
Ĉu kamparane fosu mi terpomojn?
Oni pli bone pagas por pafiloj.

Poeto kaj lingvomajstro Dezső Kosztolányi (1885–1936)

Antaŭ cent jaroj, la 29-an de marto naskiĝis Dezső *Kosztolányi* poeto, verkisto, tradukisto kaj ĵurnalisto – unu el la plej elstaraj majstroj de la hungara lingvo kaj literaturo de la 20-a jarcento.

Fininte gimnazion en sia naskiĝurbo Szabadka (nun: Subotica en Jugoslavio) li ekstudis filologion en Budapeŝta universitato. Lia inklino al la literaturo jam frue evidentiĝas, li publikigas poemojn jam kiel gimnaziano. La decidan inspiron tamen li ricevas en la universitato, kie li konatiĝas kun Mihány *Babits,* Gyula *Juhász* kaj kun aliaj tiamaj studentoj, kiuj poste – kun li – fariĝis kunlaborantoj de la epokfara revuo „Nyugat" (Okcidento).

Ravita de la beletro kaj okupata jam en gazetaro kiel ĵurnalisto kaj kritikisto, li tamen ne finas la universitatajn studojn. Kiel beletristo li estis adepto de *l' art pour l' art* kaj de la ideo de *„homo aestheticus"*, tamen li ne restis indiferenta koncerne sociajn problemojn. Logis lin la ideoj de la radikala burĝaro, ŝokis la sangoferoj kaj detruoj de la mondmilito, li salutis ankaŭ la revolucion en la jaro 1918. Poste li seniluziiĝis, sed ĝismorte gardis kaj pludonis la fundamentajn elementojn de la moralo de la progresema burĝaro.

Li alproprigis la anglan, francan, germanan, hispanan kaj italan lingvojn, mult

Li alproprigis la anglan, francan, germanan, hispanan kaj italan lingvojn, multe li tradukis el ties poezioj, same poetojn de Oriento: ĉinajn kaj japanajn aŭtorojn. Multe li okupiĝis pri lingvaj problemoj, precipe pri la defendo kaj purigo de la gepatra lingvo kontraŭ fremdaj influoj. En pluraj artikoloj li apogis la ideon de internacia lingvo, konkrete Esperanton. Li havis kontakton ankaŭ kun Kalocsay, kies laboron li alte taksis.

Komence de la tridekaj jaroj atakis lin kancero, kiu fine forrabis lin en la jaro 1936.

Restis post li deko da poemaroj, propraj kaj tradukitaj, vico da romanoj kaj novelaroj. Pluraj el liaj romanoj estis tradukitaj al fremdaj lingvoj, kelkaj estis ankaŭ filmigitaj. En Esperanta traduko legeblas liaj verkoj en ambaŭ eldonoj de Hungara Antologio.

M.F.

Dezső Kosztolányi

La nova kulturlingvo

Hieraŭ malfermiĝis la dua kongreso de la lingvo Esperanto en Ĝenevo. La malfacila laboro por disvastigi la lingvon daŭras silente, kaj nek en tio, nek en ĝia glorado ni renkontas tian ekstravagancan foiran bruon, kiu akompanis aliajn – dediĉitajn por esti mondlingvo – artefaritajn vortmiksaĵojn. Kaj tio jam estas bona signo. Laŭ ĝia serioza kaj kvieta disvastiĝo ni devas konkludi, ke dum mallonga tempo ĝi triumfe rondiros la kulturitan mondon kaj – kiu scias? – iam eble ĝi fariĝos kulturlingvo por ni ĉiuj. Ĝis nun ĉiuokaze ĝi radikiĝis, kaj oni devas kalkuli pri ĝi.

Eksterlanda gazeto sciigas pri tiuj konkeroj kaj atingaĵoj, kiuj la lingvon Esperanto lastatempe akompanis tutmonde. Germanoj, belgoj, francoj, rusoj kaj svedoj – la grandaj nacioj – kun egale granda interesiĝo lernas la novan lingvon. Ili trovas ĝin facila, saĝa kaj fleksebla. La verko, koncipiĝinta en homa cerbo, iom post iom pleniĝas per entuziasmo, la vortoj ekspiras, la frazoj ekanhelas. Ripetiĝas la miraklo de la antikvaj epokoj. La senviva ŝtono fariĝas vivanta karno. La neorganika verko, konstruita laŭ matematika kalkulo – fariĝas vivanta organo, nerimarkeble ekmoviĝas ĝia koro kaj la vivigan varmetan sangon ĝi fluigas disen en la rigidajn membrojn.

La lingvistika homunkulo realiĝas. Se la lingvo Esperanto fariĝos fakte kulturlingvo kaj disvastiĝos, tio estos por la lingvistiko certe tia sensacio kaj atingaĵo, kiel inventaĵo de Burke por la moderna naturscienco.

Ni legis la paroladojn de la unua kongreso, kaj ni tute ne trovis troigo

la entuziasmon de la esperantistoj. La granda kaj nobla doktoro Zamenhof revadas pri tre nobla kaj granda afero. Li volas krei lingvon por la Homo. Tiu ideo, tiu ardanta volo fakte karakterizas heroon de la 20-a jarcento.

Li ĉesigas la Babelan ĥaoson, kiel genia operaciisto tranĉas papagan langon de mutuloj kaj mallertuloj, repacigas la inter si knabe kverelantajn naciojn, ĉar li komprenas ilin. *Tout comprendre c' est tout pardonner*.*

Ĉu ne estas same komike kaj tragike, ke homo ne scipovas alparoli homon, pure kiel homo? Tiun demandon lanĉis Zamenhof, kaj tiun demandon li respondis per sia klara kaj grandioza gramatiko.

Nur tiu povas kompreni la malbenon de senparoleco, kiu jam vidis en grandaj fervojaj stacidomoj pasaĝerojn, kiuj permane-perpiede gestis, blekis, kiel prahomoj. La superecon de homo pro parolkapablo kompare al la bestaro ĝis nun ni povis sperti nur inter la limigitaj kadroj de unu nacio. Nur nacio havis lingvon, homo malhavis ĝin.

Nun ekformiĝas ankaŭ tio. Ties apostoloj kaj fanatikuloj, la verdstelaj esperantistoj ekzaltiĝinte kaj entuziasmige rondiras la mondon. Ili kun ĝojo sciigas, ke jam ankaŭ en Francio ĝi ege sukcesas, kaj la francoj, kiuj ja parolas mondlingvon, kaj kiuj plej malmulte da kaŭzo havas por tio, nun konsideras enkonduki ĝin en la lernejojn kiel devigan studobjekton, kaj eĉ je la kosto de la ŝtato, por ke ĉiu klera homo egale parolu la lingvon de la futuro.

Fajro, inspiro, entreprenemo hejtas ilin, kaj tio nepre portos triumfon por ilia afero. Se la lingvistika majstroverko de Zamenhof venkos la malsanojn de la infanaĝo kaj ĉesos esti en la vico de efemeraj sensacioj, dum mallonga tempo ĝi atingos grandan konkeron sur la tuta terglobo. La definitiva disvastigo de la unueca mondlingvo fariĝos simpla administracia afero.

Al la noblaj kaj inspiritaj avanuloj de la lingvo de estonta kulturo, al la partoprenantoj de la *Kongreso Universala de Esperanto*** ni sendas nian saluton, dezirante multe da sukceso.

Super ili ŝvebas ilia verda stelo. La stelo de espero.

(1906) Tradukis: M. *Fejes*

---

* Ĉion kompreni estas ĉion pardoni.

** Esperantlingve en la hungara originalo.

Dezső Kosztolányi

Primorta prediko

Homfratoj, vidu, okaze li mortis
kaj tie lasis nin en la solo. Trompis.
Ni konis lin nek elstara nek granda,
nur kor' al nia proksime staranta.
Sed jam fino.
Or' li estis.
Por ni restis
nur ruino.

Vi ĉiuj lernu laŭ tiu okazo.
La homo estas tia. Unikafo.
Ne vivis pluraj, nek ja nune vivas,
kiel arbfolioj du samaj ne drivas,
kaj longe ne trovos ni al li egalajn.
Ĉi kapon vidu, ĉi okulojn karajn,
fus fermiĝintajn. Kaj la manon jenan,
falantan for en nebulon plenan,
rigidiĝinta
relikvo sankta,
sur ĝi gravure 'stas hieroglifo,
sekreto praa de la sola vivo.

Iu ajn li estis, lumo, varmo estis.
Li estis vere, ja ĉiu atestis.
Kiel li certajn manĝafojn preferis,
kaj lia voĉ', kiun morto nun sigelis,
al oreloj sonis – jen sonoro tinta –
de temploj ĝis fundo suben mergiĝinta,
kiel li petis antaŭ temp' nelonga:
„fileto kara, mi manĝus iom da
fromaĝo", aŭ ĉe vingustumo
li feliĉa gapis al cigaredfumo,
kiel li kuris pro telefonemo,
kolorajn sonĝojn plektis je fadeno,
surfrunte ekbrilis stigmato, signa:
ke inter milion' li estas la digna.

Lin serĉi tie – afer' senespera,
ankaŭ Azie, ĉe Kab' Bonespera,
kaj en pasint' kaj en futur' favora,
naskiĝi povas nur jam li ne, sola.
Plu neniam
ni vidos palan rideton lian.
Fortuna feo estas ja malforta
por la rekreo de miraklo morta.

Amikoj karaj, tio estas jen, do
same, kiel estis pri l' hom' en legendo.
Okaze la vivo lin pense elektis,
kaj ni ekrakontis pri li: „Iam estis..."
Sed li sub falinta firmamento restis,
kaj ni nun rakontas plore, ke: „ne estis..."
Nun kuŝas li por bon' aspirinta forte,
kiel statuo sia, froste, morte.
Lin larmo, vorto, drogo ne povos veki jam.
Estis, ne estis en la mondo iam.

Tradukis: Márton Fejes

Géza Hegedűs

Kiam mi estis hungar-greka interpretisto

Al la supra titolo apartenas tiom da anticipaj sciindaĵoj, ke mi parolas greke, pli precize novgreke eĉ ne unusolan vorton, la antikvan grekan mi scias nur tiom, kiom en la malnova humanisma gimnazio algluiĝis al ĉiu. Tio estas, mi elparkeris kelkdek du-trimiljarajn versojn, iom mi komprenas kelkajn partojn de Homeraj eposoj, sed eĉ glason da akvo ne povus peti, se per ia miraklo mi aperus en unu el la urbo-ŝtatoj de la antikva Helenio. Nu, havante tiom da lingvaj konoj, mi estis hungar-greka interpretisto en februaro de 1943, en la meza mezo de neĝkamparo inter la riveroj Dono kaj Dnepro, en la frosto 47-Celsiusgrada. Sed tiam, post la frakaso de la Hungara Armeo N-ro 2 ĉe Voroneĵ, dum la retiriĝada embaraso, ne nur la vivo estis tro malkara, sed oni povis travivi tiom da strangaj aventuroj, ke ĉiu el ni, kiu travivis ilin, jam mem apenaŭ kredas, ke ĉio, kio okazis, povis okazi al li.

Mi tiam apartenis al teknika taĉmento, kaj ekde la mezo de januaro mi senhalte retiriĝis. Tio signifis, ke mi ĉu senkape klopodis kuri kun la aliaj, aŭ mi observis tion, kiel eblus nerimarkite forresti kaj kaptiĝi, ja konsiderante la la cirkonstancojn, la militkaptiteco ŝajnis alloga kaj, precipe, pli sekure por la vivo. Foje mi devojiĝis de mia taŭzita roto, kaj mi sola vagadis tra la neĝkamparo, tranoktante en la vilaĝoj, renkontitaj dumvoje, alifoje neatendite mi renkontis la propran roton, tiun teknikan taĉmenton, jam menciitan. Do en tiuj februaraj tagoj, kiam mi enmiksiĝis en la hungar-grekan interpretadon, mi ĝuste estis kune kun la roto, pli precize kun ĝia restinta parto, kaj ni kune marŝadis en la meza mezo de Ukrainio el Sumi ĝis Romni. Tiujn ĉi urbetojn konas laŭ mi ĉiu, kiu post Voroneĵ retiriĝis de la direkto de Dono.

Dumvoje la roto estis ie haltigita kun la preteksto, ke oni serĉas ĝuste teknikan taĉmenton por kelkaj tagoj en la vilaĝo nomata Ŝpilovka, kie ni poste pasigis ok tagojn.

Inter la terurajoj de la militaj jaroj, ŝajnantaj senfinaj, tiuj ok tagoj en Ŝpilovka restis en mia memoro, kiel nekredeble idilia intermezo. Mi eĉ ne povas imagi, kiel eblas, ke al nur ok tagoj aliĝas tiom da memorajoj, kiel restis tempo por ekkoni tiom da homoj dum ok tagoj, kiam ni laboris sur la landvojo, kiun ni devis „ripari". Aliflanke, estas vere, ke mi havis du liberajn tagojn pro mia sukcesa laboro interpretista.

Tio okazis tiel, ke mi ĝuste aranĝis ion perpioĉe sur la vojrando. Tiu ĉi laboro ne estis malfacila, sed ankaŭ ne agrabla. Homo, naskita en Meza Eŭropo, ne kapablas alkutimiĝi al 47-grada frosto. Kontraŭ tiu oni ne povas ŝirmiĝi per ajna sinvolvado. Eĉ se la senhalta korpomovado estis bona rimedo kontraŭ la frostomorto, ĝi ne helpis kontraŭ la malvarmado, efikanta ĝisoste kaj ĝiscerbe. Tiutempe mi eĉ ne rimarkis la froston je 25 gradoj, sed sub minus 40 Celsiusgradoj mi jam neniel povis amikiĝi kun la klimato, nomata science „kontinenta".

Subite aperis serĝento, ne el nia roto, sed konata, ĉar ankaŭ lia trupo laboris proksime. Li ĉirkaŭrigardis kaj kriante demandis nin:

– Ĉu scias iu greke? !

Kelkaj kamaradoj rigardis al mi, videble, ili pretendis, ke mi sciu greke. Sciinde, ke la rotanoj konsideris min iom strangulo, ĉar en mia pansako mi gardis ankaŭ librojn, eĉ havis du poemarojn latin- kaj franclingvan. Mi pensas, ke ili pro tiuj opiniis, ke mi konas la grekan.

Mi do anoncis min:

– Serĝenta Moŝto, mi humile raportas, ke mi scias greke.

– Demetu la pioĉon, kaj venu.

Mi ne demandis, li ne plu klarigis. Post la vojkurbo staris dometo, ĝia tubo loge fumis. La serĝento malfermis la pordon kaj eniris, mi sekvis lin.

Kiam mi estis ferminta malantaŭ mi la pordon, mi jam pripentis, ke mi antaŭe anoncis min. Mia gorĝo mallarĝiĝis, mia korbatado preskaŭ haltis. En malgranda ĉambro ĉe bakforno, radianta varmon, staris du kapitanoj de la armea ĝendarmaro kaj en la angulo tri armeaj ĝendarmoj kun fusilo. Kaj en la mezo de la ĉambro surseĝe sidis soveta oficiro. Mi ne scias, kiun rangon li havis, ankoraŭ mi ne konis la sovetajn rangosignojn, mi memoras nur pri la orflavaj epoletoj. Li sidis sen mantelo kaj sen kepo. Kiam mi

alpaŝis, li turnis sin al mi kaj ankaŭ la ĝendarm-oficiroj turniĝis al mi.

Kiu ne travivis tiujn jarojn en tiuj terenoj, ne povas eĉ imagi la teruron, kiun en la homoj vekis jam la nomo de armeaj ĝendarmoj. Plej volonte mi tuj estus turninta min por kuregi kien nur eblas. Sed jam ne eblis, ja mi mem anonciĝis, ke mi scias greke. Sed kiun diablon ili volas ĉi tie pri la greka lingvo?

Kiom mi povintus fari? Mi firme stariĝis antaŭ unu el la kapitanoj, kaj laŭ la reglamento „humile raportis", ke mi venis en la ĉambron.

– Ĉu vi scias greke? – li demandis.

Kaj en mia kapo eklumis penso: ĉi tie neniu parolas greke, do se mi diros, ke jes, mi povos havi malpli da malagrablaĵoj ol se mi diros, ke ne. Ja tiam povos evidentiĝi, ke mi volis nur „eskapi" de antaŭ la frostiga laboro subĉiela.

– Mi humile raportas, jes – mi diris angorkore, sed eĉ ne ektreme.

– Nu, aŭskultu – diris la ĝendarmkapitano. – Tiu ĉi homo estis kaptita je la mateniĝo. Sed nenion eblas eltiri el li. Se ni parolas al li ruse, li mienas tiom malkompreneme, kvazaŭ ni parolus ĉinlingve, sed ni provis paroli ankaŭ france kaj angle, sed tion li same ne komprenis. Sed dume li ĉiam ripetadas „grek" kaj „greko"... do eblas fakte, ke li estas greko kaj komprenas nur greke. Kvankam mi ne povas imagi, kiel tiam li povas esti rusa oficiro. Sed oni ekprovu. Demandu lin pri io greke.

En miaj vejnoj glaciiĝis la sango. Kaj mi eĉ ne povas jam imagi, kiel aperis en mi tiom da aŭdaco, ke mi turnu min al la homo sidanta sur la seĝo, kiu kun klinita kapo rigardis la teron. Mi turniĝis al li kaj demandis:

– *Andra moj enneppe Musa politropon hos mala polla?*

Tiu ĉi frazo estas la unua verso de Odiseado.

La efiko estis neatendita. La kaptito levis la kapon, ekgapis al mi, lia mieno sereniĝis, kaj per firma voĉo li respondis:

– *Planĥte epej Troje hieron polietron epersen...*

Tio estas la dua verso de Odiseado. La kaptito daŭrigis la citaĵon. Post tio ni dum iom da tempo seninterrompe interparolis, tio estas alterne citis versojn de la parkeritaĵo, enkapigita en la gimnazio. La armeaj ĝendarmoj povis vidi, ke ni sufiĉe bone komprenas unu la alian.

– Nu, fine – diris unu el la kapitanoj. – Ekde la mateno ni ne povis eltiri el li unu solan vorton. Demandu lin, al kiu taĉmento li apartenas.

El la distanco de pluraj jaroj ne kompreneblas por mi la aŭdaco, kun kiu mi enludiĝis. Mi turnis min al la kaptita oficiro kaj seriozmiene demandis lin:

– *O ksejn, angellejn Lakedajmoniojs hoti tede?* (Tio estas: Fremda vojirant', anoncu al Lakedemona popolo*).

Responde li iom ekpensis, kaj respondis, finante la epigramon de Simonides:

– *Kejmeta tojs kejnon remasi pejtomenoj.* (Jen ni kuŝas, obeintaj al la parolo de l' patruj'.)

– Kion li diris? – interesiĝis samtempe la du kapitanoj.

– Li diris, ke li servas en minkolekta taĉmento de sapeista bataliono.

Ili estis kontentaj pri miaj konoj grekaj, kaj unu post la alia metis la demandojn pere de mi al la kaptito. Mi, miaflanke, unu post la alia citis la grekajn memoraĵojn el la gimnazio. Kaj kiun citaĵon mi komencis, tiun la kaptito daŭrigis. Evidente, ankaŭ li lernis ie en gimnazio similа al la mia...

Kaj kiam la enketata soldato finis frazon, mi aŭdace elpensis ian respondon al la demando de la armeaj ĝendarmoj. Kvankam el tiuj respondoj evidentiĝis, ke la kaptito estas homo iom tro stulta. Ja kiam ili demandis lin per mi pri tio, ke laŭ lia opinio kiom da minĵetiloj funkcias en iu mi jam ne memoras kiu arbaro, mi tradukis la grekan respondon, ke estas tie eĉ cent mil.

Dume la „greko" iĝis pli kaj pli parolema, jam li iniciatis, kvazaŭ li ĵetus el si unu post la alia ne nur la Homerajn versojn, sed verkerojn de Herodoto, Ksenofono, Sapfoa, Alceo; mi apenaŭ povis per respondoj signi, ke mi konas ankaŭ tiun kaj tiun citaĵon. Mirakle, ni apenaŭ atentis la du oficirojn de la armea ĝendarmaro, ekscite ludis por kapti la alian, kaj komenci citaĵon, kiun tiu jam ne povos daŭrigi. Sed ŝajne, nia klereco pri la helena literaturo estis tute simila. Laŭ tio mi komprenis, ke ankaŭ la kaptito ne scias la grekan. Ankaŭ li konas nur citaĵojn, li same enkapigis nur parkerendaĵojn.

Sed la armeaj ĝendarmoj estis kontentaj pri la rezulto. Kaj kiel premion por mia hungar-greka interpretado, mi ricevis botelon da rumo kaj du tagojn da ripozo.

Elironte tra la pordo post la soldata salutgesto, ĝentile mi turnis min al la kaptito, kaj saluttone komencis anakreoneskon:

–*Legusi hàj ginajkes.* (Tio estas: ĉikanas min knabinoj.)

Responde li same kapsalutis, kaj ankaŭ tion daŭrigis:

–*Anakreon, geron ej.* (Anakreon', vi oldas.)

La serĝento, kiu gvidis al la domo, ankaŭ reakompanis min. Evidentiĝis, ke li dume komencis estimi min pro miaj greklingvaj konoj, kiuj pere de li famiĝis en la tuta Ŝpilovka. Min angorigis nur tio: kio okazos, se oni demandados plu la kaptiton, kaj iel tamen klariĝos, ke ni mistifikis la armeajn ĝendarmojn.

Sed feliĉe tio ne okazis. Kiel ni eksciis matene, la kaptito dumnokte eskapis.

– Kia feliĉo, ke li antaŭe estis enketita – diris la antaŭtaga serĝento, kiu alportis la informon pri la eskapo.

De mia koro falis ankaŭ tiu ĉi pezaĵo. Sed eĉ al miaj kamaradoj mi ne kuraĝis konfesi, ke mi ne scias greke. Do nun, post pluraj jaroj mi informas ĉiujn, kiuj estis tiam kun mi kaj sukcesis transvivi la inferajn jarojn. Mi malkaŝas, ke la rumon, kiun ni trinkis kune, ili devas danki ne al miaj greklingvaj scioj, sed al la rakontita historio, jam ankaŭ por mi apenaŭ kredebla.

El la hungara: Péter András *Rados*

* La versojn tradukis Kálmán Kalocsay

István Nemere

LA TREZORO

1.
LA STRANGA TESTAMENTO

Laŭra jam sur la sojlo atendis Petron. La beleta juna virino estis ekscitita. Nun eĉ la blond-bruna hararo iom neordigite kadris ŝian vizaĝon. En la okuloj videblis tristo.

Petro jam sur la koridoro elprenis sian ŝlosilon. La larĝŝultra bruna viro havis jam pli ol tridek jarojn, kaj kun la karakteriza rapideco de novbakitaj edzoj proksimiĝis al sia hejmo. Ili estis geedzoj jam de ... unu monato.

– Saluton, perlo de edzinoj! – li kriis jam sur la sojlo kaj albrakumis la virinon. Nur ŝia iom nedecidema kontraŭstaro kaj senmoveco sciigis al li, ke io okazis. La gajeco tuj fordegelis de sur lia vizaĝo.

– Kio okazis, karega?

La juna edzino unue fermis la pordon, poste turnis sin. Ŝi rigardis en la okulojn de la edzo. Petro ankoraŭ neniam vidis ŝin tiel serioza.

– Mia patro mortis.

– Via patro..? Ja vi lin tute ne konis.

– Tamen li mortis.

– Jes ja. Sed de kie vi scias?

– Sciigis min iu notario. Morgaŭ antaŭtagmeze li atendos min en sia oficejo.

– Notario? Ĉu tio signifas, ke vi heredis ion?

– Mi ne scias. La teksto de la sciigo estas sufiĉe malklara, vidu. La notario mencias, la „lastan volon de la mortinto" ... Petro, ĉio ĉi estas por mi tre stranga. Ŝajnas al mi, ke mi neniam vidis mian patron. Aŭ mi estis tro malgranda infano, ĉar mi ne memoras lin. Eĉ ĝis nun mi ne scias, kial li forlasis mian patrinon. Li verŝajne ne estis bonulo, ĉar mia patrino multe tristis pro la eksedziĝo. Ŝi bone min edukis, kaj tio gravas. Alia afero, ke lastatempe ankaŭ ŝin mi vidas jam malofte.

– Kial ŝi devus zorgi pri vi? Ja vi estas jam plenkreskulo, vi havas dudek kvar jarojn, karega mia, kaj vi estas mia edzino. Iel ni certe povos vivi sen mia... bopatrino.

– Povra patro – Laŭra sidiĝis sur la liton. Petro ĉirkaŭrigardis en la ĉambro. Nu jes, ĉi tie ĉio estas malbela, kiel ĝenerale en la loĝejoj, kiujn luas malriĉuloj. La loĝejo konsistas el unusola ĉambro, kun lavejo en la angulo, elektra kuirilo malantaŭ kurteno. Ne, ili vere ne devus longe resti ĉi tie. Nun vekiĝis en li la espero:

– Se vi ion heredis, ni forlasos ĉi tiun truon – li montris la ĉambron. Laŭra finfine iomete ekridetis:

– Ĉu vi amos min ankaŭ kiel riĉulinon?

– Mi ekamis vin, kiam vi similis al klerikala ronĝulo.

– Ĉu klerikala ronĝ...?

– Vi estis malriĉa kiel muso preĝeja.

Ili ambaŭ ridis. Sed tuj ili rememoris la sciigon pri la morto. Poste la viro klinis sian kapon al ŝia sino kaj komencis revi:

– Se tamen... se via patro faris karieron kaj restigis post si grandan posedaĵon, ni faros ĉirkaŭmondan vojaĝon, ĉu bone?

Inter la ligne kovritaj muroj de la notaria oficejo akceptis ilin la sekretariino, aspektanta kiel oldfraŭlino. La notario estis maljuna, sek-statura viro. Per eleganta movo li montris al la du profundaj foteloj starantaj antaŭ lia masiva skribotablo. Laŭra kaj Petro sidiĝis; tuj ekkaptis ilin la oficiala animagordo. La notario unue prenis siajn dokumentojn, kontrolis la identecon de la virino, poste ekparolis:

– Sinjorino, antaŭ unu monato estis ĉe mi via patro. Laŭ leĝa maniero li restigis ĉe mi iun koverton kun la ordono, ke, se li mortos, mi sciigu al vi ties enhavon.

„Mi esperas, ke troviĝas en ĝi ĉeko kun multege da nuloj", pensis Petro. Li estis modesta etoficisto ĉe la urba konsilantaro, kaj vespere, antaŭ endormiĝo ofte li revis pri riĉeco. Jes, se li foje fariĝus posedanto de centmiloj, li donacus el ĝi ankaŭ al la orfejoj, al malsatantoj en Hindujo. Sed kion li povus donaci, se nenion li posedas?

– Bonvolu malfermi la koverton – diris Laŭra superflue. Ŝia buŝo sekiĝis pro la ekscito. La notario rigardis al ŝi, poste turnis la koverton. Meze de ĝi ili vidis malnovmodan ruĝan vaksosigelon. Li disrompis ĝin. Petro kliniĝis antaŭen... Laŭra nervoze rompeta-



dis siajn fingrojn. La notario prenis papereton el la koverto. „Ho, ĝi ne estas ĉeko. Mia mortinta bopatro certe estis samtiel malriĉa, kiel mi" – trakuris la penso la kapon de Petro. Strange, ke li tamen sentis ian simpation al la nekonata mortinto.

– Mi laŭtlegas la tekston – la notario grakis, super la okulvitroj ĵetis al ili rigardeton, kvazaŭ kontrolante, ĉu la gejunuloj pretas ĝin aŭskulti? Laŭra fermis la okulojn...

„Mi restigas al vi trezoron, bone ĝin flegu. Ĝi donos al vi forton, kaj memorigos vin pri mi. Se vi ĝin trovos, vi fariĝos riĉegaj kaj fortaj. En la arbaro de la dua monteto, malantaŭ la duobla pordo, dum sunleviĝo. Ambaŭ estu feliĉaj. Patro."

Laŭra por sekundo denove sentis ion strangan. Ŝi rememoris. Sed la memoro estis pala, tre pala. Kvazaŭ ŝi estis aŭdanta la voĉon de la patro. Aŭ ĉio ĉi estis nur sonĝo...?

– Jen ĉio – diris la notario. Petro miris:

– Kio...? Mi kredis ĝin prologo! Do finfine, kion heredis mia edzino?

– Mi ne scias, sinjoro. Sur la papereto estas skribita nur tiom. Jen prenu.

Laŭra kaj Petro nekredeme rigardis la leteron. Vidante iliajn trompitajn mienojn, la notario iom mildiĝis:

– Eble ĉe iu alia notario li deponis la veran testamenton? Aŭ... ĉi tio estas nur morala averto, eble vojmontrilo por vi...

– Vojmontrilo? Moralaĵo? Koran dankon – en la animo de Petro kun preskaŭ aŭdebla bruego disfalis la revegoj. Bela domo, ĉirkaŭmonda vojaĝo, riĉeco...? – Ĉu ni devas pagi al vi, sinjoro?

– Ne, la modestajn kostojn jam pagis la mortinto.

– Venu, Laŭra. Ĝis revido.

– Ĝis revido.

Sur la koridoro ili ne parolis unu al la alia, samtiel silentis en la lifto, inter fremduloj. Nur en la halo kaj sur la trotuaro ili komencis paroli, kiel kutime, ambaŭ samtempe:

– Karega, ne koleru kontraŭ mia patro...

– Kia stultaĵo! ... Koleri? Ja mi ne konis lin. Nur mi ĝojis jam ricevi heredaĵon. Daŭros kelkajn jarojn, ĝis ni havos ĉion necesan. Ĝis ni entute povos komenci la vivon!

– Mia patrino opiniis, ke la patro ĉiam estis egoisto.

– Do... eble foje ankaŭ iu bopatrino rajtas pravi.

– Tiu papero tamen aspektas, kiel mesaĝo.

– Venu, ni trairu la aŭtoatendejon, tiel pli mallongas la vojo – Petro rigardis al sia horloĝo. – Mi devas rapidi. Mia ĉefo ne ŝatas, se mi longe forestas.

– Ankaŭ mi eklaboros – Laŭra spiteme levis la kapon. – Ja duope ni pli rapide perlaboros la prezon de propra loĝejo.

Ili iris meze de la granda atendejo, inter du longaj vicoj de aŭtoj. La suno iom kaŝis sin malantaŭ nuboj, estis komenco de la somero. Petro albrakumis Laŭra-n, volis ĝuste diri ion al ŝi, kiam li ekaŭdis proksimiĝantan bruon.

Inter la vicoj de starantaj aŭtoj granda nigra veturilo kuregis al ili rapidege. La timego lin senmovigis por momento, li vidis nur la proksimiĝantan nigrecon... Tiel rapidege ĝi venis...

– Atentu! – li kriis kaj per fortega movo kapt-tiregis Laŭra-n inter du aŭtojn. Ŝi preskaŭ falis surasfalten. La fremda aŭto ilin preskaŭ tuŝis – ili sentis surkorpe ties venton rapidegan. Poste Petro singarde levis la kapon el inter la veturiloj – la nigra aŭto tiam turniĝis al la larĝa strato National kaj malaperis en la aŭtomaro.

– Li volis nin tratreti, mortigi! Murdisto!

– Sed... kial? – Laŭra nur nun komprenis, kio vere okazis, Ke ili preskaŭ mortis. Tremis ŝiaj genuoj, la vizaĝo paliĝis.

– Kial...? – Petro ne rigardis al sia edzino. – Laŭra, mi opinias, ke via patro tamen heredigis ion al vi. Ion valoran... Ion, kion iuj volas akiri eĉ helpe de murdo!

(*Daŭrigota*)

KVIN DEMANDOJ AL ISTVÁN NEMERE

Ĉiujare du romanoj... Jam apenaŭ restis loko sur mia librobreto... Ĉu vi ne trovas, ke tio estas tro?

Aĉetu novan breton, ĉar ĉijare sekvos du pliaj romanoj: **Alta akvo** kaj **Serĉu mian sonĝon!**

Bona Dio! Ĉu vi dirus ion pri la enhavo?

Kial? Ĉu vi do volas kompensi la legantojn pro la prezaltigo de HV per romanresumoj?

Vi pravas, tiuj resumoj neniel egalvalorus tri forintojn, kaj krome en la nuna numero la legantoj devas elteni ankaŭ la unuan parton de via felietona romaneto... Kiel vi trovas tempon por tiel multe verki?

Mi evitas partopreni redakciajn, komitatajn kaj aliajn kunsidojn. Kaj ankaŭ respondi sensencajn demandojn de intervjuantoj. Sed pri la lasta ne ĉiam mi sukcesas...

Ĉu vi vivas per la honorarioj de viaj verkoj?

Jes, sed ne per tiuj de la Esperantaj. La honorario, kiun pagas al mi HEA por romano, ne kovrus la kostojn de la cigaredoj fumitaj dum la verkado. Sed, ĉar mi estas nefumanto, tiu mono restas por aĉeti la necesajn manuskriptan paperon kaj la inkrubandon. Tiel almenaŭ la Esperantlingva verkado ne kaŭzas al mi... elspezojn. Tamen, dank' al Dio dum la pasintaj dek jaroj aperis 17 miaj hungarlingvaj libroj entute en 1.110.000 ekzempleroj. Tiel ja mi ne malsatas...

Do, vi ne fumas, preferas loĝi en provinca urbeto anstataŭ en Budapeŝto, onidire vi havas nek aŭtomobilon, nek televidilon, ne trinkas alkoholaĵojn... Ĉu edzinon vi havas?

Jes, eĉ jam la duan. Kaj por preventi vian demandon: mi havas ankaŭ filinon 18-jaran. Kio koncernas la onidirojn pri aŭtomobilo ktp., ili estas veraj. Mi simple ne bezonas televidilon, aŭtomobilon, eĉ malpli alkoholon aŭ fumadon. Mi ĉerpas plezuron ne el tiuj aferoj, sed el tio, ke mi havas la eblon rakonti al multaj homoj miajn pensojn pri la vivo...

V.B.

ORIGINALA POEZIO

Mikaelo Ternavski

x x x

Komence mi certe diris –
mi ne ŝatas arbojn,
ili ja dum sia vivo
staras sur la sama loko
kaj sekve –
ili vidas tre malmulte.
Komence mi certe diris –
mi ne ŝatas la arbojn.

Eĉ tiajn sveltajn kiel pino.
Eĉ tiajn fortegajn kiel kverko.
Eĉ tiajn... mi volis diri
kiel sekojo,
kaj rememoris tuj,
ke sekojo
vivas kvar aŭ kvinmil jarojn.
Kio do:
dum tia tempo
oni povas iom ja vidi,
eĉ starante
sur la sama loko.

Aurél Ponori Thewrewk

Ekzistas lando

Ekzistas lando fora, nekonata.
Ne sonas tie infanaj kriadoj,
ne bruas tie la rulantaj radoj
sur la senpolva voj' marmore glata.

Ne estas tie krim', prizonopordo,
trankvilo nur kaj obeemaj gentoj,
blankaj virinoj, senmakulaj sentoj,
la kisoj mildas en kompleta ordo.

Kaj dum miloj da jaroj la labor'
senĉese fluas laŭ la bona mor'.
Ravigas milda zum', orel-altiro,
ekdormas oni tuj post sunsubiro.

Ne iru tien sur la voj' marmora:
ja estas malbenita lando fora.

Rejna de Jong

Maja tago

La mezepoka urbkvartal' senhomis,
solaj ni vagis en pasinta mondo,
prapatroj ĉirkaŭ ni fantomis
en fantazia rondo.

Siringoj kaj kratagoj dolĉodoris,
siajn parfumojn ŝutis malavare,
la maja tag' abunde floris,
la suno brilis klare.

Super tegmentoj la preĝej' imponis
kaj rave, gaje el la svelta turo
la kariljona kanto sonis
sub volvo el lazuro.

Al korofund' printempa belo sinkis,
majo favoris nin per festregalo,
ni kune plenfeliĉaj trinkis
el ŝia ĝojpokalo.

Julio Varga

La vojo

– Al mia vogula frato, Andrej *Tarhanov*, verkinto de la poemo «La pagana pado».

Pri voj' ni vane sonĝis, revis.
De fato *unu vi ricevis,*

najbaran vojon nun mi iras,
la frato. Ĉu vi tion miras?

Malsamas ili, tamen rekte
nin ambaŭ gvidas samdirekte.

La voj' pagana, aŭ la mala
mirakle povas gvidi al la

gefratoj, homojn al la homoj,
malmultajn al la milionoj.

Ĝi kaŝas ĝojon, kovas triston,
dornegoj ŝiras la „turiston".

Se eĉ sangite nin ni movas,
sed tamen foje Celon trovas:

sur kiu-ajna, streta pado
alvenos ni – al tombokavo.

Adalberto Huleŝ

Memore al Ernesto Bécs*

Mortontaj estas la homoj.
Vi volis trinki ankoraŭ unu fojon el tiu *fonto*
(vi diris ĝian nomon sed mi ne enkapigis)
ne plu vi trinkos.
Pale mi memoras vian raŭketan voĉon
kiam viajn poemojn vi laŭtlegadis –
akre mi vidas vian malgrasiĝintan korpon
kiam ni laste renkontiĝis antaŭ kvar tagoj.
Eĉ memorbildo ne postrestas post ies forpaso
nur ia klišo rigidiĝinta kiel la kadavro.

---

*Ernesto Bécs, la sonoril-voĉa poeto, kiu verkis ankaŭ Esperante, mortis la 9an de januaro 1985, 56-jara.

La pentristo de nostalgio



Endre Bálint

Okaze de la sepdekjariĝo de la hungara pentristo Endre Bálint estis malfermita en decembro 1984 granda ekspozicio el liaj verkoj en la salonegoj de la ekspoziciejo Műcsarnok. Ĉi tiu ekspozicio prezentis preskaŭ lian tutan verkaron, ebligante trarigardi la verkojn de la komenco ĝis hodiaŭ.

Endre Bálint ekspoziciis unuafoje siajn pentraĵojn en 1935, kaj ĉi tiu ekspozicio estis la 57-a, el kiuj 13-foje li prezentiĝis en eksterlando.

En la unua epoko de sia kariero li fleksiĝeme alproprigis la plej diversajn stilojn de la moderna pentrarto, de 1945 en la rondo de la Budapeŝta „Eŭropa-skolo" jam maturiĝis lia propra stilo. Vivante en Parizo de 1957 ĝis 1962, li prezentis memoraĵojn el sia infanaĝo, la motivojn de la hungara folkloro kaj la senton nenie farti hejme, la ĉiaman forsopiradon el la nuntempo, kaj la neplenumeblan nostalgion pri delico kaj miraklo.

En Francio Bálint eksperimentis novan teknikon de la pentrarto. El fotofragmentoj li kompilis muntaĵojn, en kiuj estas pure videblaj la regantaj motivoj de lia arto: la impeto kaj malimpeto, la anima-karna vundiĝado, la homa mizero, tristeco kaj la kontraŭhoma perforto.

Li okupiĝis ne nur pri la pentrarto, sed ankaŭ pri la ilustrado de libroj. Famega estas la Jerusalema Biblio, eldonita en 1958 en Parizo, pri kiu opiniis Francois Mauriac jene: „Vane mi atendas, ke antaŭ mi malfermiĝu la horizonto, neniu legaĵo havigas al mi la malpeziĝon, kaj jen venas la liberiĝo: mi ekkonis la admirindan ilustritan ekzempleron de Jerusalema Biblio, en kiun oni povas enpenetri kiel en katedralon, kie la ilustraĵoj de Endre Bálint estas la vitraĵoj de la fenestroj kaj la freskoj."

Ankaŭ por esperantistoj alportis la ekspozicio delikataĵeton: en la vitrino de ilustritaj libroj oni povas vidi la kovrilon de esperantlingva eldonaĵo: tiun de *Dudek horoj* de Ferenc Sánta.

La plej okulfrapa inspiro de lia pentrarto estas la morto. Jam de sia junaĝo li devis pensi pri ĝi pro tuberkulozo, kaj poste tiam, kiam centmiloj estas senditaj al la certa morto. Ĉi tiuj travivaĵoj penetris en lin ĝisoste. Tion montras ankaŭ la titoloj de multaj pentraĵoj: *Morto en vilaĝo, Promenado en la tombejo, Ĉe la muro de tombejo, Morto en Firenze, Tomboŝtonoj vintre, Koruso kaj tomboŝtonoj.* Alia grava temo estas la transcendenco: Ekzorco *per trumpeto, Anĝela aklamo, Flugilo sen anĝelo, Koruso de anĝeloj* k.a. Ambaŭ temoj akompanis la tutan vivon de Endre Bálint.

Inter la ĉirkaŭ 200 pentraĵoj ekspoziciitaj estas kelkaj, kiuj apartenas al la kremo de la hungara pentrarto de la pasinta duonjarcento, ekzemple: *Groteska entombigo* kaj *Triptika ikonostazo.* En ĉi tiuj bildoj la pentristo revivigis la barokajn-popolajn-slavajn elementojn de la malnova urbeto Szentendre – kie li longtempe laboris –, kaj la memorĉifonojn de la propraj travivaĵoj. Helpe de siaj pentraĵoj li atentigas nin, kiom da beleco havis ĉio, kun kio ni iam kunvivis, sed de kio ni malproksimiĝas. En la ĉefverkoj li novedenove luktas kun la heredita transcendenco, kun la novnaskiĝintaj mitologioj, kun la superstiĉo naskita far la timo de individuo. La rezulton de la lukto la arto de Endre Bálint konvinke komunikas: ankaŭ la „alia mondo" estas parto de nia nuna, oni povas kredi nur en la surtera vivo, ĉi tie oni devas retrovi la manieron de la plena vivo.

Oszkár *Princz*

Sodomo kaj Gomoro



PANORAMO

Nova hungara opero

Nova hungara opero estis prezentita fine de januaro en la Budapeŝta Ŝtata Operdomo. La aŭtoro estas Attila *Bozai;* la juna hungara komponisto kreis muzikon por la romantika versdramo „Csongor kaj Tünde" de Mihály *Vörösmarty* (1800-1855). En la versdramo kombiniĝas popolfabelaj elementoj kun profunda filozofiemo: ĉio ĉi estas esprimita per rave bela hungara lingvo. Laŭ la unuaj kritikoj Bozai trovis la adekvatajn rimedojn de la moderna muziko por resti en plena harmonio kun la atmosfero de la klasika verko.

Vizito el norda lando

Kaare *Willoch,* la ĉefministro de Norvegio vizitis Hungarion en januaro laŭ la invito de sia hungara kolego, György *Lázár.* La kontaktoj hungaraj-norvegaj komencis intense evolui meze de la sepdekaj jaroj: en 1974 la norvega ĉefministro vizitis Budapeŝton, post tri jaroj la hungara Oslon. En la nunaj intertraktoj la ĉefa temo estis la kreskigo de komerco kaj ekonomia kunlaboro, sed estis donita grava atento ankaŭ al la internacia situacio. La du ĉefministroj substrekis, ke ankaŭ la malgrandaj landoj povas efike kontribui al la pliboniĝo de la rilatoj inter la ŝtatoj apartenantaj al la Varsovia fakto, respektive al NATO.

PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO

PANORAMO

Nova kongrescentro en Budapeŝto

Ligite al la hotelo „Novotel", enkadre de kunlaboro hungara-aŭstra, estis konstruita la unua vere moderna kongrescentro de Hungario. La centro, kiu povos akcepti kongresojn kun ĝis ĉ. 2000 partoprenantoj, grave pliigos la turisman altirforton de Budapeŝto. Oni esperas, ke la investita sumo regajniĝos ne el la lupagoj, sed per la prezoj de diversaj aliaj servoj (hoteloj, restoracioj, turismaj programoj), kiujn uzos la partoprenantoj de la diversaj kongresaj kaj konferencaj aranĝoj. La granda halo de la kongrescentro, kiel elstara koncertejo, servos ankaŭ la Budapeŝtanojn.

700 bildoj sub la planko

Estas malofta evento en la arthistorio trovi preskaŭ 50 jarojn post la morto de artisto pli ol 700 liajn verkojn. Tio okazis tamen lastatempe ĉe la renovigo de la iama domo de la pentristo János *Tornyai* (1869-1936). Tornyai ĉerpis la temon por siaj realismaj bildoj el la vivo de la hungaraj kamparanoj de la Granda Ebenaĵo. Li testamentis ĉiun sian havaĵon al la naskurbo Hódmezővásárhely, tamen, poste li faris novan testamenton, kaj ankoraŭ dum lia vivo ekflagris diskutoj pri la valoreco de tiu dua testamento. Verŝajne pro tio li decidis kaŝi pli ol sepcent bildojn en du kestoj sub la planko de sia artlaborejo.



PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO

dunatours

PEST MEGYEI IDEGENFORGALMI HIVATAL
1065 Budapest VI. Bajcsy-Zs. út 17.
Telefon: 314-533, 116-827, 115-630
Telex: 22-4271

La centro de Hungarujo

Jes, vi jam certe solvis tion, ĝi apenaŭ estas enigmo: Departemento Pest situas ĉirkaŭ la ĉefurbo vere kiel centra teritorio de la lando, okupanta ties 7 procentojn. Kvazaŭ kondensite, ĉi tie troveblas ĉio ajn el la rigardindaj kaj ĝuindaj interesaĵoj de la lando: agrablaj akvoj por bano, termobanejoj, montetoj kovrataj de vitokulturo kaj kun deklivoj por skiado, kaj stepoj, kaj hungarecaj farmdomoj „tanja", vinkeloj kaj trinkejoj „ĉarda", krom multaj aliaj.

Multe vojaĝantaj turistoj asertas, ke en Eŭropo la plej bela rivera pejzaĝo – post la valo de Rejno – estas ĝuebla en la Danub-kurbo, grandioze romantika. Kaj vere, se oni rigardas sunsubiron el la Fortikaĵo de Visegrád aŭ promenas tra la kuriozaj stratetoj de Szentendre, la travivaĵo restas neniam forgesebla.

La perlon de la lando, la pejzaĝon de la Danub-kurbo, je someraj tagoj vizitas turistoj el la tuta mondo, kaj kun plezuro rigardas la monumentojn de la historio antikva kaj mezepoka. Tie amasiĝis, meze de la lando la palacoj-ruinoj de iamaj reĝoj el la familio Anjou, same de la renesanca reĝo Mátyás Corvinus, tie videblas plurloke la bastionoj-restaĵoj protektintaj la limojn de la Romia Imperio. Pro la Mediteranea beleco de la pejzaĝo disvolviĝis grandioza „plen-aera" skolo de pentrarto, kaj altiriĝis tien poetoj kaj verkistoj por ĝuplena vivo kaj arta



D-ro László Jenkei, direktoro de Dunatours

verkado en tiu ĉarmega regiono, kiun regas la kurbiĝema Danubvalo.

Ankaŭ aliloke la departemento prezentas abunde da vidindaĵoj, multajn eblojn por la plej diversaj distroj. Mildaj montaroj – Börzsöny (pron. berĵenj) kaj Pilis – estas facilmaniere vizitataj de l' ŝatantoj de la varia naturo; ĉevalajn ekskursojn aŭ vilaĝan trankvilon ĝui laŭ ĉies prefero.

Ráckeve, la serbajn monumentojn gardanta urbeto apud Danubo estas jam delonge konata en- kaj eksterlande, inter aliaj pro la agrabla fiŝhokado, termobanejo, kaj speciale pro la folklora hungara kuirarto, de multaj turistoj preferata.

Krom la supre menciitaj, la Vojaĝburoo Dunatours proponas pliajn interesaĵojn por turistoj, kaj zorgas pri tranoktejo, manĝado, programo, ankaŭ pri plurlingvaj ĉiĉeronoj, kiuj faksperte gvidas al la ĝuindaj vidindaĵoj. En agrablaj lokoj situantaj hoteloj – i.a. Keve en Ráckeve, Danubius en Szentendre – kaj bonnivelaj kampadejoj garantias senzorgan restadon.

S-ino Ildikó Kátai, vicestro de la vojaĝburoo tiel informis nin: Nia agado multe ampleksiĝis nuntempe, ke ni estas jam ne nur fremdultrafika oficejo por perado kaj informado. Nun jam ni prizorgas ankaŭ vizon, pasporton, vendas kaj ŝanĝas valuton, kaj ni organizas ankaŭ vojaĝojn. En la jaro 1985 ni ofertas ekzemple vojaĝojn al Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Hispanio, Italio kaj GDR. Partoprenante la ekspozicion „Vojaĝo '85", ties vizitantoj rimarkos, ke la programoj, la vojaĝoj kaj tranoktejoj, ĉiuj alcelas la mone modestajn turistojn. El ili pli kaj pli vastiĝas la aro de la ripete revenantaj gastoj. Tute ne mirinde: ĉar ĉiu ano de nia vojaĝburoo kun plezuro agas kiel gastojn ŝatanta vera dommastro aŭ dommastrino.

J.K.

Panoramo ĉe Danubkurbo



REVUO DE REVUOJ

Ĉu jubilea surprizo? – mi viŝis miajn okulvitrojn, ĉar eble ili trompas min. Sed ne, vere furora novaĵo: en nia gazetaro neniam dum la Centjaro aperis tiaspeca „kurso". Vane serĉos ion similan eĉ la plej diligenta akademiano sur la gazetarkivaj bretoj. Tamen mi ne aŭguras, ke tiu SENNACIULO (11.) urĝe vendiĝos pro tiu misspica „rapidkurso" – ho, ne lingvistika! – kies ekscite utila temo estas: *kiel korupti* ŝtatoficistojn por ricevi personan favoron; kiel „konvinki" la triamondanojn per blankula orgojlo kaj dolarsvinga elokventeco, por ke ili lasu sin deviigi... Fiere pri triumfaj spertoj kaj ruzaj kapabloj, nun elpaŝis kiel „kursgvidanto" s-ro Ledon, kiu en antaŭaj artikoloj jam montris ungojn musajn de rasisme pensanto (pro kio multflanke lin frapis akraj rebatoj). Bizare, li maskas sin „ideologie": tiel li agas kaj agos sennaciece, kaj senŝtatane, se li subaĉetadas. Diablo ne dormas sed konfuzon formas, je gloro de la E-gazetpresado...

Ofte venas nuntempe artikoloj kaj informoj pri ebloj de la maŝintradukado kaj pri pontlingva rolo de Eo. LA MOVADO (396.) detale argumentas por tiu vojo de nia lingvo, aludante tamen pri diversaj modinfendaĵoj en Eo. Do almenaŭ por specifaj tradukaj metodoj, ĉu ekzistos iomaj diferencoj disde la ordinara Eo? Por komercaj tekstoj tio taŭgos... Tiel aspektas el Japanio.

Alimaniere legeblas en KONTAKTO (6.), kiu informas, ke granda monopolkompanio ITT jam uzas kontentige maŝintradukan sistemon (cetere ege multekostan), multaj firmaoj jam luigas tiun servon. Restas tamen nebule, kiuj lingvoj partoprenas ĉi tiun sistemon? Oni uzas ĝin sole por komercaj informtekstoj, do verŝajne pri varoj tekstas malbonaj indikoj – ŝajnigas tiu ĉi mankhava artikolo. Cetere oni devas laŭdi la revuon pro la vere lertaj kaj abundaj artikoloj pri vivo kaj kulturo de japanoj. Tiu numero certe elstaras pro la varia manipulado de sia temaro. Malofte prezentas nia revuaro tiunivelan, tiel legindan revuon al la dankema legantaro.

Sed ni revenu ankoraŭ al la maŝintradukado, kvankam el ega malproksimo (laŭ Eŭropa vidpunkto). Eĉ disde Japanio granddistance, NOVZELANDA E-ISTO (3.) pere de Jozefo *Major* disputas kontraŭ kelkaj ideoj de la maŝintraduk(ist)oj. La ideon modifi E-on por komputiloj Major plene rifuzas, argumentante: eĉ se oni tion farus sole por komputiloj, la modifoj – malavantaĝaj por la viva Eo – certe ne haltos ĉe la sojlo de la komputilejo. Tiaj gramatikaj reformoj povos esti multe pli danĝeraj ol la ofte atakataj, nenecesaj neologismoj. Pluan gravan averton li lanĉas: nur malvasta rondo de programistoj, k.a. profitus el la „Komputila Eo", kiu estus nur „interna pontlingvo"; nek nia movado, nek la lingvobezona publiko profitos, krome *perdiĝos esperoj* oficialigi E-on en kia ajn sfero de la landoj.

Ĉi supre ni jam plurfoje skribis la vorton *komputilo.* La publiko scias: kontraŭ tiucela uzado de la angla-devena verbo *komputi,* gravaj aŭtoritatoj longe kaj (kiel kutime en lingvistika sfero) ankaŭ akre disputis. Eble laste kontraŭis ĝin forte *Laurence Mee* en MONATO (5-6.). Li rifuzis ankaŭ – kiel pluraj aliaj – la vortformon „komputilo" por tiu maŝino. Mi ne emas listigi la multajn ofte strange elpensitajn vortformojn proponatajn, ĉar la direktoro de la Terminologia Centro, *Rüdiger Eichholz,* kaj same *Gaston Waringhien jam akceptis komputilon.* Pri tio informis la multmerita *W. Prent* en THE WORKER ESPERANTIST (nov.-dec.), citante la leteron de Waringhien, ĉefa redaktinto de PIV. Pro tiu rezulto, oni ŝanĝos la originalan difinon de „komputi" en PIV, favore al tiu gigante kreskanta teknika branĉo, kiu revoluciigas la teknikon kaj la informadon ĝenerale. Ĉu la ondoj finfine trankviliĝos? Oni esperu!

Lasu la ĉapeletojn sur niaj literoj! – krias el Sudafriko *Edwin de Kock* en ĉefa artikolo de BONA ESPERO (3.). Ne kontesteblaj argumentoj estas vicigitaj, el kiuj mi prenas nur tiun: la supersignoj ekzistas en multaj lingvoj, en tre gravaj, sed neniu volas ilin *de tie* forigi. Kial? Ĉar oni rekonas ilin kiel *verajn* lingvojn. Konsciu, ke ankaŭ Eo estas tia kun same respektinda ortografio.

Por ni multe pli grava ol la forigemo de supersignoj, estas la vastigo de nia movado, la varbado kaj propagando. Tiuj ne perdiĝu inter la „erudiciaj" diskutoj! Kiel agrable estas legi pri tiaj aktivadoj, ekzemple en *Gotenburgo* sur paĝoj de LA ESPERO (8.). E-kluboj en la granda sveda havenurbo aranĝis daŭre plurlandajn interŝanĝojn de prelegantoj, semajnfinajn kursojn, ankaŭ per novaj metodoj. En Urba Informa Centro (multevizitata grava loko) *Lennart Aberg* ĉiujare 3-5-foje (!) aranĝas sinofere ekspoziciojn, kiujn multaj miloj rigardas. Tie interesa aro da bildoj, granda kolekto da libroj kaj presaĵoj – ankaŭ pri la kongresurboj – formas pli ol impreson ĉe la vizitantaj miloj, ĉar Aberg kaj la helpantoj persone deĵoras kaj klarigadas dum pluraj semajnoj.

PIONIRO nomiĝas ĉarma monata E-gazeto por infanoj, aperanta jam de 19 jaroj en la urbo Pécs (Sud-Hungario). En pura Eo facilaj legaĵoj, ludoj kaj enigmoj instigas la grupojn da lernantoj ellerni bonan lingvoscion. Kiom da bonaj junaj aktivuloj edukiĝis jam tie kaj tiel!

Ervin *Fenyvesi*

MOZAIKO EL ESPERANTUJO

VEF – la 14an fojon

Fine de decembro kaj komence de januaro la 14an fojon estis aranĝita en Budapeŝto *Vintra Esperantista Ferio.* Ĉijare la aranĝo havis 170 konstantajn eksterlandajn partoprenantojn el 13 landoj, kiuj partoprenis ĉiujn kulturajn kaj turismajn programerojn de la aranĝo. Krome estis multaj hungaraj kaj eksterlandaj esperantistoj, kiuj venis nur al kelkaj programoj: la Silvestro-vesperan balon partoprenis entute 300 esperantistoj, kiuj renkontis la novan jaron 1985 en varma, amika atmosfero. La Budapeŝta Komitato de HEA kompreneble ankaŭ fine de la kuranta jaro okazigos tiun ĉi jam tradician kunvenon.

Rezultoj de poezia konkurso

La 16-an de decembro 1984 en Triesto (Italio) okazis la festa proklamo de la premioj de la Poezia Konkurso „Internacia Amikeco".

La *unuan* premion gajnis **Rejna de Jong** (Nederlando) per la poemo „Maja tago"; la du *duaj* premioj estis asignitaj al **Pierisa Cavallero** (Italio) pro la poemo „La blinda infano", kaj al **Eli Urbanová** (Ĉeĥoslovakio) pro la poemo „Doloro". *Triajn* premiojn gajnis **Tibor Bessenyei** (Hungario) per la poemo „Papilioj", **Ada Aceto** (Italio) per la poemo „Kial", kaj **Lucia Miano** (Italio) per la poemo „Aĝoj".

Semajnfino da spektakloj en Esperanto

Muzikistoj kaj aktoroj el pluraj landoj kolektiĝis en Parizo la 24-an kaj 25-an de novembro 1984 por partopreni la Duan Jaran Festivalon de Kanto kaj Teatro en Esperanto. La programo ampleksis du muzikajn kaj du teatrajn spektaklojn kaj unu satiran kabaredon kreitan de la trupo „La ruza kruĉo".

La unua muzika koncerto pleniĝis ĉefe per kontribuoj de la konataj kantistoj **Suzanne** (Italio) kaj **Ĵak le Puil** (Francio). La dua koncerto impresis kontraste, pro la apudmeto de klasika piana recitalo de **Francois Chevrier** (Francio) kun vigla prezento de la skandinava rok-grupo „Amplifiki". Ĉi tiu grupo, konsistanta el tri svedoj (**Bertil Wennergren, Mike Englund** kaj **Martin Weise**) kaj unu dano (**Kim Henriksen**), verkas siajn proprajn tekstojn – rekte en la internacia lingvo Esperanto, kompreneble.

La Teatro Esperanta de Parizo (TESPA) prezentis adaptojn de du teatraĵoj de R. de Obaldia („Eduardo kaj Agripino" kaj „La forpasinto"). La gastrotrupo de Zagrebo prezentis „Stilaj ekzercoj" de R. Queneau kaj jugoslavan verkon „Sonoriloj" de Smljan Rozman, kies temo estis la danĝero de ekscesa rega potenco.

La Festivalo, kiu altiris internacian spektantaron, pruvis ankoraŭfoje, ke la Esperanta kulturo vivas kaj evoluas.

(IGS)

Soveta esperantista tendaro

Dum la pasinta somero en Armenio apud la urbo Erevan okazis Okcidenta Sovetia Esperantista Junulara Tendaro (OkSEJT-26).

En la tendaro partoprenis 250 reprezentantoj de 12 respublikoj el 57 urboj de Sovetunio.

Okazis kursoj por komencantoj kaj progresantoj, kursoj de tradukarto sub gvido de **B. Kolker**, kaj somera Universitato.

La kultura programo konsistis el: vespero de lumbildoj kaj filmoj, koncerto de reprezentantoj de respublikoj, de komencantoj, tago de naskiĝintoj, tre interesaj ekskursoj tra la antikvaj ĵokoj de Armenio – Eĉmiadzin, Garni, Gehard, Sardarapat, interesa nacia festo „VARDAVAR" kun prezentiĝo de la ensemblo de popolaj dancoj kaj danc-ensemblo de la Pionira Palaco, spert-intersanĝo de internacia edukado de junularo.

Certe restas neforgeseblaj la vesperoj ĉe la tendara fajro, kantoj kun gitara akompano, dancoj, ludoj.

Aleksandr *Ribalov*

Zigzage tra Finnlando

Inter la 28-a de novembro kaj 12-a de decembro la ĉefredaktoro de Hungara Vivo je la invito de Esperanto-Asocio de Finnlando faris prelegvojaĝon en tiu norda parenclando de Hungario.

Li prelegis pri tri temoj: pri la Esperanta literaturo, pri la hungara literaturo, kaj pri la ekonomiaj kaj sociaj reformoj nuntempe okazantaj en Hungario. Finnaj esperantistoj kun la gvido de **Osmo Buller** el Oulu brile organizis la restadon de V. Benczik, kaj maksimume eluzis ĝin por la celoj de la Esperanto-Movado: okazis entute 14 prelegoj en 12 urboj (aŭ vilaĝoj): Lappeenranta, Outokumpu, Oulu, Rovaniemi, Haapavesi, Karsikas, Vaasa, Pori, Rauma, Turku, Tampere kaj Helsinki. El la 14 prelegoj 9 estis faritaj antaŭ neesperantista publiko, kun interpretado, ĉu en biblioteko (plej ofte pri la hungara literaturo), ĉu en kulturdomo aŭ eĉ urbodomo (ĉefe pri la ekonomiaj reformoj en Hungario). La loka nacilingva gazetaro ĉie informis vaste pri la prelegoj, kaj aperis ankaŭ pluraj intervjuoj, faritaj kun s-ro Benczik.

La ĉefredaktoro de HV en Oulu vizitis ankaŭ la redakcion de la gazeto „Kansan Tahto", kiu jam aperigis plurajn artikolojn de nia revuo en finna traduko. S-ro **Yrjö Rautio**, la ĉefredaktoro de „Kansan Tahto", esprimis sian deziron daŭrigi tiun kunlaboron.

Finnaj esperantistoj ĉe la organizo de la prelegoj ĉiam kunlaboris kun iu neesperantista instanco – ĉu kun biblioteko, ĉu kun filio de la Finna-Hungara Amikeca Societo, ĉu kun iu politika aŭ alia organizaĵo. Tiamaniere Esperanto aperis por vico de influaj sociaj agantoj kiel natura kulturfaktoro. Imitinda ekzemplo!

Ire kaj revene V. Benczik trapasis ankaŭ Leningradon, kie li partoprenis varmetosan amikan kunvenon kun sovetaj esperantistoj.

Favoraj libroprezoj en Sovetio

En nia pasintjara dua numero (p. 76) ni aperigis informon pri tio, ke la soveta

libroimporta firmao „Mejknjiga" dissendis la libroofertan liston de Hungara Esperanto-Asocio al librovendejoj en ok grandaj urboj. En la n-ro 1984/6 ni povis informi pri tio, ke „Mejknjiga" mendis Esperantajn librojn en la valoro de preskaŭ 40 000 rubloj. La signifo de tiu granda mendo ne estas trotaksebla: ĝi grave helpas la eldonan aktivadon de Hungara Esperanto-Asocio, kaj aliflanke, tiel amaso da Esperantaj libroj trovos vojon al la sovetaj legantoj.

Estas aparte menciinda fakto, ke sovetaj esperantistoj povas aĉeti tiujn librojn en la librovendejoj „Druĵba" tre favorpreze, *kontraŭ ĉirkaŭ la duono de la Hungarlandaj prezoj!* Tiuj favoraj prezoj ŝuldiĝas al la speciala rabatsistemo, kiu aplikiĝas en la komercaj kontaktoj de la soveta ŝtata firmao „Mejknjiga" kaj la hungara ŝtata firmao „Kultura". Cetere, ĉiaj Hungarlandaj libroj estas vendataj en Sovetio kontraŭ ĉ. la duono de la hungara prezo.

La menditaj libroj estis ekspeditaj al Sovetio fine de oktobro 1984. Do, ĉiuj sovetaj libroamantaj esperantistoj estas petataj viziti la Druĵba-librovendejojn en Moskvo, Kievo, Leningrado, Tallinn, Riga, Jerevan, Harkov kaj Vladivostok – kaj baldaŭ foraĉeti la tutan stokon... Antaŭdankon!

INTERKIBERNETIK '85

La Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informatiko kaj Sistemiko (mallonge TAKIS) okazigos sian unuan universalan kongreson – kun la nomo INTERKIBERNETIK – en Budapeŝto *de la 27-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1985.* La kongreso estas gastigata far la *Komputoscienca Societo Johano Neumann,* kiu organizis la kongreson INTERKOMPUTO en Budapeŝto, fine de 1982 kaj partoprenas en la redaktado de la internacie konata revuo „Internacia Komputado", eldonata same en Budapeŝto. Ankaŭ la Internacia Kibernetika Asocio – sidejo en Namur, Belgio – kaj la Kibernetika Akademio Odobleja planas subteni ĉi tiun kongreson.

La programkomitato atendas *prelegojn* pri la sekvantaj terenoj:

1. *Antropokibernetiko* (psikokibernetiko, lingva kibernetiko, instrukibernetiko, organiza kibernetiko...)
2. *Ĝenerala kibernetiko kaj sistemteorio* (filozofio de kibernetiko, informteorio, teorio de abstraktaj aŭtomatoj, programada metodologio...)
3. *Inĝeniera kibernetiko* (kontrolo, komputila aparataro, aŭtomatigo, teknikaj informdetektiloj, -kanaloj, kaj -storoj...)
4. *Biokibernetiko* informprilaboro en organikaj sistemoj, bestolingvoj, kibernetiko kaj medicina servo...)

La artikoloj povas esti skribitaj en iu el la tri laborlingvoj de la kongreso; angle, france aŭ Esperante. Ili ne estu pli longaj ol 10-paĝaj (32 linioj x 60 literoj) kaj devas esti sendataj al la adreso de dr. Dan Maxwell (Institut für Linguistik, Ernst-Reuter Pl. 7. D-1000 Berlin 10) antaŭ la *31-a de marto 1985.* Aŭtoroj de akceptitaj prelegoj povas plani maksimume 30-minutan prezentadon.

Aliaj programoj dum la kongreso: (a) interkona vespero; (b) ŝipekskurso sur la Danubo dimanĉe, la 28-an de julio; (c) urborigardado vendrede kaj (d) adiaŭa vespero kun danco.

La *aliĝkotizo* estas 150 DM. (Aŭtoroj de akceptitaj prelegoj havas 20%-an rabaton.) Tio inkludas la kongreseldonaĵojn.

Tranoktado (kun matenmanĝo):
dulita ĉambro por du personoj: 80 DM
dulita ĉambro por unu persono: 70 DM
(Ni disponas nur pri limigita nombro de ĉambroj en la kongresa konstruaĵo. Se via aliĝilo alvenas post la elĉerpiĝo, povas okazi, ke vi devas pli pagi por ĉambro en alia hotelo.)

Se la aliĝo okazas post la 31-a de marto 1985, la aliĝkotizo, kostos 20%-jn pli. Ĉio estas pagenda al *Komputoscienca Societo Johano Neumann* (H-1368 Budapest, Pf. 240 Hungario). Hungara Nacia Banko MNB 232-90171-2494 NJSZT INT.

Por pluaj informoj, bv. skribi al la Societo Johano Neumann.

Esperanta libroproduktado 1984

Jen, nia kutima statistiketo pri la Esperantaj libroj, aperintaj dum la pasinta jaro. Por komparo ni aperigas ankaŭ la indikojn pri 1982 kaj 1983. Parenteze staras la ciferoj pri la Hungarlanda produktado.

	1982	1983	1984
Nombro de ĉiuj libroj en kaj pri Esperanto	228 *(10)*	219 *(28)*	194 *(13)*
Suma paĝonombro de tiuj	30 844 *(2043)*	33 139 *(5049)*	25 680 *1484)*
Nombro de originalaj beletraj verkoj	22 *(3)*	23 *(9)*	17 *(3)*
Suma paĝonombro de tiuj	2734 *(569)*	3529 *(1551)*	2824 *(387)*
Nombro de tradukitaj beletraj verkoj	51 *(3)*	42 *(3)*	48 *(2)*
Nombro de nefikciaj verkoj	107 *(3)*	95 *(16)*	73 *(7)*
Suma paĝonombro de tiuj	14 307 *(507)*	8678 *(2866)*	9175 *(783)*
Nacilingvaj verkoj pri Esperanto kaj lerniloj	48 *(1)*	59 *(0)*	56 *(1)*
Meza paĝonombro de Esperantaj libroj	135 *(204)*	151 *(180)*	132 *(114)*
Meza prezo de Esperantaj libroj (en ned.gld.)	11,80	15,29	14,26

Szilárd Bálint

SKANDALO EN LA VILAĜO

En la granda vilaĝo daŭris la fervoraj preparoj por grandioza geedziĝa festeno. Tie vivis la kutimo, komenci tian festenon ĉe la familio de la fianĉino dum du tagoj, poste oni daŭrigis tion ĉe la fianĉa domo samtiel, ĝis la kapabloj de la gastaj stomakoj permesis. Preskaŭ tricent gastoj venis al la domo de la fianĉino, en kies korto granda tendo ŝirmis ilin de la sunradioj, eventuale de surpriza pluvatako. Oni venigis blovorkestron por igi pli gajaj la solenantojn, kiuj nur malfacile trovis sufiĉe da loko apud la aro da tabloj. Tiom da gastoj! Zorgi pri ili, plenigi gorĝojn kaj stomakojn, bezonis dum tuta semajno laboregon de pluraj „taĉmentoj" de kompetentaj virinoj, kompreneble same de buĉi-pretaj fraŭloj – kaj tiel okazis ĉe ambaŭ bogepatroj. Ĉu la fianĉa familio postrestu en la okuloj de la vilaĝanoj? Ŝajni pli avara ol la gepatroj de la fianĉino? Neniel! Tio estus absolute malebla!

Kiam mi sukcesis apudiĝi al la patro de la fianĉino, mi ne povis ne demandi lin:

– Tiom grandan valoron vi elspezas dum tiu festeno! Ĉu tio ne estas tiel troa, sincerdire?

– Tute ne, estas ja kutimo! Cetere la kostojn bone kompensos la aro da donacoj. Ne forgesu, la gastoj dediĉos multe al la juna paro.

– Tamen, kiom da nutraĵo estas preparita por tiom da gastoj?

– Se mi listigos, ŝajnos altaj la nombroj. Tamen ĉe la du domoj konsumi kvar porkojn kaj dudek ŝafojn ne estos tro, ĉu ne? La centoj da kortbirdoj kaj du sakoj da bakaĵoj estas nur aldonaĵoj, kune kun la multcentoj da diversaj boteloj, nu, vi komprenos, estas gastigataj entute preskaŭ sescent personoj. La du familioj havas ja tre multe da parencoj kaj amikoi, venintaj ankaŭ de ekster nia vilaĝo.

– Mi vere demetas la ĉapelon antaŭ tia amasa geedziĝa festeno! De kiam ekzistas tiaspeca tradicio ĉi-loke? Mi apenaŭ opinias ĝin centjara!

– Vi pravas, amiko, sed nur duone. Festeno okazis jam en la tempo de miaj avoj, kvankam multe pli modeste, kun nur dekoj da invititoj kiuj kunportis ion ankaŭ por trinki kaj kuiri. Ankaŭ dum kaj post la mondmilito estis ankoraŭ mizere, pro tio estis eĉ malpermesite buĉi pli, ekzemple ol du ŝafoj. Sed depost du-tri jardekoj nia vilaĝa kooperativo jam prosperas eminente, kaj nuntempe la familioj kvazaŭ vetkuras en tiaj aferoj, ni vivas ja en vilaĝo!

La blovorkestro muzikis laŭtege, la animoj ŝajnis ekardi vigle kantante, gajeco regis ĉe la longaj tabloj. Apud mi sidis maljuna ineto, kiu trempis en brandon la kukon por igi ĝin mola por siaj malfortaj dentoj. Gaje ŝi alrigardis min, la nekonatan gaston, kaj scivole demandis min, ĉu mi estas parenco? Eksciante, ke mi estas simpla gasto el la ĉefurbo, ŝi konfidence eksusuris:

– Ĉu vi scias, ke Ada ne amas la fianĉon, Karlon?

– Ĉu vere? Kaj tamen ŝi edziniĝos nun?

– La bogepatroj trudas tion al ŝi! Ili eĉ konstruigis jam por la juna paro loĝdomon, ili ricevas aŭton krom la mebloj kaj ceterajoj... Sed ŝi forte amas aliulon, inĝenieron, kiu estas orfa kaj malriĉa. Kaj tion ne toleras la gepatroj, ĉar laŭ ili sole bonhava viro konvenas al ŝi, malriĉa edzo nur duonigus la perlaboritan havaĵon!

– Kaj la amo?

– Nu, tio estas nur iluzio, laŭ la gepatroj, demandu nur ilin! – respondis la maljunulino, sed ŝi jam foriĝis de mi, eble pro la min sekvantaj rigardoj de la patro de Ada.

Are venis la gastoj en la korton, ili portis grandajn pakaĵojn, la nupto-donacojn. En pluraj kaldronegoj bolis ŝafaĵo, sur tabloj oni distrancis buĉitajn porkojn, iom fore virinoj senplumigis kortbirdojn. La ceremonioestro – profesiulo en tiu „brancĉo" – ĉesigis la muzikon kaj per versaĵoj anoncis la baldaŭan ekmarŝon al la geedziĝa ceremonio. Post iom da atendo aperis la fianĉino en tradicia blanka bestaĵo, kaj kun sia atestanto ŝi ekmarŝis post la orkestro. Sekvis ŝin la fianĉo kun lia atestanto, la bogepatroj, parencoj kaj poste la tuta nupta aro. La longan homvicon pretere geknaboj akompanis, la aeron plenigis la muĝado de la orkestro.

La matrikulisto jam atendis nin. Li iomete oratoris pri devoj de la geedzoj, kaj finante tion li metis solenan demandon:

– Ĉu vi volas edziĝi al Ada?

Post la jesa respondo, li demandis la fianĉinon.

– Tute ne! – sonis ŝia konsterna respondo. Ŝi ĵetis teren la fianĉinan vualon kaj la orringon, turnis sin kaj ekkuris al la pordo. Ekstere proksimiĝis motorciklo, haltis por momento, kaj Ada alsidis malantaŭ sveltan junulon – tiu estis Adamo! Post sekundoj ili jam estis for...

La vualon kaptis la patrino de Ada, kaj plorante ŝi kuris post sia filino. La orkestro miskomprenis la altenlevitan blankaĵon kaj brue ekmuzikis kvazaŭ triumfe. La bogepatroj staris senkonsile, ruĝe-pale pro honto. Eĉ la ceremoniestro ne sciis kion fari...

Kara Leganto! Eble vi scias kion fari, ankaŭ tion, kio okazis poste. Tial ni petas vian helpon; la plej bona teksto aperos en Hungara Vivo kaj la aŭtoro ricevos libropremion.

Limdato: unu monato post la apero de la historio.

DAŬRIGO

de la novelo „Fabelo pri kolomboj"
aperinta en la numero 1984/4
Daŭrigas: Sergej Verŝinjin, Uljanovsk, SU

Dum tiu nokto la urbestron obsedis inkuboj. En sonĝo ŝajnis al li, ke sur la placo amasiĝis la loĝantaro, oni perfingre almontras lin, dirante: Jen la patro de la urbo, kiun ni respektis, kaj kiu lasas ĉion malpuriĝi! Ankaŭ la statuo montris al li, tenante en la alia mano la neston de la kolomboj. Sed aperis alia homgrupo de kie sonis minacoj: Jen la malprotektanto de la senkulpaj kolombetoj!

Ŝvitante la urbestro vekiĝis, sed antaŭ liaj revaj okuloj ree aperis la granda verkisto kun la nestantaj kolomboj. Ege li oscedis, sed kaptis lin grandioza ideo.

Post la kunsido de la magistrato oni anoncis grandan ceremonion sur la placo. Kiam kolektiĝis multaj urbanoj tie, la urbestro elpaŝis kaj ekparolis jene:

– Estimataj civitanoj de nia bela urbo, vi devas scii, ke la magistrato firme gardas la grandiozan aspekton de nia urbo, same la purecon de la monumentoj. Ne estas alie koncerne nian grandan verkiston, kies memoron ni respektas. Ni jam delonge preparis tre konvenan nestejon por la ĉarmaj birdetoj, kiujn ni ofte plezure rigardas, ĉar nia urbo estas fama ankaŭ pro sia bestoprotektado. La nestojn ni delikate forportos tuj al la nova loko. Eminenta skulptisto eklaboros por ŝanĝi la pozicion de la mano de nia fama verkisto, kaj tiel iĝos maleble al aliaj birdetoj eventuale malpurigi lian monumenton.

– Brave, brave! – sonis kontente de ĉiuj flankoj, ĝis oni disiris, nun jam tute trankvile. La problemo, kvazaŭ vapore, neniiĝis.

AŬTUNA ELEGIO

Ek! Atentu min! Skribu ne pri tiuj idiotaĵoj, kiel kutime, oni ne devas ĉiam humorumi, ja en la vivo eĉ aliaj aferoj ekzistas, la ridaĉo ne estas ĉio, ĉu vi komprenas? Tion priskribu, kion mi rakontas al vi, ĉar tio estas vera, viveska. Pri Serafino. Tio estas ŝia originala nomo, kaj komence ŝi estis belega fraŭlino, sed poste ŝi edziniĝis al Eŭgeno. Sed atentu, ĉar nun venos la komplikaĵo, pli bone ĝi komencis veni pli frue, ĉar la juna geedza paro havis komunan amikon: Desiderion, kiu jam estis la tria, ĉu vi komprenas, la koncerna tria, kiam Eŭgeno ankoraŭ ne estis la dua, pli precize la unua: la edzo.

La juna geedza paro estis fakte triope jam de la unuaj tagoj, ĉar Desiderio, havanta grandegajn lipharojn, estis kun ili ĉiam, ja Desiderio ŝajnis esti amiko de Eŭgeno, ne tiu de ties edzino.

Tion multaj signoj atestis. Unue Eŭgeno kaj Desiderio ambaŭ estis entuziasmaj kartludantoj, kaj se montriĝis ebleco, ili ludis kune. Ili preferis same la 14-kartan francan karto-ludon, kaj same tiel favoris la „dudekunu"-on, kiel ĉian alian kartludon, nur tio estis la grava, ke oni povu malgajni. Eŭgeno havis bonan salajron, ĉar kiam li ne kartludis, li estis maŝina inĝeniero, tre ŝatata en sia profesio. Desiderio havis iom nebulan profesion, kies nomon oni ne povas per unu vorto karakterizi, kiel: kuracisto, advokato, aŭ instruisto, ĉar Desiderio okupiĝis foje pri tio, foje pri io alia, kaj foje pri eĉ io ajn. Oni ne multe okupiĝis pri tio, ŝajne li vivis ordinare, ne havis zorgojn, kaj kapablis akiri la ĉiutagan monon por kartludi. La du viroj pli multe estis kune, unu kun la alia, ol kun Serafino, kvankam la edzo aŭdis malbonajn vagantajn ĉikanparolojn, ke lia edzino kun Desiderio..., sed li nur ridetis pri tio. Eŭgeno sciis tre bone, Desiderio estas amiko, kaj Desiderio pro li devas toleri eĉ Serafinon, kiu – kiel mi menciis – unue estis belega, sed tio ne daŭris, ja la tempo pasas, kaj Serafino komencis iom post iom velki. Kaj tiam, ĝuste iun aŭtunan tagon erupciis la tragedio. Desiderio laboris jam ekde jaroj ĉe la geedza paro kiel subluanto. Kaj mi devas diri, ke laŭ-vorte li laboris. Ĉiam li helpis en la hejma laboro, lavis, gladis, telerojn-loĝejon purigis, plej multfoje eĉ la aĉetadon faris li, unuvorte li estis nemalhavebla. Dume Serafino velkis hejme mallaŭte, kiel floro.

Verdire la malbono devenas de tie, ke Eŭgeno – la edzo – pro io interkverelis kun siaj kartludpartneroj. Ĉar ĉe unu el ili estis pli da fokeroj ol povus esti en la tuta kartaro, kaj tial Eŭgeno ofendiĝis. Li forlasis ilin, kio ankoraŭ ne estus malbono, ja li estis je malvenka serio, sed li eraris per tio, ke kun strečitaj nervoj, kiel vundita leopardo, li iris rekte hejmen. Kaj hejme li trovis Serafinon kaj Desiderion en tia situacio, kvazaŭ Serafino estus la edzino de Desiderio. La aferon oni ne povis miskompreni.

Serafino spiteme foriris en la alian ĉambron, lasante la virojn duope, la cetero jam ne estis ŝia afero.

Eŭgeno nervoze palpadis la kartaron en la poŝo:

– Mi aŭdis pri vi malsaĝajn ĉikanparolojn, sed nun mi jam ĉion scias. Tiel ne povas resti plu – li diris kaj prenis la kartaron.

– Decidu la sorto! Ni faros unusolan dudekunu-ludon. Kiu venkos, tiu gajnos Serafinon, kaj prete! – kaj li komencis jam disdoni la kartojn. Sed antaŭ ol Desiderio estus rigardinta la unuan karton, Eŭgeno aldonis:

– Ni metu ankaŭ po dek forintojn, por ke estu io ekscita en la ludo.

János Doktor

Mikaelo Korotkov

Mi estas vi post unu jaro

Finiĝis labortago. La lasta ĉi-jare. Precize je la kvina nia laboratorio malpleniĝis, sed al mi, kiel ĉiam, ne sufiĉis dek aŭ dek kvin minutoj, por fini tion, kion mi planis matene. Kaj kiam mi finfine ĉion faris kaj pretiĝis iri hejmen, nekuraĝe eksonis la telefono.

Obtuza kaj malproksima, preskaŭ nereala voĉo en la aŭskultilo sen ia klarigo komencis:

– Hola! Ĉu estas vi? Kiel bone estas, ke mi vin ankoraŭ kaptis. Al mi tio estis treege malfacile, tiel neniaokaze demetu la aŭskultilon. Nun mi diras al vi ian nekredeblan aferon...

– Aŭskultu, vi verŝajne opinias, ke ni estas bonaj konatoj. Sed mi tion ne povas diri...

– Jes, ni estas tre bonaj konatoj, kaj vi tion baldaŭ komprenos. Aŭskultu min atente, mi ĉion klarigos. Ĉu vi memoras, antaŭnelonge vi sendis petskribon al la komitato de inventoj ? „Temporelajso kun negativa reteno".

– Sed vi, propre, de kie scias pri tiu petskribo?

– Mi ja diris: aŭskultu kaj vi ĉion komprenos. Nu jen, surbaze de tiu relajso mi faris kompletigaĵon por la telefono, kaj tiel oni povas paroli kun la pasinteco. La telefonretoj havas unu tian interesan econ... Nu, tion vi baldaŭ mem ekscios. Kaj jen – nun mi parolas kun vi, pli ĝuste – kun... hm... kun mi mem. Mallonge dirante, mi estas vi post unu jaro. Penu ekkredi je tio kaj ne meti plu nenecesajn demandojn. Ni havas malmulte da tempo, la kontakto povas en ĉiu momento ĉesi. Kaj la afero estas jen en kio. Hodiaŭ kiel vi memoras, vi invitis por la novjara vespero Tanja-n...

– Tio estas ja tute ne via afero! – Mi komencis jam ion suspekti.

– Ho, karulo, ni ne havas tempon por tiuj detaloj! Se vi ne obeos min kaj estos plu la sama naivulo, tiam... Mallonge dirante, hodiaŭ vi kun Tanja kverelos. Pro tre stulta kaŭzo. Venĝe vi konatiĝos kun alia junulino, kiu... Pardonu, mi jam babilaĉas superfluaĵojn. Vi ne bezonas scii tion. Nu, kaj Tanja, por venĝi al vi, ankaŭ konatiĝos... Nu, la rezultoj estos la plej teruraj, kredu al mi. Kaj por ke tio ne okazu, vi hodiaŭ devas esti maksimume afabla, karesema, cedema, kaj cetero. Ĉu vi komprenas, maksimume. Promesu.

Mi ekridis kaj demetis la aŭskultilon. Iu preparis al mi sufiĉe spritan ŝercon. La voĉo estas treege konata, sed mi ne povas kompreni – kies. Kio do, la ŝerco estas nemalbona, ĉio estas konsiderita: mia emeto al mistiko, altiriĝo al inventemo, eĉ la relajson li ne forgesis. Al mi ne plaĉas nur, ke tie figuras Tanja. Li estas, certe, arogantulo.

Ĝis la vespero mi ĉirkaŭkuris vendejojn, serĉante rafinitajn manĝetaĵojn (dum la tuta vivo mi ne havis pli agrablajn zorgojn!), kaj pri tiu ŝerculo mi ne rememoris.

Kaj vespere, ĉe la festa tablo kun mi sidis apude Tanja. Ĝis la fino de la jaro restis jam ne multe da tempo, mi jam imagis, kiel ni plenigos la pokalojn per ŝaŭma trinkaĵo. Kaj dume mi gajigis Tanja-n per antaŭe speciale preparitaj rakontoj el „Krokodil".

Kaj tiam denove susuris nekuraĝa rompema telefona voko.

– Hola! – apenaŭ aŭdeble sonis en la aŭskultilo. – Denove estas mi. Lastfoje la kontakto rompiĝis...

Mi ekridis plej moke, kiel mi povis.

– Nun aŭskultu atente – mi diris al la ankoraŭ nekonata ŝerculo. – Via profetaĵo ne realiĝis. Tanja estas nun ĉe mi, niaj rilatoj estas bonegaj. Ĉu vi aŭdas? Bo-ne-gaj. Kaj ne malbonigu nian feston.

Mi demetis la aŭskultilon kaj rimarkis, ke Tanja subite malgajiĝis.

– Kun kiu vi parolis? – preskaŭ plore ŝi demandis.

– Tanja, ne zorgu pri tio. Iu... hm... nenormalulo mistikas min dum la tuta tago. Li diras, ie li estas mi, kaj ke li telefonas al mi el la estonto – mi balbutis, komprenante, kiel idiote tio sonas.

Ĉu eble li telefonis de sur Marso aŭ el alia galaksio? Kial vi parolis al li pri mi? Ne provu senkulpiĝi, Andreo. Mi ĉion komprenis. Tio estis unu el miaj antaŭulinoj. Amikinoj rakontis al mi, ke vi havis ilin pli ol sufiĉe.

– Tanja, mi asertas, kun neniu mi havis ion seriozan.

– Jen tio min pleje timigas. Vi ne havis ion seriozan kaj ne havos. Pardonu, Andreo, sed ĉe mi malaperis la humoro renkonti kun vi la Novjaron. Prefere mi iros hejmen.

Diablo prenu! Ni kverelas pro tre stulta kaŭzo. Ĉu realiĝas la antaŭdiro de tiu arogantema profeto? Mi penis, kiel li konsilis, esti maksimume afabla, cedema. Ĉio estis vana.

Tanja foriris. Kia stultaĵo!

Mi senforte sidiĝis sur seĝo, fiksis la okulojn al la brila botelgorĝeto kaj provis koncentri pensojn. Nu, bone. Mi reale elpensis temporelajson kun negativa reteno, tio estas, simple dirante, kun antaŭago. Nu, supozu, ke per ĝia helpo oni povas aranĝi telefonadon kun la pasinteco. Jen, nun Tanja foriris, kaj post unu jaro mi rememoris, ke antaŭ jaro mi devus konduti alie kaj ne permesi tion. Kaj nun li (tio estas mi, tiam, post unu jaro) komprenis, ke li perdis Tanja-n definitive. Li jam dum la tuta jaro ne renkontiĝis kun ŝi. Ĉu oni povas nun ion aliigi? Post tio, ke li (t.e. mi) konatiĝis kun alia junulino, eble eĉ edziĝis, kaj nun li volas ĉion

returni en la antaŭjaran pozicion? Ne, estas faritaj jam tro multe da stultaĵoj. Li ja tie (t.e. mi) ne estas naivulo, kiu esperas pri neeblaj aferoj. Tio signifas, ke ĉi tiun tutan absurdaĵon ne indas konsideri serioze.

Tie estas io alia. Haltu! Kial propre Tanja foriris? Ĉar ŝi aŭdis nian absurdan telefonan interparolon. Pri tio, ke ni kun Tanja kverelos, li antaŭsciigis min dum la tago. Kaj ni kverelis post la vespera telefonado, kaj post ĝi ŝi foriris. Se ne estus tiu stulta konversacio kaj entute ne estus mia mistera identulo, ne okazus tiu kverelo. Jen, tio estas la ĉefa punkto!

Ni provu rigardi ĉion de alia flanko. Iu, ni nomu lin sinjoro X. volas kvereligi min kun Tanja. Li serĉas por tio ĉiajn artifikojn, kaj tiu novjara fabelo estas unu el ili. Tiu X havas certajn artistajn kapablojn, li lernis imiti mian voĉon, tonakcenton, ekmastris miajn ŝatatajn vortojn. Tio ne estas malfacila. Plu, li scias pri la relajso... Nu, tio estas sendube Viktor! La sola homo, kiun mi inicis al tiu sekreto. Neniam mi pensis, ke Viktor estas kapabla tiel idiote ŝerci. Kio do, hodiaŭ mi, verŝajne, ankaŭ amikon perdis...

Nun mi iros al Tanja kaj ĉion rakontos al ŝi. Se ŝi komprenos kaj kredos, ni kune ridos kaj ĉio returniĝos al la komenco de ĉi tiu vespero.

Kaj tiam denove sonoris la telefono. Ĉu denove estas Viktor? Ĉu li volas pardonpeti, aŭ li elpensis ankoraŭ unu mistikaĵon?

– Tio estas mi – kun ekspiro diris la jam konata voĉo. – Vi, verŝajne, ĝis nun ne kredas al mi?

– Viktor, iru al diablo! Via ŝerco jam malbone finiĝis por mi.

– Kio, ĉu Tanja jam foriris? Eh, mi jam antaŭsciigis vin! Kaj ne nomu min Viktor. Sed sciu ankaŭ mi en tiu ĉi vespero havis penson pri Viktor, nur en alia kunteksto. Kurioze estas... Kaj kun Tanja tamen penu repaciĝi, spite ion ajn. Mi petas vin, kiel viro viron. Ni ne povas vivi sen ŝi. Jene. Nu, tion vi mem komprenos post certa tempo. Kaj por ke vi kredu tamen al mi, mi elpensis nerefuteblan argumenton. Nun ni havas jam aprilon de la jaro 1986. Ekde la momento de nia lasta telefonado pasis tri monatoj. Dum tiu tempo mi lernis ne nur paroli kun pasinteco, sed ankaŭ teleporti al ĝi etajn aĵojn. Nun mi iros kaj kuŝigos en vian poŝtkeston la hodiaŭan ĵurnalon. Hodiaŭ estas la kvina de aprilo 1986. Ĉu vi komprenis min? Hola. Mi ne plu aŭdas ion. Io verŝajne, difektiĝis...

Ne, tie nenio difektiĝis. Simple mi silentas. Mi ne scias, kion respondi. Mi ja ĵus pruvis al mi mem, ke tio ne povas esti iu telefonado kun la estonto, ke tio estas nur ŝercoj de Viktor. Nun mia tuta pruvo detruiĝas. Li mem ja petas min repaciĝi kun Tanja. Sed eble Viktor simple ekhontis. Ankaŭ tio ne estas ekskludebla...

Jes, mi devas nur iri kaj rigardi la poŝtkeston. Se tie ne estas iu ĵurnalo, mi devas tuj trovi Tanja-n kaj ĉion rakonti al ŝi. Ŝi devas kompreni, ke tio estis io stulta, sed tamen nur ŝerco. De mia neseriozema amiko.

Mi iras al la poŝtkesto, kaj mia koro forte batas. Iu ĵurnalo tie kuŝas! Nun mi ĝin elprenos kaj rigardos daton...



Szilveszter Örüögh

MARO KAJ MEVO

Do, ili ekis. Jam tute egale. En la nekonatecon. Post ili la kamparo. „Mi proponas, eku, Imre! Montru la maron al Etuska! " – Vince Árendás konvinkis lin. Li suspektis komence, ke li nur ĉikanas. „Kial, diable, ĝi estas bezonata por ni? Nur akvo. Kaj gapi ĝin, kial? " „Sed Imre, tamen ĝi estas maro! Kaj Etuska ankoraŭ ne iam vidis tiel grandan akvon! Do, portu ŝin tien! Por kiu lepro tiel ekzistas la aŭto? " „Por porti furaĝon al la porkoj" – Etuska pikis lin per la frazo. Se tiel estas, tiam ek, ek al la mondo!

Stultaĵo. Per kiu fi-ilo porti la porkomanĝaĵon? Per biciklo ne eblas porti tiom. Tri-kvar fojojn oni devus returni sin. Kaj por tio ne ekzistas tempo. Apud tri laborsekcioj ne ekzistas. Sed tute egale. Vidu la maron ankaŭ la edzino. Nun ŝi povos spekti ĝin bone. Ja ili ekis.

Ili ne povas kion diri unu al la alia. La edzino rigardadas la fremdajn surskribojn. Per okuloj kuntiritaj, kvazaŭ ŝi sukcesus iurezulte literumi ilin. „Sed kiel ni interkompreniĝos? " – Etuska objetis. „Ej nu, vi ja havas manojn: vi ĝirafos! " – kaj Vince nur ridadis. „Same kiel la surdmutuloj, ĉu ne? " – la vangoj de Etuska ekruĝis, eble pro la honto. Eble ŝi komprenis tion ofenda. „Jes ja! " – Árendás nur ridis. „Nu ja, ni aspektos belaj! " – ankaŭ li devis ekvoĉi. „Ni gestados sur la brila marbordo kiel idiotoj."

Nu ne! Ili ne parolos, prefere. Ili ne iros inter homojn. Eĉ en restoraciojn ili ne iros. Ili kuiros por si mem. Ekzistas tie kuirejo, tion diris la edzino de Vince. Ili kunportis terpomojn, grason, cepojn, tion kaj ĉi tion. La viandon ili nepre povos elekti, kaj ankaŭ la panon. Tiaĵojn ili ne kunportis, ili ja malboniĝus. Estos tiel. Ili parolos prefere nur kun la maro. Kun ĝi ili nepre interkompreniĝos. Ili venis ja nur pro ĝi. Por vidi ĝin rekte kune.

Eĉ nun ili ne scias kion diri. La viro atentas pri la vojo. Li sentas spasmon en la brakoj. Eble eĉ la aŭto estas alie stirebla sur tiu fremda tero. Eble malsamaj estas la trafiksimboloj, ĉio. Hejme li kapablis transportadi la porkomanĝaĵon, sed eksterlande veturaĉi? Li kuraĝis eĉ ne sonĝi pri tio. Li volonte estus jam alveninta, post ĉio ĉi. Li tremas, eble surglitos la timo ankaŭ la okulojn, kiel jam la brakojn. Sed li ne diras tion, prefere ne paroli pri tio. Jes ja, ili vojaĝas somerumi, al la maro. En la vivo la unuan fojon kune. Li dirus abrupte: jen, nia nuptovojaĝo. Tamen li silentas.

Ili ja tute ne volis eki. Solaj. „Vi kial ne kunvenas? Ni havas lokojn! " „Nun ni iros en alian lokon. En Vienon! Onidire tie eblas akiri belajn aĵojn. Nur estas multekosteco." „Multekosteco ekzistas ĉie." – Etuska diras, kvazaŭ havante spertojn, al la edzino de Vince. „Jes, nature... tamen ni rigardos ĝin, eĉ tio sola valoras! " Geedzoj Árendás vojaĝos al Vieno. Ilia afero. Kaj ili pelas ilin al tiu vojaĝo al la maro. Ili ne povis retiriĝi. Tio aspektus malkuraĝo. Jes ja, vere: Etuska ankoraŭ ne vidis la maron, do ŝi vidu ĝin. Se ili estus jam revenantaj, sen iaj damaĝoj.

– Maizejo – la edzino per okuloj montras al la kampoj.

– Jes – palpebrumas tiudirekten la edzo. – Kaj tie terpomejo, ĉu vi vidas ĝin?

La edzino kapjesas. Je tio ili ne estas trompeblaj. Sed je la ĉambrokostoj aŭ ĉe la panvendisto, viandisto? Li demandos ĉion kvinfoje, laŭsilabe. Li skribigos. Prefere malrespekton ol trompon. Ja oni trompas eĉ hejmlande. En tiu nuntempa mondo nenie eblas senti sin sekura. Kiun eblas fidi, kiun entute? Ĉies pensoj turniĝadas ĉirkaŭ la mono, ĉirkaŭ kiel eble plej multe da mono. Ne ĉirkaŭ la honesto.

La viro glutas, tamen li devus ion diri: ĉu vi scias, ke tio estas nia nuptovojaĝo? Malfruiĝinta tridek jarojn.

Stultaĵo. Certe scias ankaŭ Etuska la samon. Ŝi nepre scias. Eble tial ŝi diris post longaj kaporompadoj, interpersvadoj: „nu, bone."

La aŭtoj plimultiĝas. Oni ĉiam pli spasme tenas la stirradon, oni eĉ malpliigas la rapidecon. Kio okazus al ili, dio helpu, se ili karambolus? Nek sufiĉe da mono, nek lingvoscio, nenio... Kiel ili rehejmiĝus?

Ne mankis al ili tiu ĉi ekskurso. Nur zorgoj, nervostreĉo. Familio Árendás, ili estas malsamaj, Vince en la militkaptitejo ankaŭ la lingvon ellernis, iom. Li ĉiam troviĝas inter homoj, do ne estas mirakle, se li volonte iradas-venadas, vagabondas. Ili ne enviis ilian mondvagadon, tamen ili ekŝanceliĝis, kiam Vince persistis: „Be, Imre, tiom ja meritas Etuska! " „Lasu, Vince. Sen maro mi eltenis ĝis nun, mi eltenos ankaŭ poste." „Tamen ne tiel! Ĝis nun vi ne havis eblon, tempon. Sed nun? Jen la bela aŭto, ĉio..." „Sed kiel aranĝi la ĝardenon, la dombestojn? " „Imre nun vendos laŭkontrakte la porkojn, kaj via filo ion donos por manĝi al la kokidoj, li eble eĉ la ĝardenon akvumos, se necese." „Aj, li havas tiom da cetera farendaĵoj! " La filo ĝuste tiam alvenis hejme, ĝuste ĉe tiuj vortoj de Árendás. „Nu, fine! Mi plenumos ĉion, decidu nur vojaĝi! " Do, ankaŭ la filo fortigis la partion de Árendás. Ili ne trovis alian eliron. Ili devis provi la maron.

Stultaĵo! Maron por kampulo!

La edzino sidas kunpremante la lipojn, tiel ŝi rigardas la fremdan mondon. „Foje mi ŝatus ankoraŭ al la montaroj. Al la silento de la montaroj." Al neniu ŝi malkovris tiun sian sekreton. Ŝi gardis ĝin obstine, kiel la voton la unuafoja komuniiĝanto. Ŝi ne scias kial, sed ŝi sopiris plie al la montoj ol al la maro. Ĉar kion ŝi povas komenci per la maro? Ŝi ne baniĝos en ĝi. Ŝin doloras, kvazaŭ fendante, la kruroj. Ŝia korpo bezonus varman kuracakvon. Do, ŝi ne sopiris al la maro. La montoj estas malsamaj. Tie ŝi povus vere soli. Soli, kiel imagite en la revoj. Inter aromoj, brakoproksime al la nuboj.

– Oni rikoltas la terpomojn – nur voĉas la viro. Jes. Nun estas sezono de la terpomorikoltado. Ĉu iam li estis kuraĝa pensi, ke en tiu tempo li flugas al la maro per aŭto? Oni devus ankaŭ tion diri al Etuska, ĉu ŝi memoras pri la someroj, pri la aŭgustoj? Pri la unuaj someroj en kvardek dua, kvardek tria, kvardek kvara? Sed kial ĉagreni ŝin per tio? Eĉ memori pri tio ne estas bone, plie ne konversacii. Nun oni devus paroladi pri pli ĝojaj aferoj, ja ili vojaĝas somerumi, tiu ĉi estas la nuptovojaĝo.

La virino rigardas atenteme la kampojn, la sin klinantajn, en la nenion naniĝantajn homojn. Ili staris tie en la korto, sur la ĉaro estis ĉirkaŭ dudek kvintaloj da terpomoj. Ŝi malfermante la pordegon eĉ ridetis iome. Poste ŝi abrupte metis la manojn antaŭ la buŝon: „Jesuo mia! " Ŝi nur rigardis nekrede, la fingroj kaptadis la terpomojn. „Jesuo, Patro mia! " La okuloj larmiĝis. La edzo diris nenion, li gvidis la ĉevalon en la stalon, donis al ĝi trinki, ĵetis fojnon antaŭ ĝin. Nur poste li staris apud la ĉaro, kubutis sur la flanktabulon. „Grilotalpoj, kano." La edzino balancis la kapon. „Nun oni povas elĵeti la tuton." „Mi ne povis fari ion kontraŭ! Tiu malbenita tero! Tiu aĉaĵo! " La kooperativo donis ĝin kiel ĉirkaŭdoman bieneton dirante, ke ĝi estas tre konvena, eĉ pli granda ol

unu arpento. El dudek kvintaloj da terpomoj dek kvin estas neuzeblaj. Nevendeblaj, uzeblaj nur por porkoj. La edzino ploris. „Ne ploru! Per tio vi helpas jam nenion! " Fine ili komencis selektadi, senvoĉe. Ilin ĉiujn po unu, en tri grupojn: la vendeblajn, la konvenajn por la propra kuirado, tiujn por la porkoj. Noktiĝis.

– La kamparanoj ĉi tie estas ankoraŭ privataj – diris la edzo.

– Ĉu tie ĉi ankoraŭ ne okazis la agitado? Ĉu ili ne faris kooperativajn grupojn?

– Ŝajne, ne.

Silento denove. Vane, ili ne scias kion diri unu al la alia. Kvankam nun eblus paroladi. Priparoli ĉion, ekde la komencoj. Ja, ili nun kunestas, solaj. Kunfermitaj en la bela aŭto, kaj ili vojaĝas al la maro por vidi ĝin. Ja tio estas la nuptovojaĝo post tridek jaroj. Eblus paroladi, ili havas tempon, nenion ceteran eblas fari. „Etuska" – „Imre". Sufiĉus diri nur tiom. Tridek jarojn sufiĉis. Aŭ nur tuŝi la manon de la alia. Nur apenaŭe, tamen senti la alian, ke tiu ĉeestas. Sed la manoj de la viro plie spasmiĝas sur la stirrado, kaj tiuj de la virino ekdormis en la sino.

Tio ne konvenas al ili. Ili maljuniĝis por la ama pasio. Ili apatiiĝis pro la suferoj. Tamen oni devus provi, eble tamen? „Etuska, ĉu vi memoras?" Pri kio ŝi devus memori? Ĉu pri noktoj, pri tagoj? Ĉu pri ĝojoj? Ĉu ili entute havis ĝojojn? La infanoj estas jam longe for, ili forflugis kiel la sovaĝaj anseroj. Tiuj estas videblaj ĉiam nur tiel, alte, supre, en la aŭtuna krepusko kiel ili gakante malaperas en la nuboj. Nur la plej malgranda estis kun ili. Ili timas ankaŭ lian foriron.

Tamen ne necesus la maro. Ĝi ekzistas ne por ili. Al ili pli konvenas la hejmo, de la kuirejo ĝis la korto, ĝardeno, porkejoj, de la domo ĝis la angulo. Por ili estas pli konvene spekti la televidon antaŭ la ekdormo, ĝi estas ankoraŭ indulgo por la laciĝo. Kion spekti ĉe la maro, ĉu unu la alian? Tio ne mankis al ili. Jam ne. Ili estas jam post ĉio. Ili ne plu riproĉas jam ion. Ili ne kulpigas jam iun. Ili ne plu havas fortojn jam por tio. Oni devas foje ellerni ankaŭ la senparolon, oni devas amikiĝi kun la silento, se alvenos la tempo. Kaj la akvo de la maro estas glacie malvarma. La artikoj kaj la ostoj terure doloras ilin.

Ili antaŭeniras kviete-malrapide, kvazaŭ ili estus gesinjoraj moŝtoj. Kial ili, do, kverelus kun la vivo. Ili havas bonan sorton. Pli bonan ol iam ajn. Kial plendi. Poste ili hontus antaŭ la maro.

– Ĉu la tero ĉe ni hejme estas pli bona?

– Diablo scias. Oni devus provi.

La tero. De kiam li eksiĝis el la kooperativo, kiel li scius, kia estas la tero. Jam pli ol ok jarojn. Li povas scii nur, kio estas la tri laborsekcioj. De la matena sesa ĝis la dua, de la dua ĝis la deka, de la deka ĝis la matena sesa. Li povas pruvi nur tion, la teron ne plu. Ĉu ĝi mankas? La viro balancas la kapon.

– Kio okazis? Ĉu doloras vin la okuloj?

Li devas fortostreĉe palpebrumi.

– La trafiko estas pli granda, oni devas plie atenti.

– Ĉu vi estas laca?

– Ne.

„Etuska, ĉu vi amas min? " – „Imre, ĉu vi amas min? " De kie reeĥas tiuj vortoj? El kia vespero, el kia silento? Kie jam la pseŭdoakacioj, kie jam iliaj floroj? Kie la rosaj frumatenoj? Ĉu tio estas entute ilia voĉo, ĉu la ilia?

Bele aranĝis ilin tiu familio Árendás. „Nu fine, viaj kapoj ekfunkciis! " „Mi diras prefere, ke ili komencis malfunkcii." Ili rigardadis la paperojn, la pasportojn, ili ŝovadis la fingrojn sur la aŭtomapo. „Vi spertos, ke tio valoros! Ĉu vi scias, kiel eminentajn virinojn vi spektos? Sur la marbordo?! Eĉ nudista plaĝo ekzistas! " „Kio ĝi estas? " – Etuska demandis. La okuloj de Vince ekbrilis. „Tio, ke oni sunbanas sin tute nuda! " „Ĉu eble ankaŭ vi mem estis tie? " „Mi ja provis, se mi jam estis tie, kion vi imagas, Etuska! Mi estis nur scivolema! " „Kiaspeca mondo, dio mia." – Etuska turnis la kapon kaj Vince gaje okulumis. „Hu, Imre, kion ĉion vi vidos! Vi devos kolekti la fortojn! Ho, kiaj virinetoj! Mi proponas, Etuska, eĉ por momento ne preteratentu la edzon, ĉar oni allogos lian koron! " „Se oni allogos ĝin: oni portu ĝin. Ne koncernas min." „Kiel facile vi translasas min." – ankaŭ Imre volis serĉi. „Fremdan havaĵon mi ne bezonas. Neniam mi bezonis ion tian, vi scias bone, ĉu?" Hezita silento disflokis inter ili.

Ĉu virinoj? Pli granda stultaĵo ol la maro. Ja li jam vidis maron, do li scias. Ili kiel militkaptitoj estis tien pelitaj en iu printempa dimanĉo: ili havu feston. Ili staradis sur la bordo, kelkaj kriegis al la marmuĝo, saltadis, enkuris la akvon. Li nur staris, klinis sin, prenis kelkajn konkojn. Li pensis, ke li portos ilin hejmen kiel memoraĵojn. Poste ili rompiĝis iel en la poŝo ĝis li revenis hejmen. Li staris tiam, rigardis la grandan akvon kaj diradis en si mem: maro, maro. Sed li ne povis ion komenci per ĝi. Eĉ la okuloj ekdoloris pro ĝi. Li ŝatis rigardi la kampojn, la ventohirtitajn grenkampojn, la kunigantajn vicojn. Tiu grandega griza akvo estis fremda. Kvankam li vidis ankaŭ la marlojn, la ŝaŭmkrestojn de la ondoj. Tamen li ne povis ĝoji. Pro la mevoj venis al li en la kapon la propraj kolumboj, la stangokesto en la malgranda subtegmentejo, la ŝaŭmo rememorigis lin pri la buŝo de la ĉevaloj kun buŝfero. Vane. Li estas nur tia. Kvankam li strečis la okulojn brave. Jen, tio estis la maro tiutempe. La manko de Etuska, la manko de la filoj. La manko de ĉio, kio restis hejme. Tero, ĉevalo, plugilo, ĉio. Kial, do, li estus krieganta pro la ĝojo pri la maro? Ja li vane rigardis, li ne povis vidi ĝin.

– Nubiĝas. – La edzino sin antaŭen klinante observis supren.

– Vi vidos: super la maro estos nuboj.

– Kial Vince diris, ke la suno brilas ĉiam? Estos tre eminente, se ni eĉ eliri ne povos. – La virino ĉagreniĝis pro la mevoj, ĉar eble ŝi ne vidos ilin. Ŝi ne sciis, kial. Sed abrupte ŝi tre-tre volis vidi la mevojn. Ĉar ili estas neĝblankaj.

– Eblos, ke brilos la suno, kaj super tiu ĉi maro ne estos nuboj. Sed super tiu alia estis.

La edzino forgesis sian rigardon ĉe la edzo. Ŝi aŭdis murmuregon, ŝrikadon, sur la okulojn kuris obskuro. Ŝi sentis en la nazo la kelan ŝimodoron. „Super tiu alia..." Poste en la sedimentiĝanta silento eksonis malfortika infanploro. Ŝi volis ĝin silentigi. „Ne ploru, ne ploru! " Ŝi timis, ke malkovros ilin la eta filo. Tiu neforgesumino. Ŝi preskaŭ ekĝojis, kiam la bomboj eksplodis, kaj en la tondro malaperis la voĉo de la etulo. Sed vane, denove falis sur ilin la pistaĵo-silento, la aviadiloj forflugis. La eta filo pli kaj pli ploregis. „Ĉu eble antaŭsentas ion tiu infano? " La rozario rigidiĝis sur la manoj de la bopatrino. Kaj ŝi mem preskaŭ freneziĝis. „Silentu, ne ploru, ĉesu, eta mia filo, ne ploru! " Ŝi lulis lin, brakumis al si, kovris lin. Sed tiu neniometa homo nur ploregis, nesilentigeble. Ploris jam ankaŭ ŝi mem, mordante la lipojn, tiel ŝi jelpis. „Silentu, etulo, mia! Ne ploru! Ne estas permesate! Ne ĉagrenu min ankaŭ vi, fileto! " Ŝi skuis la malgrandulon. La vizaĝo de la bopatrino estis jam ruĝega. „Aŭskultu, li antaŭsentas ion." „Ba, ĉesu jam! " Kaj ŝi vidis la edzon Imre. Li ekstaris ĉe la tablo, prenis la armean instalaĵon kaj elpaŝis tra la pordego. Ŝi ekkantis. „Dormu bebo, dormu flor', kvietiĝu via kor'! " Ŝi kantis, pli kaj pli laŭte ŝi kantis. La infano jam spasme ploris, liaj vangoj estis jam purpuraj. La bopatrino vane alportis teon, vane. „Ne ploru jam, mi petegas! " – sur ŝia vizaĝo sible susuris la larmoj. Ŝi proponis al li siajn mamojn, sed ŝi jam ne havis lakton, ĝi elsekiĝis. Ŝi vertiĝis, ne povis teni la vindaĵon. Estis nokte. Kuraciston, kie, kiel. „Kredas mi je Dio..." „Mi petegas vin, panjo, preĝi mallaŭte, ĉar mi freneziĝos! " „En tia kazo oni devas laŭte, filnjo, laŭte..." Tamen ŝi mallaŭtigis la vortojn. La infano raŭke ŝrikis, jelpis. Matene en la kribrita lumo ili vidis: lia eta vizaĝo estas jam lila. Ŝi ne povis plu pacienci. Ŝi kaptis lin, premis lin al la brusto: „Ne ploregu, do, ne ploregu! Via patro vivas! Ne estas danĝero! " Kaj ŝi aŭdis la nuran infanploron, la bruo de la bomboj estis nur kvazaŭ zumado de vesponesto, por momentetoj. La bopatrino metis la rozarion, la Maria-skapularion sur la vindaĵon. „Tio helpos, nepre helpos. La Sankta Virgulino certe savos la etan Imre." „Forportu tiujn de ĉi tie! " Eble ŝi fariĝis mensperdinta, ĉar ŝi tiel kriegas. Denove la vizaĝo de la edzo Imre, la armea instalaĵo kaj la pordego, kiel ĝi fermiĝas. La vizaĝo de la fileto estis jam blua. Ŝia propra buŝo gluglis la ploron. „Kial vi ne povas eksilenti, kial! ? Mi estas ĉi tie, fileto mia mi estas ĉi tie! " Li ne plu havis larmojn. Eĉ la larmoj elsekiĝis. La bopatrino en la angulo fermis la okulojn, lulis sin mem. „Sankta Virgulino, savu la edzon Imre kaj la malgrandan fileton Imre..." Poste ne plu eksplodis la bomboj. Enfiltriĝas la silento, peze, kiel ŝlimo. Nur la etulo ploris per apenaŭa voĉo, nur per tiom da voĉeto, kiom havas la ventovolvita putbaskulo. Ŝi svenis. Nun, post tri

tagoj ŝi abrupte terenfalis. Kvazaŭ si vidus la purpuran vizaĝon de sia fileto en neĝblanka glorlumo, poste nenio. Ankaŭ la fileto silentiĝis. Li eble laciĝis pro la ploro. Li ekdormis sen lakto, sen teo, sen lulkanto. La bopatrino vekadis ŝin. „Lia koro kvietiĝis, li ludas jam kun anĝeletoj..." Kaj tiam ŝi vidis: la vizaĝo de la filo ne plu estas purpura. Neĝoblanka. Senmova mevo. La globetoj de la rozario eksusuris. „Unuanaskita fileto mia... dormu bele..." Ŝi ne sciis, ke la lipoj nur moviĝetas, sen voĉoj. Rusaj soldatoj ripozantaj, manĝantaj en la tombejo. Malgranda, blanka ĉerko. La najbaro portis ĝin, zorgeme ĉirkaŭprenante. La tombo, apenaŭ iom pli profunda ol la kavo por la terpom-plantado.

Super tiu alia estis nuboj. Super tiu alia.

Sed ĉi tie brilas la suno! Flugas mevoj! Neĝblankaj!

Oni devas diri ion.

– Mi forgesis diri al la filo, ke li en kiun buŝelon metu la ovojn.

– Li nepre trovos ĝin.

– Mi rezervis kvindek ovojn por knedi pastaĵon. Se li miksos ilin, mi ne scias, kion mi faros.

– Ĉu ne egale, per kiuj ovoj knedi la farunaĵon?

– Kiel estus egale!

Ŝi ne scias, kiel eblis forgesi tion. Kvankam ŝi ĉion ceteran surpaperigis. La papero estas tie, sur la kredenco. Kion, kiam li manĝu, kio troviĝas en la manĝkamero, en la fridujo, kiam iri en la vendejon, kion aĉeti. La lakton alporti. Sabate iri en la tombejon por akvumi. La ovojn ŝi forgesis. Kio nun okazos?

Tamen estis damaĝe veni. Tio ne estas por ili. La familio Árendás estas malsama. Ili havas nek gefilojn, nek dombestojn, ĝardenon. „Etuska, tiu blua akvo! Tiu kristale pura akvo! Tiuj stratoj! Tiuj vendejoj, montrofenestroj! " Sed la edzino pensis senĉese pri la mevoj. En la grandaj montaroj ne estas mevoj. Tial ŝi konsentis veni al la maro. Por la mevoj. Ĉar ili ne ekzistas en la montaro. Tamen ŝi parolis pri tio al neniu. Ŝi nombradis la fremdan monon, ŝi kalkulis.

La edzo jam baraktis ene, anime. La spasmo en la brako, ekscito en la okuloj. Ili almenaŭ ne sidu tiel, tiel mutaj. Se ili jam ekvojaĝis, se ili jam decidis, ili almenaŭ ridetu, ridu. Li diros, li tamen diros.

– Kaj... ĉu vi scias, ke verdire tiu ĉi nuna estas nia nuptovojaĝo?

– Kion vi diras. Post tridek jaroj.

Jes ja, vere. Estus pli bone silenti. „Etuska, vi estas bela! Mi amas vin. Ni estos feliĉaj, nepre! "

– Ĉu Vince Árendás diris tiun stultaĵon? Bele, mi povas diri. Misgustaĵo. Du stultuloj, bela paro.

Jes, vere Árendás diris tion. Li ŝercis, tamen li pravis. „Kaj fine vi povos senĝene kunesti kun Etuska! Do, vi estas ankoraŭ junaj! " Kaj li mangestis malŝate.

Li premas la stirradon. „Sur la bordo la ŝikaj, bankostumaj virinetoj! " Ha, tiu Vince, tiu Vince! Por li estas facile, li estas alispeca. „Imre, ĉu vere, vi amas min, vi ja neniam forlasos min? ! Ni kunapartenas, ĉu ne? ! " De kie li aŭdas tion denove? Ĉu ili mem diris ion tian, iam? Li kvazaŭ vidas la krepuskon, la sekretajn kunkroĉiĝojn, la sinkaŝadon. Tage kaj nokte. Ili estis kiom avidaj, kiom soifaj, kiom malsataj.

– Atentu! – la edzino ekkriis.

Li ne rimarkis la kamionon. Tion, ke ankaŭ ĝi avancas. Li frotas la frunton.

– Ili kuregas, kiel sovaĝbestoj! – la ektimo puŝis la ploron en la gorĝon de la virino.

Li devus konfesi, ke li mem kulpis. Li ne rigardis al la spegulo.

– Mi ja diris, ke tiustila stirado estas destinita ne por mi. Ĉi tie granda estas la trafiko, ili stiras alie ol ni hejme.

– Nun jam malfrue. Se vi estus pli firma, ni estus eĉ ne ekvojaĝintaj.

– Sed ankaŭ mi mem volis, ke ni vidu la maron.

– Por vidi ĝin, oni devas anticipe atingi ĝin.

Kio okazos al ili. Kvin tagoj estas terure longa tempo. Devige fari nenion, kunfermite, inter fremduloj. Kion ili povos diri unu al la alia, kion ili komencu unu kun la alia? Ili sidados sur la bordo, ili rigardos la maron. La mevojn. Ili aŭskultos la murmuradon. Tridek jaroj. Kion ili vidos el la maro, kion? La maro ne estas spegule glata.

– Ĉu la adreson vi gardis?

– Kian adreson?

– Tiun, kiun donis Vince.

– Nepre jes.

„Vi estas bela por mi, kiel mevo! " Ĉu la viro diris tion? „Ĉu vi vidis jam mevojn? " Ĉu tio estus la voĉo de Etuska? „Mi ne vidis ilin, sed oni diras, ke la mevoj estas tre belaj. Ĉar ili estas neĝblankaj kaj delikataj. Ĉar ili estas fidelaj al la maro." Ĉu li mem estus dirinta tion? „Bone, do mi estas mevo. Sed kio vi estas? " Ĉu Etuska ludis kun li tiel, per vortoj? „Ĉu vi scias, kion? Estu vi mem la maro! " „Do mi estas potenca kaj fortika! Nevenkebla! " Certe ili ridis, certe. Kaj ili interkisadis. Neeble, ke ili ne interkisadis.

Si rimarkas la nubojn.

– Tie estos maro.

– Brilas la suno.

– Vi gustumos ĝin: la akvo estos salgusta.

– Tiukaze kial gustumi ĝin?

– Por senti ĝin!

La virino mangestas. Stultaĵo. Ŝi volas nure la mevojn. Nur ilin. „Estos neforgeseble; Etuska, vi vidos. Neforgeseble. Tiuj urboj, tiuj vendejoj! "

Nun jam tre tumultas la aŭtoj. Ili veturas paŝritme. Komenciĝas la urbo.

– Estas pureco – la edzino denove silabumas la surskribojn. – Viandisto.

– Kie? – La viro ne deprenas la rigardon de la vojo.

– Tie. Kaj horloĝisto-juvelisto.

– Do, tiam ni ĝisiros la maron. Tiel diris Vince, ke tie estas la domo.

– Vi kune priparolis la aferon.

La aŭto algluiĝas al la konvojo. Certe en tiu direkto estas ankaŭ la maro. La virino salivumas la sekiĝintajn lipojn. Jes: vendejoj, puraj, belaj domoj, stratoj. Oni vidas nur la nubojn, kvankam vere brilas la suno. Neatendite granda placo, korso. Malantaŭ ĝi ektremas la grandega akvo.

– Ĉu tio estas jam la maro?

– Jes, vere ĝi. Ĉi tie ie mi haltos.

Li malantaŭeniĝas en la parkejon. Li skrapadas por la slipo.

– Nu, ni interesiĝos, kie ĝi estas... kvankam ĝi devas esti ĉi tie, kiel Vince klarigis.

La edzino senvoĉas. Ŝi malfermas la fenestron. Ŝi gvatas al la maro, ne eblas aŭdi la murmuradon.

– Tie la strato, tie vid-al-vide, kaj ĝuste tie la angula domo. Bone diris Vince!

La edzino rigide, iom kuntirante la brovojn, atentas pri la maro. Ŝi serĉas mevojn.

Ili haltas antaŭ la domo.

– Nu, jen tio. Ni alvenis! – La viro mallerte ridetas. Do, ili tamen alvenis, ili estas ĉi tie! Duope! Li dirus: Etuska, Etuska mia! Ĉu vi vidas: jen la maro! Ĉu vi iam pensis? Li kvazaŭ aŭdas, ke ili ekridas. Li kvazaŭ sentas: ili senintence kaptas, premas la manon unu de la alia, ke ĝi doloras preskaŭ, ke larmoj premiĝas al la okuloj!

Li rigardas al la edzino. La rideto disrompiĝas. Li malfermas la pordon, eliras. Nur nun ektremas en li la doloro. La dorso, la kruroj, la torporiĝintaj brakoj.

– Nu, venu jam – li diras milde.

La edzino iomete balancas la kapon. Li ankoraŭ rigardas la maron, revante.

– Kio okazis, ĉu vi fartas malbone?

La edzino rigidiĝas. Iom malproksime mevo ekflugas de sur la asfalto, kaj glitas al la eterna obskuro de la maro.

– Ne blanka, sed griza.

– Kion vi diras? – La edzo estas senpacienca.

– Nenio, nenio. – La edzino malfermas la pordon.

El la hungara: Imre *Szabó*

recenzoj - recenzoj - recenzoj

Per fotoj ĉion

Albumo pri Ĉinio. Kompilita de la Redakcio de „Ĉinio". Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1984. 96 paĝoj, 24 cm.

Tiu ĉi lukse bela fotoalbumo deziras doni al siaj legantoj kompletan superrigardon pri la Ĉina Popola Respubliko. Sur la unuaj paĝoj oni povas vid la naciajn flagon kaj blazonon de Ĉi nio, kaj ankaŭ la ĉinan himnon kun muziknotoj. La ĝeneralan enkondukon finas dupaĝa detala mapo de la granda lando.

Poste sekvas en ok ĉapitroj la prezento de la ĉefaj aspektoj de Ĉinio – de la lando kaj la popolo. La ĉapitroj estas la jenaj: *Geografio, Historio, Popolo kaj registaro, Ekonomio, Literaturo kaj arto, Sciencoj, edukado, higieno kaj sporto, Vidindaj lokoj, Socia vivo.*

Ĉar temas pri albumo, en la libro la plimulton de la spaco okupas fotoj, ĉiuj koloraj kaj majstre faritaj. La plej allogaj el ili certe estas tiuj, kiuj prezentas la belajn ĉinajn pejzaĝojn, la historiajn memorajojn, kaj la arton de Ĉinio, sed meritas atenton ankaŭ tiuj fotoj, kiuj bildigas por la legantoj la nunan ĉinan vivon.

Tamen, la libro konsistas ne nur el fotoj kaj subskriboj: komence de ĉiu ĉapitro aperas konciza sed tre informriĉa teksta enkonduko al la prezentata temo.

„Albumo pri Ĉinio" alportas plezuron ne nur por tiuj, kiuj mem deziras viziti ĝin post du jaroj, sed por ĉiuj, kiuj ŝatas belajn librojn en bona Esperanto.

V. *Benczik*

Bonega populariga verko

Endre Dudich: Ĉu vi konas la Teron? Ĉapitroj el la geologiaj sciencoj. Eldonis: Scienca Eldona Centro de UEA, Budapest, 1983. 23 cm. 150 + 64 p. Prezo: 12,- ned.gld. (Por Hungario: 70,- forintoj.)

Klara prezento de geologiaj procezoj, laŭ multaj branĉoj de la geologia scienco, ĝuigis min dum legado de ĉi-tiu libro, kiu *elstaras* en la geologia scienc-popularia literaturo entute. Do ne nur en la Esperanta literaturo. Talente faritaj desegnoj kaj klarigaj tabeloj lerte kontribuas al la pli bona kompreno de la leganto, kies atenton nepre kaptas la talenta kondukado de la aŭtoro tra la belega interna mondo de nia planedo.

Ni mencias nur kelkajn el la ĉapitroj, kvankam ili ĉiuj meritus konatigon, ankaŭ kiel koncize prezentitaj scienco-branĉoj. Klare montriĝas ekzemple la ĉefaj geokemiaj grupoj de l' elementoj, kaj aldone la specifecoj kaj roloj de tiel gravaj materioj de la terkrusto, kiel la aluminio kaj karbono. Ravas la belega kristalmondo de la mineraloj, prezentata en klasika formo kun bone elektitaj ekzemploj.

Imagata vojaĝo kondukas la leganton tra la diversaj regionoj de nia Tero, tiel klarigante la reliefon formantajn geologiajn procezojn, denudadon, transportadon, sedimentadon ktp. La magmo- kaj sedimentad-devenaj rokajoj estas klare klasitaj laŭ pluraj vidpunktoj, favore al la legantoj.

Oni ricevas sistemigan bildon pri la paleontologio, ankaŭ pri la plej ekzotikaj formoj de la pravivuloj. Tre instruaj ŝajnas la priskriboj pri diversaj iamaj vivkunularoj (biocenozoj) ankaŭ por komprenigi la evoluon de la vivo kaj la Tero. En facilatingebla formo estas prezentitaj la flosado de kontinentoj, la moviĝoj de rigidaj platoj de la terkrusto, ties kaŭzoj en la interno de nia Terglobo. Ne estas forgesitaj ankaŭ aliaj strukturaj-tektonikaj formoj, de kie la aŭtoro transiras al karakterizado de la plej gravaj metamorfaj procezoj, bedaŭrinde tre koncize. Tiuj Ter-internaj procezoj meritus pli da atento ĉe la legantoj.

Tre altan nivelon posedas la ĉapitro pri stratigrafio kaj Terhistorio kun ties tre ilustra tabelo pri la epokoj. La legantojn verŝajne incitos ankaŭ la prognozoj pri la estonto de la Tero.

Meritas bonajn vortojn la „Aplikata geofiziko" (de *A. Lukács*) priskribanta la metodojn de la Ter-interna esplorado. Ne estus superflue aldoni iom ankaŭ pri la ĝenerala geofiziko, okupiĝanta pri la Terglobo entute. Amuza estas la ĉapitro pri aplikata geologio: saturita per leĝera humuro ĝi utile demonstras aferojn kaj (oficialajn) interrilatojn de geologiaj servoj kun „fidelaj" dokumentoj. Ne ŝajnas superflua la ampleksa *Suplemento,* kie hungaraj scienc-esploraj institucioj karakterizas siajn agadojn rilate la geologion. La lando, eldoninta tiun luksan libron, meritas tian reklamon. Ankaŭ tie rimarkeblas trajto de la tuta libro, la bone prezentitaj bildoj, desegnoj kaj tabeloj, portantaj ne mapli da informoj ol la teksto.

Por tuŝi kritike la terminologion kaj specialajn demandojn en la libro, unue mi mencias la difinon pri kristaloj. Estas pli ĝuste instrui pri substancoj posedantaj *atoman kristalkradon,* sendepende ĉu la mineralo havas aŭ ne kristalografian formon.

Enmeti *geologian leksikoneton* estis bona ideo de la aŭtoro. La terminoj estas klarigitaj kompreneble kaj simple. Okaze de reeldono, tiu leksikoneto bezonos tiom da plibonigo: enestas terminoj tute malgravaj, eĉ ne menciitaj (klipo, litoklazo k.a.), ankaŭ kelkaj ne bezonantaj eksplikon (geosfero). Pluraj terminoj bezonas ĝustigon, ekz. *metasomatozo,* tiu kemia trans-

formiĝo de rokaĵoj kaŭze de *postmagmaj* (ne nur postvulkanaj) aŭ metamorf-devenaj solvaĵoj, en kondiĉoj de *diversaj* temperaturoj kaj premoj.

Koncerne terminojn, al mi ne ŝajnas sukcesa la paro „entruda–eltruda", ĉar la verbo „trudi" havas tute alian sencon; aliflanke en la libro troveblas ankaŭ „intruzivaj rokaĵoj". Do, malsamaj radikoj por la sama senco! Eblas tre malfacile distingi dum parolo la paron „falto–faŭlto", kio ankaŭ ne estas oportuna.

Ankoraŭ iom pri la radiko „gen": ekzogena, endogena, biogena k.a. Kun la sama senco la libro uzas la radikon „genez": orogenezo, filogenezo k.a. Ŝajnas pli bone uzi nur la lastan (ekzogeneza, endogeneza), ĉar „gen" posedas biologian sencon (geno, genetiko), dum „genezo" aludas al deveno, origino. „Silto" ŝajnas al mi tute superflua: ĉu aliaj lingvoj posedas ekvivalenton de tiu geologia termino?

Pluajn rimarkojn mi ne havas! Pro la supraj, eble parte subjektivaj rimarkoj la libro neniom perdas de sia valoro: verko riĉenhava kaj belaspekta, kun klara kaj alloga lingvo. Sendube, ĝi trovos vastan rondon da legantoj, espereble ankaŭ inter junuloj, kiuj post tralego certe ekvolos iĝi geologo. Grava rezulto!

Plenkore mi volas danki la aŭtoron pro lia admirinda kaj rava talento, danki SEC pro la eldono de tiu brila kaj belega Esperantaĵo!

V.I. *Kiselev*
geologo, resp. sekr. de
„Informilo de Scienca Akademio de
Taĝika SSR"

Novelaro, kiu meritas atenton

Tyblewski, Tyburcjusz: Fihonestulo. Rakontoj. Eldonita helpe de Luiza Marin. Jelenia Góra. 1983. p. 103. Dulingva: Esperanto-pola.

Ofte mi ne bone komprenas la kriteriojn laŭ kiuj niaj literaturaj kritikistoj juĝas la originalajn Esperanto-verkojn. Pri iu sciencfikcia aŭ krimromano aperas pluraj recenzoj, kiuj penas konvinki la legantojn pri la kvalitoj de tiu ĉi verko, kaj samtempe pri iu serioza novelaro aŭ romano la kritikistoj silentas. Ekzemple pri la originala novelaro de Tyburcjusz Tyblewski „Fihonestulo", eldonita en 1983, ĝis nun eĉ unu recenzo ne aperis. Ĉu la nomo de Tyblewski estas nekonata? Tute ne! Tyblewski jam de multaj jaroj aktive ĉeestas en nia literaturo. La legantoj bone konas liajn literaturajn kaj sciencajn artikolojn. Liaj originalaj noveloj plurfoje estis premiitaj en la Belartaj Konkursoj.

Malgraŭ ke la novelaro „Fihonestulo" iom hazarde trafis min, ĝi tuj stimulis min, ke mi esprimu mian opinion, tamen ne kiel kritikisto, sed kiel kolego, kiel verkisto, emociita de la sincera kaj originala pensmaniero de amiko kaj kolego.

La unuan fojon mi renkontis la nomon de Tyblewski sur la paĝoj de „Hungara Vivo", kiam mi tralegis lian eseon „Skizo pri Esperanto-romano". En tiu ĉi eseo Tyblewski emfazas la signifon de la internaciismo, kiu devas esti unu el la plej gravaj karakteroj de la originala Esperanto-romano, cetere ankaŭ ĉi volumo enhavas tiun ĉi interesan eseon.

La novelaro de Tyblewski konsistas el dek unu originalaj noveloj, interparolo kun Victor Lebrun, meditoj pri la envio en intervjua formo, kaj la jam menciita eseo.

La noveloj estas verkitaj dum periodo de preskaŭ dek kvin jaroj, kaj nature ne ĉiuj noveloj estas samnivelaj, sed pli gravas, ke sub la aŭtora lupeo de Tyblewski ni vidas la realan homon kun ties pozitivaj kaj negativaj flankoj.

Tyblewski tute ne celas montri al ni la homon nur de lia bona flanko, male, ŝajnas al mi, ke la aŭtoron pli turmentas la demando kial la homo estas malbona. Ne hazarde la novelaro havas la titolon „Fihonestulo". La aŭtoro demandas sin, kial la pastro Antoni agas kontraŭ la moralaj preskriboj de la religio, kial la kaporalo el la rakonto „Kaporalo kontraŭ suno" kondutas kiel besto, aŭ kial la ĉefviculo el la rakonto „Ludbastono kun haroj" sentas grandegan plezuron turmentante sian kolegon?

Tyblewski strebas analizi, kio igas la homoj malicaj kaj kruelaj. Emocige kaj reale la aŭtoro priskribas la momentojn, kiam homoj krimagas kontraŭ homoj. Tyblewski konkludas, ke en pluraj okazoj la homoj estas kruelaj, kiam ili estas reprezentantoj de iu potenco. Tamen en la rakontoj de Tyblewski ni renkontas ankaŭ homojn, kiuj spite al la malfacilaĵoj pretas helpi al aliaj homoj. Tio ĉi estas tre reliefe esprimita en la noveloj „En la puto" kaj „La ĉiĉerono". Laŭ mi „En la puto" estas la plej sukcesa novelo de Tyblewski. Li verkis ĝin, impulsita de eta gazeta informo, sed ĝuste tio, ke la okazintaĵo ne estas persone travivita de Tyblewski, pruvas, ke li estas verkisto kun riĉa fantazio, kiu povas emociigi la leganton.

Tyblewski estas aŭtoro kiu emas eksperimenti per la formo. En siaj rakontoj li uzas kinematografiajn elementojn, ekzemple li subite ĉesigas la rakontadon por daŭrigi ĝin kun la samaj figuroj, tamen post iom da tempopaso. Laŭ mi tiu ĉi estas interesa eksperimento, se ĝi ne tranĉus tro subite la naturan fluon de la rakontado. Kelkaj noveloj de Tyblewski enhavas raportaĵajn elementojn, kiuj emfazas la fidindecon de la eventoj, sed tiuj ĉi konkretaj elementoj iom senigas la novelojn disde ilia emocia forto. Impresis min ankaŭ la fakto, ke la temoj de kelkaj noveloj estas ĉerpita el la vivo de esperantistoj. Tio montras, ke Tyblewski strebas literature interpreti la fenomenon esti esperantisto kaj konduti kiel esperantisto.

Se la dek unu noveloj montras al ni Tyblewski kiel verkiston, „Skizo pri Esperanto-romano" kaj la du intervjuoj aludas al ni pri Tyblewski kiel sciencisto. Estus tre interese pli detale ekkoni la sciencan laboron de d-ro Tyburcjusz Tyblewski, kaj tial ni atendas novajn librojn de li, kiuj malkovros al ni novajn detalojn el lia multfaceta talento.

Georgi *Mihalkov*

KOREKTO

Bedaŭrinda preseja eraro aperis en nia n-ro 1984/6. sur p. 224. La ĝusta surskribo super la bildo de la *dragŝipo* estas: **„Fotoj de Imre Szacsvay".**

Ni petas pardonon kaj de la legantoj, kaj de la aŭtoro de la fotoj.

Por efike ebenigi la grundon

La Eŭropa mapo montras gigantan duonringon pro la montaroj orientaj Alpoj kaj Karpatoj. Tumulte suprenŝoviĝis tie du mil metrojn altaj pintoj kaj montoĉenoj, kiuj ĉirkaŭbrakumas malpli altnivelan grandiozan basenon. En ties mezo situas Hungario. Al tiu baseno alfluas la akvoj de ĉiuj flankoj, desur la altaĵoj kaj arbarplenaj deklivoj. Akvofluoj kaj riveroj strebas inter montetoj, tra ebenaĵoj al pli kaj pli subaj niveloj, kun Danubo kunfluante, por fine atingi la maron. Estas neevitebla devo bone zorgi pri tiuj „trapasantaj" akvoj kaj riveroj: oni devas reguli kaj utiligi ilin, samtempe protekti la naturon. Jen, skize la kaŭzo, pro kiu hidrologio iĝis tiel grava tiulande, pri kies rezultoj nia revuo jam plurfoje raportis, ankaŭ por konigi al la fakuloj alilandaj la pene akiritajn spertojn, i.a. la organizadon de la akvomastrumado.

Nuntempe tiu gravega agosfero de la naturprotekto – ĉie ajn – bezonas egajn teknikajn instalaĵojn. Ĉiuj laborspecoj igas necesaj specialigitajn maŝinojn, multekostajn ilojn, kiuj siavice bezonas maŝinerojn, materialojn, riparadon kaj zorgan kontroladon jen por produktivo, jen por eviti danĝerojn. Rilate tion, al la gravaj spertoj de la hungara hidrologio apartenas la konstato, ke moderna teknika nivelo postulas efektivan kooperadon de la regionaj organizaĵoj: kaj de la regionaj hidrologiaj direkcioj, kaj de la lokaj akvomastrumaj kompanioj de la loĝantaro. La premo de la bezonoj igis ilin krei *specialan kooperativon*, en formo de UNUIĜO VIBESZ.

La membroj atribuis al tiu Unuiĝo la similajn-komunajn taskojn elserĉi sur la merkato la plej taŭgajn maŝinojn, teknologiojn kaj materialojn, havigi ilin al la membroj, akiri modifojn ĉe la fabrikantoj laŭ la specifaj bezonoj. Sed oni ne haltis ĉe tio. La Unuiĝo kunigis specialistojn, kolektis fakspertojn de la membro-organizaĵoj. Tio aparte konvenas ĉe maŝinriparado kaj prizorgado de komplikaj instalaĵoj – kloakakvopurigo, trinkakvo-provizado krom aliaj – kiuj fakte estas multe pli difektiĝemaj ol oni tion ĝenerale supozas. Kompreneble ĉion ĉi kompletigas instruado kaj propagando inter la membroj pri la plej novaj teknologioj, pri uzindaj modernaj iloj kaj materialoj, kiujn la moderna tekniko de tag' al tago prezentas. Ne malofte membro-organizaĵo bezonas solvon de nekutima teknika tasko: la membraro efektive kooperadas ankaŭ tiucele per siaj fakuloj, kaj oni disvolvas tiamaniere novajn manierojn por plenumi nove aperintajn postulojn de la rapide evoluanta kaj komplikiĝanta vivo.

Mem la propra organizaĵo de la Unuiĝo ebligis jam ampleksigi sian laboron: oni komencis akcepti komisiojn eĉ de ekster la membraro. Estas natura evoluo: la akumulitaj spertoj kaj rimedoj uzendas en pli vasta sfero, almenaŭ por agrikulturaj kaj kamparaj aferoj. Jam montriĝis vaste respektata branĉo de la agado de la Unuiĝo vasta partopreno en la agromelioracio, la projektado kaj efektivigo per la propraj rimedoj. Ofte nur partoj de tiaspeca laboro estas menditaj, ĉar oni volonte laborigas la multekapablajn terkonstru-maŝinojn de la Unuiĝo.

o 1: Skrapmaŝino TIVIZIG-ROME tipo 10 €



Inter tiuj ni menciu la terenreguligajn laborojn por hidrologiaj bezonoj kaj la laŭliniajn terlaborojn (digo, fosaĵo, kanalo, k. s.). Drenatan teritorion instali, do are subterigi drentubojn, precipe talpodrenilojn, plej ofte superas lokajn kapablojn. Tio validas ankaŭ pri la kreado de vasta irigacia tuboreto, de nova fiŝlago surloke de konkava tereno, por aludi pri kelkaj ekzemploj. La kooperativaj rimedoj de la Unuiĝo sukcesigis ekonomie tiaspecajn entreprenadojn, komisie de diversloke rezidantaj agrokulturaj organizaĵoj (agro-kooperativoj, entreprenoj, instancoj ktp.).

Kiam oni konstruas tiajn establaĵojn, aperas bezonoj pri kompletigaj ekipaĵoj, kiuj apenaŭ troveblas en la proksimaj magazenoj. Kutime al la konstruanta entrepreno trudiĝas ilin havigi. La Unuiĝo ekfabrikis do etajn-mezgrandajn purigajn instalaĵojn por poluakvoj – domaj, sterkaj –, filtroaparatojn por akvoelprenejoj. Trinkakvo-provizejoj en vilaĝoj kaj farmoj bezonis ekipaĵojn por senferigi kaj senmanganigi – jen, ankaŭ tio estis plenumenda.

Supre ni jam atentigis pri grandiozaj terenkonstruadoj – tra la historio de la homaro tiuj estas konataj, ili servas la akvomastrumadon jam en la antikvaj civilizacioj. La sklave laborintojn nun anstataŭas grundo-prilaboraj maŝinoj. La Unuiĝo kaj peras ilin al la membroj, kaj fabrikas ilin, ankaŭ kune kun iuj membroj. Niaj fotoj prezentas kelkajn el la plej praktikaj laŭ specialaj bezonoj.

Jen la hidraŭla, traktor-trenata skrapmaŝino TIVIZIG-ROME tipo 10 C, fabrikata laŭ Usona licenco (*foto 1.*). La maŝino ebenigas, rabotante pere de turnebla triparta klingo produktive, je du fazoj dividante la farendôjn. Ĝi rabotas la teron en larĝo de 2134 mm, kaj la trogo permesas ŝarĝadon ĝis 7,5 m^3 da tero, kvankam ĝia alteco apenaŭ atingas unu metron kaj duonon. Pro la relative malgranda pezo kaj taŭgaj pneŭmatikoj ĉiaspecaj traktoroj – ne nur raŭpbendaj – tre ekonomie trenas ĝin kiel remorkon laboran.

Foto 2: Skrapmaŝino TIVIZIG 4.5 M

Alia trenata skrapmaŝino estas TIVIZIG 4,5 M *(foto 2.)*, kiu eminente taŭgas por rekultivado, teren-reguligo, talus-konstruado, niveligo kaj similaj. Relative malgranda pezo, facila turnebleco kaj praktika maniero de hidraŭla regado igas ĝin tre utile uzebla, ankaŭ, ekzemple, inter malvastaj cirkonstancoj. Ĝi rabotas 1840 mm larĝon, kaj la trogo akceptas 4,5 m^3 da tero, kiu kvanto estas plurobligebla trajno-maniere per pluraj remorkoj. Ajna traktoro kapablas treni ĝin (tiucele sufiĉas 15-40 kN), ja ĝia maso estas nur 1800 kg, kaj la alteco apenaŭ superas unu metron (longo 5040 mm, larĝo 2180 mm).

Laste estu menciata la universala talus-prizorga maŝino HIDROT *(foto 3.)*. Temas pri la manipulendaj flankdeklivoj de ŝoseoj, digoj aŭ fluujoj, alivorte pri ĉiaspecaj talusoj. La maŝino kapablas ĉiujn oblikvajn klinojn glatigi kaj senigi de vegetaĵoj, do defalĉi; samtiel manipuli kaj prilabori etajn fluujojn, kanalojn, ankaŭ purigi ilin de vegetaĵoj kaj ŝlimo. Apartaj hidraŭlaj regadoj funkcigas la artikan arganon (brakon) kaj la ŝanĝeblan laborilon. El inter tiuj specialaj laboriloj indas mencii la rotaciantan talus-falĉilon (tipo 1500 R), kiu dispecigas eĉ la alte kreskintan vegetaĵon – en larĝo de 1,5 m. La facile manipulebla prizorga maŝino (aplikebla sur traktoro MTZ) laboras kvazaŭ svinganta balaanto, per granda efikeco, akomodiĝante al la tereno.

VIBESZ
H-1055 Budapest, Honvéd u. 38.
Telekso: 22–6849

E.F.

Foto 3: Talus-prizorga maŝino HIDROT

GAJA PAĜO

Modernaj tempoj

– Filineto mia! Kiu edzinigos vin se vi ne lernos munti aŭton?

Aŭ...

Mod/ern/a knabino rigardas surprizite. – Ej, Karlo – ŝi fine ekparolas –, ĉu vere vi volas kanti al mi per tiu antikviĝinta gitaro sen elektronika ekipaĵo?

Komencanto

– Estas ja domaĝe ke via nova aŭto disrompiĝis, sinjoro. Videble vi estas komencanto, ĉu ne?

– Tute male! Mi ne estas komencanto, tiu ĉi estas mia tria rompiĝinta aŭto!

Do ankaŭ komencanto

Parencoj vizitas novnaskiton. Iu ne retenas sin de rimarko:

– Nu, la etulo estas ĉarma, tamen li ŝajnas iomete malforta.

– Ĉu malforta? – rifuzemas la feliĉa patro –, kiel li estus pli fortika post trimonata geedziĝo?

Tute ordinara edzo

– Kara sinjorino, ĉi-okaze la scienco atingis sian limon, ni estas senkapablaj! Via estimata edzo havas... gripon.

Ne komencanto! Spertulo...

– Mi gratulas, amiko, okaze de via ĵusa edziĝo! Mi ja bone scias, kiel seksplena estas via edzineto...

Interkona vespero

– Do, ĉu vi vere eksedziĝis, samideano? Ja mi faris same, mi eksedziniĝis.

– Grandioze, samideanino! Ĉu eventuale vi havas emon estonte kun mi kune divorci...?

Eksterkona vespero

S-ano Piedeto venis hejmen, kaj surprizite trovis slipon sur la kuireja tablo: „Mi foriris al mia amikino. Mi revenos malfrue."

Piedeto reprenas la ĉapelon desur la hoko, kaj alskribas sur la slipo: *„Mi same."*

Ekstera vespero

– Karulino! Ni fartos eminente ĉi-vespere – diris junulo salutanta en la pordo de la amatino. – Mi kunportis tri teatro-biletojn.

– Sed kial por ni trion?

– Nenio pli simplas: por via panjo kaj paĉjo du, kaj la tria servos vian fraton!

Eksterordinara nokto

– Ĉu helpis vin la medikamento, kiun mi preskribis por vi? – demandas kuracisto.

– Ho, jes, grandioze! Jam ĉiunokte mi kapablas amori kvarfoje.

– Bonege! Kaj kiel akceptis tion via edzino?

– Mi ne scias. De tiam mi ne estis hejme...

Denove hejme

renkontiĝas du amikinoj. La blonda demandas la rufan:

– Mia kara, kiel sukcesis via nupta vojaĝo?

– Dankon, bonege, kiel ĉiam.

Post kelkaj tagoj

estiĝas la „unua kverelo" ĉe la junaj geedzoj. Ineto komencas enpaki kelkaĵojn: – Mi iras reen al panjo!

– Iru trankvile for, vi...

– Bone, sed mi revenos kun ŝi! – min-acas la mino de l' ino.

Post iom da tempo

– Mi aŭdis, amiko, ke via edzino ege koleras je vi.

– Jes, tiel estas, ĉar – imagu! – ŝi trovis leteron ne malfermitan en mia skribtablo.

– Ŝi ja ne devas koleri pro fermita letero! ?

– Eble... sed tiun leteron skribis ŝi al mi... antaŭ nia geedziĝo.

Ne-esperantaj verkistoj!

– Mi legis vian ĵus aperintan novelon! Konfesu al mi amike: kiu verkis ĝin efektive?

– Kaj kiun vi petis por laŭtlegi ĝin al vi?

Bona novaĵo pri la nova jaro

Ĝi daŭros je unu tago malpli longe... *E.F.*



PRI FINANCOJ...

sentencas la du Zamenhofaj proverboj en la linioj H.1. kaj V.13. (ensendendaj). Inter la solvintoj ni lotumos premiojn. **Limdato:** unu monato post la alveno de tiu ĉi revuo.

Horizontale: **13.** Forta ventego (R), **14.** Demandvorto, **15.** Tre konscia pri siaj meritoj, **16.** Ago enigi pinton ien, **17.** Malantaŭa parto de besta korpo, **19.** Hebrea vorto (fino de preĝoj), **20.** Flankaj partoj de konstruaĵoj, **21.** Saltanta bestet', **22.** Radiko de H.51., **24.** Per io altigita planko, **25.** Radiumo, **26.** Pagilon, **27.** Kunigilo de metalaj pecoj, **29.** Rimhava proza teksto (R), **30.** Identa, **31.** Konsonantoj de grava organo, **32.** Tritiko, aveno, sekalo (komuna nomo), **34.** Mallarĝa terkolo inter du maroj, **36.** Dolĉa frukto (R), **37.** Subteraĵo de vegetaĵoj, **38.** Tabelvorto, **39.** Interpunkcia signo, **40.** Antikva greka monereto, **41.** Natria klorid', **42.** Ne duran, **43.** Krusto de arbo, **44.** Prepozicio, **45.** Migranta paserforma bird', **46.** Frakcio, **47.** Kapuĉhava mantel', **49.** Ne havante aŭdkapablon, **50.** Fino de fino ! **51.** Rektangula, **52.** Malplenigi la vezikon, **54.** Instruita (R), **55.** Trielektroda valvo (R), **59.** Geografia kart', **61.** Identaj konsonantoj, **62.** Demandvorto, **63.** Ne nin, eĉ ne vin, **65.** Tropika bird', voĉ-imitanto, **67.** Prepozicio kaj artikolo, **68.** Membran' ĉe virgulinoj, **70.** E-asocio sennacieca, **71.** Eligas laŭtegajn sonojn.

Vertikale: **2.** Profite uzebla, **3.** Parto de spaco, **4.** Mallongigita diplomito, **5.** Mezurunuo de elektra rezistanco (R), **6.** Sistema ord' en mastrumad', **7.** Krio por ripeti, **8.** Soldata taĉmento, **9.** AF, **10.** Refleksiva adjekto, **11.** Kio daŭre daŭras, **12.** Certa tersurfaco, **17.** Superflua, senutila, **18.** Dekoraĵo, **21.** Franca arkitektura kaj ornama stilo, **23.** Sendo de danĝero, **26.** Ĉefurbo en Filipinoj, **28.** Tantalo, **28.** Ost-enhavo, **30.** Karakteriza maniero por sin esprimi (R), **31.** Estri armeon (R), **33.** Hebrea pastro, **35.** Facile fandebla metalo, **36.** Igi glata kaj brila per frotado, **39.** Mineral' (el aluminia oksido), **41.** Venos post la sesa, **42.** Gravan komision, **44.** Guberniestro en la antikva Persujo (R), **47.** Grasa parto de lakto (R), **48.** Kion oni turnas, estas..., **51.** Konjunkcio por komparativo, **53.** Cirkloforma aĵo (R), **54.** Kontraŭleĝa ago, **56.** Foje somerdomo, **58.** Nutra frukt', **60.** Pasintaĵ', **62.** Preseja reproduktilo (R), **64.** Reen: H.44., **66.** Ĉiutaga manĝaĵo (R), **67.** Eta parto, **69.** Norda Prismo, **71.** Kilopondo.

Solvoj de la krucenigmo en la *n-ro 1984/4:* La ora Pozidono, La tundro ĝemas, La verda raketo, Aŭtuno en printempo, Hasanagaino, Dolĉa gusto de l' paco (troviĝis krome Koloroj; ankaŭ ĝin ni akceptis).

Solvoj de la krucenigmo en la *n-ro 1984/5:*

Pol', hungaro, frata paro.
Dum batalo, drinkregalo;
Vigla kapo, brava koro.
Benu ilin, Di-sinjoro!

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Georgi Mihalkov

Amuza legolibro en Esperanto

Albert Lienhardt

Albert Lienhardt estas bone konata al la Esperanto-legantoj pro lia tre populara verko „Amuzaj dialogoj". Nun en formo de legolibro la aŭtoro daŭrigas tiun metodon kaj regalas nin per cent freŝaj amuzaj legaĵoj.

1. Kio estis skribita sur la botelo de la medikamento, kiun donis la doktoro al Hejno?
2. Kial Otto petis sian onklinon, ke ŝi ekstaru el la fotelo?
3. Kial Benno ne povis ekdormi en la gastejo por junuloj?

Limdato por respondoj: du monatoj post la alveno de la revuo.

Solvoj de la demandoj *n-ro 1984/ 4:*
1. Oliver Meteni estas verkisto.
2. La malliberejo troviĝas en Mdali.
3. La Skandia konsulo en Lamberta nomiĝas Torsby.

Solvoj de la demandoj *n-ro 1984/5:*
1. Lidia dum 6 semajnoj ellernis E-on.
2. Sofia recitis al Lidia la poemon „Ho, mia kor'."
3. Lidia donacis al Ludoviko okaze de lia 17a naskiĝtago sian skribilon.

Premion gajnis per lotumado: Wieslaw *Ponczek,* Gdansk, PL; Poul *Thorsen,* Kopenhago, DK; *resp.* s-ino Eda *Donhofová,* Jablonec n.N. kaj V.V. *Makarenko,* Taganrog, SU. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj

En la n-ro 1985/2 ni ĉerpos demandojn el:
„La Ora Pozidono" de Julian Modest,

en la n-ro 1985/3 el:
„Eŭlalia" de Lorjak.

Korespondi deziras

S-ro Nair Costa *Barreto* (31) pri muziko, kino, belartoj, pentrarto. *Brasilia-DF,* SQN 416/B ap. 304, BR-70.879. – S-ro Josemeire Vieira *Gomes* (25) pri desegno, pentrado, belartoj, muziko, kol. pk. *Brasilia-DF* SHCE 1501/B 2p. 306, BR-70.650. – Maria do Socorro *Araújo* (32) pri antikva civilizo, turismo, planto, kino. *Brasilia-DF* SCRN 702/3-D-18, ap. 301. BR-70.710. – S-ino Lurdicéia Rodrigues *de Lima* (26) *Taguatinga Norte-DF,* QNN 04 conj. J. -07-Guariroba, BR-72000. – F-ino Ilka Leite de *Oliveira* (26) pri muziko, turismo, sporto. *Gama-DF,* Q.20 lote 52, Setor Leste, BR-72.400. – Walter Jeronimo *Radicchi* (59) instruisto, pri civilizoj, naĝarto, belartoj, fotoarto – ankaŭ filino Magda (16), *Brasilia-DF* HIGN 713/I ap. 202, BR-70.000. – F-ino *Leitsaar* Ulle (18) kun samaĝuloj, pĉt. *Martna,* Estonio SU-203.182. – F-ino *Loodus* Merle (15) pĉt, *Haapsalu,* Kastani 24-47, Estonio SU-203.170. – Hans-Georg *Kaiser* (30) pri interna ideo, libro-interŝanĝo, rec. gastigado, *Altenburg,* Moskauer Str. 13. DDR-7400. – Monika *Anger* (45) instruistino, *Johanngeorgenstadt,* E. Thälmann Str. 2. DDR-9438. – D-rino Christl *Berger* (39) kuracistino, Jugelstr. 8. *Johanngeorgenstadt,* DDR-9438. – S-ro Reinhard *Bünger* (44) laboristo, *Schwarzenberg* O. Grothewohl Str. 11. DDR 9430. – S-ro *Gudilin* Sergej (30) laboristo, ktp pri mod. muziko, foto. *Bratsk* Box 2161, SU-665.178. – Tatjana *Ivanova* (24) ekonomikistino, kun hungaroj pri historio, muziko, turismo, modo, rec. gastigado. *Ajtos* St. 19. II. N3, et. 2. BG-8500. – F-ino Maria Simeonova *Petrovna* (32) inĝenierino pri komputado, pĉt. pri lingvoj (franca), *V. Tarnovo* pk. 13. BG-5000. – Aleksandr *Murašev* (33) oficisto, ktm, pĉt, kol. bm, pm pri pentraĵoj. *Leningrad,* POB 809, SU-198.215. – S-ro Sergej *Veršinjin* (23) ktm, pri jogo k.a. *Uljanovsk,* Radiŝĉeva 34a-4, SU-432.021.

Skán Xiānhuái (21) kontisto, pri filatelio, kol. pm k.a. pri pentraĵoj k.a. *Dehui* Xiánwei dangxiaáo, Jilin, P.R. Ĉinio. –

S-ro *Erős* Balázs (28) faklaboristo en paperfabriko volas fondi E-istan familion, kun serioza s-anino (20-35 j.) laŭeble brunharara kaj sola vivanta. Resp. garantiata! *Szolnok,* Pf. 9. H-5006. – E-klaso (11-jaraj) kontaktus kun hungaraj gelernantoj, loĝantaj apud batalkampoj de la bulgara armeo en H-io. *Gabrovo* XI. Lernejo, fakult. E-klaso, Sonja *Tihova,* BG-5300. – E-kursaninoj (16-20) serĉas geamikojn tm. Rein *Saag, Viljandi* pk. 82. Estonio SU-202.900. – Nils A. *Ekstén* (36), kasisto de Sveda Skolta E-Ligo, kun junulinoj, skoltinoj ĉiuaĝaj, ankaŭ pri vizitoj. *Landskrona* POB 4050, S-261 04. – E-klasoj (12-17 jaraj) en *Tallinn,* 10. Keskool, Estonio SU-200.016. – F-ino Katrin *Laumets* (20) pri muziko, bk. kalandaretoj *Tartu* Taara pst. 1-2. Estonio SU-202.400. – F-ino Merylin *Tammsaar* (15) pĉt, kol. bk. *Laagri* Sae 2-10. Estonio SU-203.054. – Teresa *Jagiela* (23) oficistino kun hungaroj pĉt, interŝ. bk, pri sporto, turismo, muziko, diskoj, literaturo. *Skierniewice,* ul. Mazczonowska 25m42, PL-96-100.

Leterkesto

Al niaj anoncantoj: La redakcio insiste petas – kaj alvokas – ĉiujn anoncantojn, kiuj „korespondi deziras", ke oni *nepre respondu* almenaŭ unufoje! Ĉiuj sin prezentantoj, instigitaj de via anonco, meritas respondon, eĉ se Vi elektis alia(j)n por daŭrigi la korespondadon. Ni ripetas: bonvolu almenaŭ per kelkvorta poŝtkarto informi lin aŭ ŝin, ke Vi jam elektis alian korespond-partneron.

Theodose Károly, Timisoara, R: Viaj meditadoj pri la brava agado de prof. Bociort, favore al nia movado, estis vere legindaj. Ni amikeдankas pro tiu.

Bert *Schumann,* Mittweida, GDR kaj *aliaj:* „Ekzameno sen risko" havas vere multajn solvantojn, do Georgi Mihalkov ne rajtas plendi pro ne-sukceso. Via instigo, kiu venis jam de pluraj, igos nin pli utiligi tiun „libro-legigan" manieron: ni klopodos jam anticipe informi la legantojn pri la verkoj kiuj sinsekve enprogramiĝos. Tiel eblos ĝustatempe akiri kaj – pli grave! – legi tiujn librojn, konatiĝi pli profunde kaj vaste pri la E-literaturo nuntempe eldonata. Superflue mencii, ke tiamaniere la lingvoscio – vortoj, esprimoj, parolturnoj kaj aliaj – kreskas kune kun la arta plezuro.

Magnus *Weisflog,* Scheibenberg, GDR: Niaj teknikotemaj artikoloj servas kaj por la teknika-faka lingvaĵo, kaj por la faka temo mem. Ni aparte preferas kompreneble, kiam la temoj tuŝas la fakan intereson de specialistoj, kiel tio okazis ĉe via bofilo okaze de la temo ŝtaltubo-produktado.

Bálint István, Kecskemét, H: La supra mesaĝo koncernas ankaŭ vian amikan demandon. Vi bone komprenis, ke tiaspecaj fakaj artikoloj ofte atentigas pri Eo kaj H.V. gravajn entreprenojn. Ĉar nia revuo devas financi sin mem, ne ĝuante kontribuon ekz. de ŝtataj aŭ urbaj instancoj, la interesiĝo de entreprenoj ofte venas tre konvene por niaj financoj. Fakte, tiaj kaj similaj konstruaĵoj ebligas nin eldoni *tiom da paĝoj* bonaspektaj.

Enciklopedio de MEM (ĉ. 600-paĝa) estas redaktata: la redakcio atendas artikolojn, resp. notojn, pri porpacaj aktivuloj, kunvenoj, eldonaĵoj k.s., ankaŭ dokumentojn! Helpontoj bv. turni sin al la redakcio: *Sofio,* Bulv. Hr. Botev 97, BG-1303.

HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO * Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** * Arta redaktoro: **Oszkár Böhm.** * Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István Laszló, Georgi Mihalkov, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits.** * Ĉefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfons Pechan, Aurel Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** * Budapest, pk. 193. H-1368. Telefono: 141-078, 334-194. * Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. * Respondeca eldonisto: **Tibor Vaskó.** * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215-96-162, 1900 Budapest, Jŏzsef nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) 96,- Ft, al eksterlando por unu jaro 114,- forintoj. * Peranto al eksterlando KULTURA (Budapest, P.O.B. 149, H-1389). Abonprezo por unu jaro (ses numeroj) 11,- Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. * Presejo de HEA 85–0127
Indexszám 25 377 ISSN 0018–7704

BAKONY MŰVEK

K·L·G

SPARKILO

BAKONY MŰVEK

BAKONY

H-8201 VESZPRÉM, Poŝtkesto 6.

PRODUKTATA LAŬ LA LICENCO DE LA BRITA SMITHS INDUSTRIES

IDEGEN-FORGALOM

Turisma
Propaganda
Eldona
Entrepreno

Magyar Konyha

UTAZÁSI MAGAZIN

Túrázás · Szórakozás · Üdülés

NIMRÓD

jó utat
autós magazin

Autósélet
A MAGYAR AUTÓKLUB LAPJA

NR NIMRÓD rejtvényújság

Magyar Hírek